

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 38 (118)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1964

---

## GRAVA ANONCO


Ce la jus okazinta Aŭstralia Kongreso en Melburno okazis io grava por nia movado en Australio. La Aŭstralia Esperanto - Asocio starigis fonduson por nomi ĉambrom en la U.E.A.-Domo en Rotterdam.

Ce la Universala Kongreso en Harrogate (Augusto 1961), la estraro de U.E.A. lanĉis alvokon por donacado de ĉambroj en la nova domo. Jam en tiu U.K. venis la unua de S-ino Dorothy Henderson, kiu nomis Kanadan Ĉambrom. Gis Marto, 1963, sekvis ŝian ekzemplon ok aliaj Ciuj estis privataj donacintoj krom la sepa, kiu estis la Sveda Esperantista Federacio. En Aprilo alvenis la deka donacinto, nia najbaro, la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Nun staras apud la aliaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Dum tri jaroj ni devos kolekti la sumon de £625 (Aust.). Dum la Melburna Kongreso ni faris bonan lanĉon, ĉar tie ni jam kolektis £210 kun promesoj por plia £60, do ni estas preskaŭ duonvoje al nia celo. Gu niaj Nov-Zelanda najbaroj estas pli donacemaj ol ni Australianoj? Nepre ne! Ni facile kolektos la bezonatan sumon. Sendu donacojn al nia kasisto, S-ro Ken Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, Vic.

Jam donacintaj: Zamenhofa Fonduso £75; D-ro R. G. Robbins £50; Ges-roj P. E. Schwerin £10; S-ro H. Smith £5; S-ro K. G. Linton £10; Aŭstralia Esperanto-Asocio £25; Ges-roj F. V. Taylor £5; S-ro W. J.

Drummond £5; F-ino V. Cox 10/-; Ges-roj O. K. Mitchell £2; S-ino V. King £5; S-ro F. D. Vawser 5/-; D-ro A. Friedenbergs £1; S-ro H. W. Buswell 10/-; S-ro I. T. Maddern £10; Ges-roj S. H. Milligan £5. Jam promesintaj: Kanbera Esperanto Klubo £10; Ges-roj Koppel £2/2/-; S-ro L. N. M. Newell £5; S-ro I. Grahovac £10; Ges-roj G. F. Cooper £10; S-ro E. Costa £10; F-ino A. Godfrey £5; S-ino A. B. Sedgley £2/2/-.



## THE CONGRESS REPORT

will appear in next number.

## TOKIA KONGRESO

Kun ĉi tiu numero vi ricevos aliĝilon por la Tokia kongreso okazonta en Aŭgusto 1965. Estas dezirinde, ke tiuj, kiuj intencas ĉeesti tiun unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Azia lando, sin anoncu kiel eble plej baldaŭ. Vi rimarkos, ke estas speciala rabato por tiuj, kiuj pagos antaŭ la fino de Julio. Sendu vian pagon al la ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton.

## SUR ALIAJ VOJOJ?

Ĉu ne estas trista afero, ke en tia vasta lando kia Aŭstralia ekzistas nur malmultaj E-istoj? Por grandigi la Aŭstralian E-movadon ni forte bezonas la junularon. Gis nun nia propagando ne bone efikis. Ni devus ŝanĝi la ĝisnunajn rimedojn.

Infanoj kaj junaj homoj forte laboras por atingi malfacilan celon, se iu rekompenco ilin atendas. Kion ni povus promesi al ili, se ili lernus E-on? Kial ne klopodu la jenan? En granda propagando - kampanjo tra Aŭstralio ni anoncu vetkonkuran kurson de E-o por junuloj 10-jaraj ĝis 21-jaraj. Dum proks. unu jaro ili studus la lingvon kaj vizitus la E-klubojn. Poste ili plenumus E-ekzamenon. La plej bona lerninto de tiu konkuro ricevus premion: vojaĝon al la E-kongreso en Tokio en 1965.

Vi demandos al mi: "Kiu pagus por tiu premio?" Nu, E-isto en Melburno promesis doni cent pundojn, se aliaj E-istoj kontribuus la ceteron de la vojaĝmono. Por akiri ĝin, la E-kluboj povus helpi: ĉiu partoprenanto de la vetkonkura kurso pagus ĉe la komenco de la instruado unu pundon. Por tiu mono ili ricevus instruadon en E-o dum unu jaro. Tiun monon ne irus en la klubkasojn, sed en apartan kason: "Premio 1965". Ĉu la kluboj kaj la instruistoj povus fari tiun oferon?

Ni grandskale penu por atingi la junularon! En Melburno oni fondis propagandokomitaton—bona ekzemplo por aliaj kluboj.

—T. van den Boogaard.

## ĈENLETEROJ.

Ni avertas, ke ricevo de ĉenleteroj kaj similaj estas ignorata de la redaktoro, kies devoj ne inkluzivas atenton al tiuj trudajoj.

## "BIBLIA REVUO"

Original articles on all aspects of Biblical study, with wide appeal to all students of the Old and New Testaments. Wholly in Esperanto, the magazine will appear in May, having some 80 pages (13 x 20 cm). Four issues a year.

Subscription: Now, £2. After May, £2/10/-. Editor is Donald Broadribb, Dept. of Semitic Studies, Melb. Uni., N.Z., who would send detailed folder.

## Recenzoj

**EROJ:** Originala poemaro de Marjorie Boulton. Eldonita de Stafeto. 367 paĝoj. Prezo 2.40 Us. dol.

Supernorme fekunda aŭtorino prezentas ankoraŭ unu imponan verkokolekton, en kiu ŝi poemas pri aferoj vastantaj jam de la kosmo ĝis la hejma kato. Ŝi observas objektojn, homajn situaciojn, por ŝpini moralon aŭ pafi proteston; alihumore ŝi dronas, filozofiante pri spekulativoj ŝajne enigmaj por teruloj, tamen kiuj per ia eterna leĝo devigas pensemajn homojn al pena esprimo.

Poetoj estas tiuj, kiuj amas, kiuj sentas grandajn verojn, kaj elvoĉas ilin; tamen Shelley (ŝeli) interpretis la rolon pli modeste: "Poeto estas najtingalo, kiu sidas en mallumo kaj kantas por gajigi sian animan solecon". Atente leginte la antaŭparolon dela aŭtorino, ni decidu al kiu kategorio ŝi apartenas.

Sincere—sed ne ĉiam serene—subjektiva, el la "senfina debato en sia psiko" ŝi vortigas sian certon pri la bazaj virtoj: amo, karitato, kaj dediĉo al la nobla tasko ŝati, protekti kaj sane evoluigi nian interesan homan mondon. Draste ŝi avertas pri la danĝeraj deziroj, kiuj minacas eĉ origine bonajn homojn, nome la avido al potenco, estreco, venĝo.

Restas, kompreneble, la ĉiam diskutinda demando: kiel evoluigi la socion; kiajn "valorojn" ni serĉu en ĝi? G. K. Chesterton skribis, ke, se oni metus tridek homojn pretaj por kuri al la celo Progreso, je la starta pistolpafo ĉiuj kuras en nesamajn direktojn, ĉiu laŭ sia propra koncepto de la vorto.

La funda penspenetro de la aŭtorino, kaj ŝia vastvidemo, estas evidentaj en la pli ambiciaj provoj, ekzemple

en **Mistero**. La konata Esperanta melankolio denove sin montras en la sepstrofa poemo **Vizio pri la Kolombo**, en kiu troviĝas vera leksikono de la langvoro: pustul', putr', pestinfekt', fetor', muk', lepr', korupt', kruel, sang', slim', ulcer', malpur'. Dancas ridetanta gajemo kaj majstre muldita moketo nur en la brilaj personbildoj de eminentaj Esperantistoj. Perfekte facititaj gemoj de pentro prikaraktera.

Ŝi atentigas, ke oni apenaŭ povas kompreni seriozan poemon sen mensa penado. Tenante tion en memoro, ni penu profite plugi la riĉan humon de la pli fortostreĉaj: **Liberio, Naskiĝo de Geniulo, Letero al Mia Plejamato, Provizore**. Ĉe tio, tamen, la intelekta naturo de la leganto sin trovas luk-tanta kun lia estetika. Ne facile estas peli la carbon laŭ ĝia sulko, kiam la artisma sento perforte, ĝuante, haltas ĉe versoj kiel:

Jen mioj milionope aras  
kaj unu al alia karas;  
gemoj elektinte paras.

Kiel forte tiu simpla ensagas la komprenon! Nur penu ĝin vesti per vialingvaj versoj, aŭ parafrazu proze.

Dekojn da modeste longaj versaĵoj oni legas kun plezuro, tuj flarante la delikatan odoron de pura sentimento, aŭ sentante la skuon de drasta akuzo: **Iom da Homa Varmo, Mense Malforta Knabineto, Koloro kaj Koro**.

La ampoemoj sugestas subtonon de neplenumiteco, de la neatingeblo, kiu pelas la poeton al oftfoja uzo de dolorvokivaj vortoj: turment', brul', solec', velk', detru', mallum' (**Prin-tempo**). La amo de ŝi fantaziita ne estas ĉiel satiga, aŭ kontente serena, sed male idealo kontraŭ kiu malfacilaj situacioj demone forbaradas. Nur la patrina amo permesas al ŝi laŭd-plezuron, danke pian en ĝia sincero. Tamen ankaŭ tie resonas noto de doloro, ofero, tragedio, cetere konforma al la vivo-sperto. Nur tenerema poeto povas ĝin elvoĉi.

**Almozo** strange sidas inter la am-poezio; oni do devas supozi, ke la lingvajo vestas simbolecon am-aludan. **En Destino** de Poeto ŝi iom pesimisme analizas la animon de "servanto de la Krea Verbo":

Propraj suferoj lin turmentas  
duoble, pro sentemo lia...  
sin sentas puŝi stumblan plumon...  
li vivas larme kaj bedaŭre.  
Estas nefacile, kredi, ke neniam

poeto sin sentis kontentige plenuminta sian taskon. Tennyson, Browning, Longfellow laŭdire ne troe sin lasis deprimiĝi, plendante, ke "neniam trovas pens' plenumon", nek ofte sin sentis "fuŝparolaj". Dube, ke iu el ili "vivis larme kaj bedaŭre sub la sankta skurĝo de la sorto". Kontraŭe, ilia vivo estis serena kaj baze fidforta, kiom koncernis ilian poezian mision. Tio povas esti pro ke la nomitaj poetoj elforĝis por si transcendan religion, sufiĉe taŭgan por ili respondon al la enigmo de la homa ekzisto. Ili estis pure-sencaj, neniel detale-rigidaj, Dikredantaj.

Marjorie Boulton estas E-isto nur de 1949j, tamen ŝia jama faritaĵo kaj ĉiamnaskema kre-potenco estas fenomeno de la plej signifaj gravoj. Lingve ĉi tiu verko rivalas la virtuozecon de niaj ĉefaj frazmanipulistoj. Firma-mane ŝi licence ekspluatas aŭdacajn verbigojn: vias, 160; dias 215-233; neniami, 232; jamas, 239. Si substantivigas ĉe formoj kiel: geeco, 20; seno, 246; ekso, 268; seo, 298. (Komparu: troo, poo, jeno).

Ni rekomendas mendi binditan ekzempleron, ĉar la broŝurita ne estas sufiĉe fortika por elteni longan, oftan uzadon, kiun ĝi meritas.—F.R.B.

## JULIAN STEINHAUS

Vidu: "British Esperantist", 11/61, p. 161, kaj 4/62, p. 241. Robert Mac-kay, 135 Pilton Avenue, Edinburgh 5, informas: Mi estas prez. de la Edinburgh E.-Societo, kaj antaŭ ne longe mi malfermis skatolon enhavantan plurajn trezorojn literaturajn. Inter ili estis la libro de Geoghegan (1889) kaj ankaŭ la libro de J. St. (1888). Ankaŭ estis la teksto de parolado, kiun Wm. Harvey legis al la Edinburgh E.-Societo je 20/12/33 pri la "Trezoroj de la Warden-Libraro".

## FOURTH LIST OF CONGRESS MEMBERS

(received too late for last number)

126. Miss A. Curtis (Tambourine N, Q'ld).
127. Mr. G. Mrongovius (Melbourne).
128. Mr. M. Fordham (Melbourne).
129. Mrs. M. Fordham (Melbourne).
130. Mr. F. McCrohan (Melbourne).
131. Mr. Kim Bastin (Melbourne).
132. Mr. G. Wilson (Melbourne).
133. Mr. H. Buswell (Adelaide).
134. Miss M. Lineen (Melbourne).

# THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Kompilita de RALPH HARRY and JOY GRANT

ENHAVO 1958-62

(Indikas paĝojn en la jaro 1958)

## Aŭstralia Kroniko

Adelaide	23, 31, 39, 118, 127, 136
Ararat	72
Brisbane	Ofte
Canberra	Ofte
Hobart	Ofte
Katoomba	113
Mackay	30
Malvern	80
Manly	118, 144, 161
Melbourne	Ofte
Moe	52*, 66, 80
Newcastle	191
Orient-Melburno	199
Perth	Ofte
Rockhampton	184
Seymour	120
Sydney	Ofte
Warragul	88, 135

## Aŭstralia Esperanto-Asocio:

### Informoj

Agentoj de la Libro-servo	51
"Atentu" (informado)	98
Aŭstraliaj Organizaĵoj	19
A.E.A. ĉe la 43-a Universala Kongreso	35
En la Lernejojn Kampanjo	67, 87, 105
Ekzamenoj—	
6*, 104, 163, 183, 195, 196, 201	
Regularo	115
Generala Kunveno	26, 68, 143
Konkurso Masel	26, 68, 73
Libroservo	30*, 51
Patrono (Lord Casey)	128
Prezidanto (F. Williams)	33
(R. L. Harry)	150
Pyke Ekzameno	6*, 162, 183
Sendu Ekzempleron (Kondiĉoj)	130
Statuto de A.E.A.	64a-d
Subtenu A.E.A.	132
Traduka Kurso	67
Zamenhof Centjara Jubileo	28*, 32, 41
Fonduso	28*, 46*, 53*, 25, 33, 40, 51
Koncerto	52
Speciala Numero de A.E.	46*
UNESKO	72

## Ĉefartikoloj

Dektria Kongreso—La Plej Granda kaj la Plej Esperiga	157
Esperanto and the Press	9*
Esperanto as a Literary Medium	189
Failure of the Philologists, The	77

Fifty Years of Esperanto in Australia and Brief Review of the Present Situation	133
Four Epochs of Esperanto, The	109
From Ideal to Actuality: From Project to Living Tongue	173
Gaja Kongreso en Rava Hobarto	61
I'm an Esperantist. Why?	181
In the Shadow of Machiavelli	21
Into the Schools	69
Jaro de Sukcesoj	117
Language May Kill (Flight Errors)	49*
Men and Machines—The Limitations of Science	37
Modern Man and the Esperanto Movement	125
Nylen, Paul	149
"Othello" in Esperanto	141
Pedagogues Parley in Perth	165
Points to Ponder	29
Professor Pei and the International Language	17*
Retoriko—by Dr. Ivo Lapenna	41*
Sciencaj Studoj	25*
Science and the Language Problem	101
70% of the World's Scientists Do Not Understand English	45
Stanford Scholar Probes Language Problem	197
Watching, not Working for the Triumph	93
Why Speak Esperanto and not English at our Congress?	33*
"Zamenhof, Creator of Esperanto"	85

## Citoj Pri Esperanto

Georgiev, V	204
Hanotaux, Gabriel	187
Hitler	187
Jack London	140
Wang Chang Fang	99
Watters, C.	204
Whatmough, J.	204

## Edukado

Diverslanda	150
Educational Value of Zamenhof's Gift to the World	12
Esperanto in Schools	32*
En la Lernejojn	69, 87, 105, 166
Film, "This Land Australia"	121
Greek Education Ministry	190

Tasmanian Education Department	
School Board Examination	148
Teachers—N.Z. Teachers' Assn	124
Universities — Address to University Students	154

### Esperanto-Movado (Historio)

Akademio de Esperanto	201
Australia, The Zamenhof Tradition in (H. Koppel)	16
Australia, The Zamenhof Centenary in (R. L. Harry)	18
Biblio, La Esperanta	180
Boirac, Emile	190, 201
Esperantisto, La (Jarkolektoj)	188
Four Essentials, The—	
Why Zamenhof Succeeded	116
Fujiwaseda, Dr. Chikao	196
Kearney, E.L. (Alicio en Mirlando)	188
Kio Okazis en Berne, 1913 (Zamenhof en Sinagogo)	148, 172
Life and Work of Ludovic Zamenhof (R. G. Robbins)	5
"Lasta Konfeso", La. Dro Privat	
Skribas	128, 162
Mangada	183
Salan, Georges	196
"Suda" v. "Rondo"	98
U.E.A. Delegates	183
William Barnes—Filologia Gramatiko	47*
W. T. Stead—"Ĉu Li Scipovis Esperanton?"	97
Zamenhof, Ludoviko (nepo de L.L.)	182, 195
Zamenhof and the Ideal of an International Language (F. Williams)	4
Zamenhof — Author, Translator and Pioneer of E. Literature (C. J. Caldera)	9
Zamenhof en Litovujo	128
Zamenhof, Creator of Esperanto	85
Zamenhof, the Organizer (K. Linton)	14
Zamenhof—Vizito al Bad Neuenahr	182

### Gazetoj kaj Esperanto

Australian Encyclopedia (1958)	132
Chicago Daily News	100
Le Monde (De Gaulle)	43, 187
Melbourne Herald	102
Paris-Normandie	152
Port Lincoln Times	38*

### Kongresoj Tut-aŭstraliaj

11-a (Melbourne)—Raporto	1*
-Statement of Receipts ktp.	52

12-a (Hobart)—Raporto	61-66
-Anoncoj	26, 29, 42, 37, 51
-Kongresanoj	35, 42, 52
13-a (Sydney)—Raporto	157-161
-Anoncoj	122, 131
-Kongresanoj	137, 143, 156

### Libera Forumo

Goering	174, 183
Kompetenteco	72
Oratoro por Jubileaj Koncertoj	72
Rilate Tradukadon (Fay Koppel)	155
Saluto al la Kongreso (W. Addis)	6*
(Fred Williams)	19*
(Jean C. Kempson)	29*

### Lingvaj Notoj

Administracio	49
aboli	49
abomeno	138
Adelaido	169
apel (aci) i	49
adheri/zio/renco/ziva	49
adreso	138
antaŭulo	91
arbojrande	137
bank-	49
Biblio, La Vortoj en la	98
book-ends	132
brainstorming	132
borderi	138
broŝuro	36
buŝo	138
ĉasta	138
Ĉinoj kaj Esperanto	24*
ĉi tiu	202
Commonwealth	203
Datindikoj	172
deklin (ac) i	49
diplomatia	49
dirigent	37*
dumpingo	49
ekvatoro	138
ekskluzivi/ludi	49
federacio	49
feminismo	138
Frazenigmo	68
geografio	49
geologio	49
geometrio	49
Grenkamp (el la Vortaro de)	138
idiomo/idiotismo	23*
Indonezio	148
inspekt	49
intendant	49
interesa	114
intoksigo	190
ITA-ITA	190
Japana Plendo	92
Kiel (modela/jn)	194
konfuzi/igi	90

Kritiko (Waringhien pri tradu- kaj) .....	124
koment (ar) i .....	49
konferanseoj .....	194
konvert .....	180
kooperado .....	92
kunikloj/leporoj .....	147
libro .....	36
Leonaj Versoj .....	37*
Literofteco .....	126
Malagrablaj Ripetoj .....	187
matrikulo .....	194
navig (ac) i .....	49
mizera .....	89
Novsudkimrujo/novsuduelso ..	147
past-ro/oro .....	194
"orvelki" .....	167
Poezio .....	195
popo .....	194
proleta .....	49
Propraj Nomoj .....	116
proprieto .....	92
Radikoj (Letero Albault-Burney)	182
redakti/cio/toro .....	49
Rimriĉo .....	43
ruli .....	37*
salti .....	138
service .....	37*
selekti .....	92
Sidneo .....	169
spontana .....	49
ŝmaci .....	138
Style (Kabe conquers) .....	190
teenagers .....	169
testo .....	92
tradukado .....	30*, 50*, 90
tur/o/i/isto .....	49
venen/iga .....	37*
vilao .....	169
virgino/ulino .....	76, 98
Vokaloj, Pri la .....	140
Vowels, How Many? .....	132

### Nekrologo

Blackmore, S-ino M. M. ....	79
Canuto, Prof. D-ro Giorgio .....	105
Fidge, Harold .....	136
Hirschel, Kurt .....	195
Kabe (Kazimir Bein) .....	126, 188
Lorenz, Francisko V. ....	16*
Mills, Norman Gibson .....	67
Privat, Edmond .....	200
Proctor, Elsie .....	30*
Stoop, Clare Elizabeth (N. Bauer) .....	96
Wajslblum, Marek .....	180
Webber, W. Hamilton .....	152
Williams, Fred .....	131, 138

<b>Poezio</b>	
Anonima .....	177
Gardisto, La (Rabinovic-Taja) .....	142
"Julio Cezaro" .....	131
Lanti (Joab Eliot) .....	100
Memore—1943 .....	150
Momenta Revo (Armand Su) .....	192
Sezona Signifo .....	102

### Prozo

Aŭtomatigo kaj Esperanto (D-ro A. Borman) .....	20*
Carl Bartel .....	48, 67
Delfi Dalmau (Gastartikolo) .....	83
Cino Renkontas Australianojn (Armand Su) .....	191
Esperanto in Commerce .....	196
Esperanta Biblio .....	44
Flugo en la Universon (Raketoj kaj Spacŝipoj) .....	155
Infana Prezo .....	92
Kulmino Mankas, La .....	21*
Legado .....	131
Mang-higieno .....	84
Mi kaj and Malamiko .....	43*
Nia Redaktoro Raportas .....	49
Noto pri la Literaturo de Nobla Malĝojo .....	99
Preskaŭ Mi Gajnis la Melburnan Pokalon .....	38*
Problemoj pri Varbado .....	108
Reĝo Venceslao .....	40*
Skribe Esprimu Vian Pensadon ..	100
Tra la Jarcentoj .....	198
Veteran Latvian Esperanto Scholar .....	50*
Vojaĝo per Esperanto en Eŭropo (F. V. Taylor) .....	113
Zamenhof, Esperanto kaj Ni (F. R. Banham) .....	11*

### Recenzoj

Amuzo per Science (C. Vivian) ..	169
Amara Pano (Josef Darvas) .....	8*
Angla Antologio (W. Auld & R. Rossetti red.) .....	6*, 22*
Astronomio (E. Resumo) .....	131
Bahaismo—La Religio de Paco (Lidja Zamenhof) .....	130
Batalo de l'Vivo (C. Dickens- L. L. Zamenhof trad.) .....	24*
Bela Subtera Mondo, La (Lean- der Tell) .....	114
Belarto .....	29*, 169
Bild-libro pri Bestoj (Daily Mail) .....	164, 180
Bofilino (Georgi Karaslavov) .....	95
Bulgara Prozo (Fremdlingva Literature) .....	153, 179
Bulgara Filmo .....	29*
Bulgario .....	82

Curso de Esperanto (A. C. Fernandes & H. M. Mendes) .....	55*	Kantoj por la Paco .....	37*
Ce Doktoro (D-ro Ante Graurina) .....	47*	Kien la Poezio? (B. Clark) .....	15*
Cina Antologio .....	177	Key to Esperanto .....	27
De la Dubo al la Kredo .....	129	Kiu Estas Patro Pio? (A. del Fante) .....	76
Daily Sketch Modern Boys' Annual .....	68	Kristana Agendo (F. C. Xavier) .....	194
Dialekto, Diĝlektiko (D. Dalmau) .....	97	Kvar Terminaretoj (Infanludoj, Radio, Muzika, Kudra kaj Tri-tika) .....	140
Economics of Silvio Gesell .....	170	Kulturaj Kajeroj (Gresillon) .....	150
En la Servo de la Legio .....	170	Lanti pri Sennaciismo (SAT) .....	137
El Kornvalo (A.B.C. Libro) .....	55*	Lernolibro de Oftalmologio (S. Kato) .....	178
Ekzistencialistaj .....	76	Liliputo (E. M. Prent trad.) .....	148
El la Vivo de Sentaŭgulo (von Eichendorff) .....	124	Lingvo kaj Vivo (G. Waringhien) .....	130
Elektitaj Poemoj (Castro Alves) .....	153	Manntalid 1703 .....	171
Elektitaj Versaĵoj (Georgo Deŝkin) .....	15*	Moderna Martiro (Inst. S. Kamilo) .....	170
Esperanta Traduko de la Malnova Testamento (D. B. Gregor) .....	91	Malsupra Silezio .....	137
Esperanta Resumo de la Stenologio kaj Stenografio (Dr. Dalmau) .....	130	Memorlibro (Zamenhofjaro) (UEA) .....	139
Esperanta Antologio — Poemoj 1887-1957 (W. Auld red.) .....	74	Mitten in Deutschland .....	84
Esperanto (Walter) .....	187	Memuaro pri Geografiaj Nomoj .....	90
Esperanto for Beginners (M. C. Butler) .....	27	Mirindaĵoj de Maria .....	170
Esperanto en Komerco (B. Vogelmann) .....	202	Mistero Minora (F. Szilagy) .....	36
Esperanto, the International Language .....	178	Monda Kulturo .....	194
Esperanto Disc .....	174, 187	Nekonatino, La (R. C. Muschler) .....	123
Essential Esperanto (W. A. Gething) .....	82	Nepalo Malfermas la Pordon (T. Sekelj) .....	106
Fabeloj de Andersen (L. L. Zamenhof trad.) .....	201	Nia Hejmo (F. C. Xavier) .....	123
Faraono, La (B. Prus—Kabe/K. Bein trad.) .....	8*, 13*	Nia Korpo (S. Nishi) .....	170
Faktoj pri Germanujo .....	137	Niko kaj Nina (J. F. Berger) .....	147
Fermentario (Ferriera) .....	186	Ni Legas Kaj Lernas (J. Supichova) .....	179
Folioj el la Bildolibro de Dio .....	36	Nova Civito .....	178
Geografia Revuo .....	8*, 147	Nova Ezopo (S. Urban) .....	193
Grand Dictionnaire Esperanto—Français (Granda Vortaro E-F) .....	8*, 203	Nur Tri Koloroj (E. Urbanova) .....	153
Hungara Fervojista Mondo .....	187	Official Handbook (Stoke-on-Trent) .....	107
Hungara Vivo .....	170	Othello (Reto Rossetti trad.) .....	141, 192
Idolo Plej Longe Vivanta (Spirit-scienca Institute de Martinus) .....	170	Patro de la Lepruloj, La (A. Decorte) .....	129
Infanoj ne Konas Limojn (Fotoj) .....	171	Pinta Kraĵono (R. Rossetti) .....	82
Japanaj Fabeloj (Amo-Akademio) .....	14*	Planlingvaj Problemoj (W. Gilbert) .....	67, 105
Jarlibro de S.A.T. .....	123	"Pluk" (Poul Thorsen) .....	154
Jozefo (J. D. Applebaum) .....	13*	Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj .....	74
Juĝu Mem (Pri Ĉeĥoslovakio) .....	90, 186	Popola Ĉinio, El .....	16*
Junaĝa Verkaro (E. Privat) .....	179	Pri la Vortfarado en Esperanto (J. R. Isbrucker) .....	76
Kiel Aŭtodidakto al Pedagogia Scienco (K. Wiczorek) .....	147	Profeto, La (K. Gibrán) .....	194
Kanako el Kananam (K. Linton) .....	81, 90	Proverbaro Esperanta (L. L. Zamenhof) .....	180, 194
		Reĥoj .....	171
		Reĝo Edipo (Sofoklo — D. B. Gregor trad.) .....	91
		Retoriko (I. Lapenna) .....	41*, 54*
		Sageoj kaj Rakontoj Laŭlonge de l'Rejno (J. Pagenstecher) .....	147
		Sankta Godelieve, La (St. Camillus) .....	130

Scienca Revuo .....	172
Sennacieca Revuo .....	23*, 14*, 75, 90
Songe sub Pomarbo (J. Baghy) ..	53*
Specimene (H. Baupierre) ..	194, 202
Sud-Tirol (H. Steiner) .....	107
Sekretoj de la Marestajoj (P. Guino) .....	145
Stupoj sen Nomo (B. Ragnars-son) .....	81
Taglibro de Anne Frank (G. J. Degenkamp trad.) .....	81
Teatro (Machado de Assis—Brazila Ligo de Esperanto red.)	75
Technical Glossary for Builders in Esperanto .....	92
Tempesto Super Akonagvo (T. Sekelj) .....	82
Tragedio en la Universo .....	137
Turo de Londono, La (S. Nacume) .....	153
Trifoje Akurate je la Dekdua Horo (W. Galdart) .....	123
Topaze (M. Pagnol) .....	146
Unua Vojaĝo de Gulivero. Lili-puto (J. Swift—E.M. Prent trad.) .....	164
Unufingraj Melodioj (W. Auld)	193
Vegetarano (Andriu) .....	187
Verda Raketo, La (J. Forge) ..	148, 164
Vojaĝo al Kazohinio (S. Szath-mari) .....	27
Vivo de la Plantoj, La .....	8*
Virino de la Landlimo (M. Boul-ton) .....	105
Vitrilo (J. I. Francis) .....	139
Voĉoj de Paco (Oakville Press)	164
Vortaro Franca-Esperanta .....	203
Woerter der Gegenwart (H. Wingen) .....	203
Yearbook of U.E.A. .....	26*
Zamenhofa Esperanto, La (De Hoog kaj aliaj) .....	185
Zamenhof, Creator of Esperanto (M. Boulton) .....	85
<b>Redakciaj</b>	
Australia Kroniko 1957-60 .....	104
Australian Humour .....	94
Biblio en Esperanto, La .....	83
Cart, La Diro de .....	176
Counsel (Raising the General Language Level) .....	76
Esekonkurso (Skolta E. Ligo) ..	123
El la Letero al (Pri Ĉiuj Temoj)	31*
Honeste, Ni Petas .....	35
Mallongigoj .....	196
Naŭ Futoj (Enhavo de A.E.) .....	131

Neutile, Amikoj (Petoj aperigi anoncojn pri okazontaj festoj)	123
Is Your Club a Secret Society? ..	45*
Penfriends .....	16*
Philumenists .....	84
Presindajoj .....	56*
Press and Esperanto .....	198
Pri la Ironio .....	176
Represoj .....	204
Save Your Paper .....	34*
Sendu Ekzempleron .....	131
Who's Who (Projekto de J. R. Perez kaj H. Jakob) .....	26
Winnie-the-Pooh and Alice in Wonderland .....	176

### Tra La Mondo (Uzo de Esperanto)

Africa .....	45
Albania .....	35
Anglujo .....	116, 171
Austria .....	128
Argentina .....	204
Belgium .....	128
Brazil .....	30*, 78
Bulgarujo .....	100, 188, 195, 204
Canada .....	36*, 183
China .....	177
Czechoslovakia .....	187
Danlando .....	31*, 80, 100
Esperanto or Zamenhof Streets ..	133
Essen .....	86
Estonia .....	32*
Finland .....	116
France .....	128, 185
German Democratic Republic .....	188
Germanujo .....	32*, 97
Hispanujo .....	24*, 37*, 188
Holland .....	45, 128
Hungary .....	128, 185
Iberio .....	156
Indonezio .....	148
Italujo .....	45, 128, 28*
Japan .....	167, 200
Kubo .....	202
Malta .....	20*
New Zealand .....	24, 122
Nigeria .....	122
Norvegujo .....	32*
Polujo .....	43, 88
Portugalujo .....	188
Rumania .....	43
Sovetunio .....	16*, 34, 124, 140, 168
Svedujo .....	32*
UNESCO .....	19*, 32*, 44, 50-51
Universala Posta Unio .....	122
Unuigintaj Nacioj .....	47*, 34
Urugvajo .....	102
Vietnam .....	172



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 39 (119)

MELBURNO

Mar. - Aprilo, 1964

---

## BELAJ KONGRES — TAGOJ

D-ro Jim Cairns malfermis la 14-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson.

Melburno havis la honoron gastigi la 14-an Kongreson, kiu okazis de la 30-a de Dec. 1963 ĝis la 5-a de Jan. 1964. Multe kontribuis al ĝia granda sukceso la fakto ke nun ekzistas en Melburno du Esperanto-Klubo: la malnova "Melburna E-Societo" kaj la juna, tre vigla "Esperanto-Klubo por Orientaj Antaŭurboj". La Kongres-Komitato (E. McKenzie, Prez.; M. Leereveld, Vic-Prez.; Herbert Koppel, Sekr.; K. Linton, Kasisto; S-ino M. Sanders, Koncerto; D. Kane, Junul-Aferoj; S-ino I. Fink kaj S-ro S. Milligan) multe laboris por sukcesigi la Kongreson.

Ĝi okazis en la Konferenc-Halo de la Eduka Asocio por Plenkreskuloj, kie Ges-roj S. Milligan instalas grandegan libro-standon kaj cetera vendis librojn por proks. £100. Aliĝis 143 gesamideanoj, el kiuj 122 fakte partoprenis la kongreson. Ili venis el ĉiuj 6 ŝtatoj de Aŭstralio kaj krom denaskaj aŭstralianoj partoprenis samideanoj kiuj naskiĝis en 12 diversaj landoj, ĉefe enmigrintoj el Eŭropo.

### Komenciĝo de l' Kongreso

Ĉiuj lokaj gazetoj, radio- kaj televido-stacioj estis invititaj al speciala konferenco, kio rezultis, ke bonaj artikoloj pri Esperanto kaj intervjuoj kun gesamideanoj aperis dum la kongres-semajno. Sed Televido-Stacio ABV-2, kiu sendis stabon da raportistoj—fotografistoj—teknikistoj al la "Bonveniga Posttagmeza Teo" (30/12)

transformis en mallonga tempo la kongresejon en veran ŝvitbanejon.

La "Interkonatiga Vespere" (samvespere) donis ne nur eblecon al multe da babilado en la kara lingvo, sed prezentigis ankaŭ varia programo. Bedaŭrinde la tri ĉef-aktoroj por la vespero mankis: Volo Guetling, Fritz Mueller-Sorau (Sydney) kaj D-ro Ross Robbins (Canberra) kune veturis aŭtomobile al Melburno. Sed en Benalla (Vic.) la malnova aŭtomobilo de Volo strikis kaj rifuŝis pluen iri eĉ colon. Do, la trio devis tranokti en Benalla. Fritz kaj D-ro Robbins devis fervoje daŭrigi la vojaĝon al Melburno, dum Volo restis por aranĝi la aĉeton de nova aŭtomobilo, per kiu li alvenis en Melburno post preskaŭ 30-hora malfruigo.

### Malfermo de la kongreso

La Solena Malfermo okazis la 31-an de Dec. Post bonvensalutoj de la A.E.A. Prezidanto (D-ro Ross Robbins), malfermis la kongreson D-ro Jim Cairns, Melburna Deputito en la Federacia Parlamento. Kvankam ne-Esperantisto, D-ro Cairns montris sin bone informita pri la celoj de nia movado kaj li speciale emfazis ke la idealoj de D-ro Zamenhof multe kontribuas por pacigi la nunan maltrankvilan mondon. Nome de la kongreso D-ro Ross Robbins transdonis al D-ro Cairns la anglalingvan eldonon de la libro "Zamenhof" de Marjorie Boulton.

Sekvis nun la salutoj de la reprezentantoj de la aŭstraliaj Esperanto-societoj kaj de la internaciaj organizoj, kiuj havas delegitojn en Aŭstralio. S-ino V. Fraser, Prez. de la Redcliffe E-Klubo (Kvinslando), raportis de ŝi sukcesis persvadi la urbestaron de tiu ĉarma marborda urbeto nomi novan straton "Esperanto Avenue". Tio estos la unua strato en Aŭstralio nomata laŭ nia lingvo.

Du studentinoj de la Melburna Konservatorio prezentis belan muzikon dum la malferrna ceremonio, kiu finiĝis per komuna kantado de "La Espero" kaj fotografado.

Vespere, ĉiuj kongresanoj veturis al la bela hejmo de Ges-roj J. Ryding en Sandringham por partopreni Jarfinan Feston kaj "Barbecue". Ges-roj Ryding meritas la dankojn de ĉiuj kongresanoj pro la grandega laboro kiun ili faris por sukcesigi la feston. Ke subita pluveto pelis nin for de la belega ĝardeno en la domon, ne multe ĝenis la pli ol 100 festantojn. S-ano Jim Dimo kaj F-ino Jennifer Clack el Ballarat gajigis la ĉeestantojn dum la tuta vespero per bela akordionmuziko, kaj "serĉisto" Robbins kun helpanto Mueller-Sorau zorgis por multe da ridado.

### La Nov-Jara Tago

Dum sunbrila mateno aŭtobuso portis kongresanojn al la Caulfield Grammar School, kie Ges-roj Leereveld montris al ni tiun interesan lernejon. La Lingva Laboratorio kaptis nian ĉefan intereson. En tuta Aŭstralio ekzistas nur 3 similaj "laboratorioj", per kiuj oni povas instrui kelkajn lingvojn samtempe, uzante sonrubandojn, aŭdilojn kaj mikrofonojn.

Sekvis la Anglikana Di-Servo en la tre proksima St. Mary's Preĝejo, gvidita tute en Esperanto de nia konata samideano Pastro C. Cowling. Tiu Di-Servo estis unu el la elstaraj aranĝoj de la kongreso kaj multe impresis la divers-religiajn ĉeestantojn; speciale la prediko en kiu Pastro Cowling interplektis citaĵojn el la Biblio kun tiuj de D-ro Zamenhof.

Pluen iris la aŭtobuso al St. Kilda, laŭlonge de la marbordo, ĝis ĝi haltis ĉe McClure's Restoracio por lunĉo. Jen unika restoracio, tute temperaturkontrolita, kie oni mendas manĝaĵojn ne de kelnero, sed per telefonoj sur ĉiuj tabloj per kiuj oni rekte parolas

al la kuiristo. Post agrabla lunĉo la kongresanoj veturis al la fama Melburna Botanika Ĝardeno, kie sub la profesia gvidado de S-ro W. Chandler kaj D-ro Robbins ili inspektis la multajn interesajn kaj belajn plantojn.

### Prelegaro

Interesaj prelegoj estas ĉiam farataj ĉe niaj kongresoj kaj la lasta ne estis escepto. Elstare estis la 2 prelegoj de nia malnova angla verkisto Len Newell (Adelaide). Dum li klarigis "Kio estas la poezio" (1/1), ilustrante per legado de versoj ekde la plej simpla poezia "esprimo de emocio" de primitivaj popoloj ĝis la altgrada verkarto de Alexander Pope k.a., li ravis per sia flua, belsona Esperanto, bonstila, sed neniam malfacile komprenebla. La saman facilan parolmanieron montris la 2-a prelego "La Traduk-Arto" (3/1), kiu priskribis la grandan progreson ĉe tradukmaŝinoj; prognozis ankoraŭ pli grandan sukceson, sed ne malesperigis pri la estonteco de Esperanto, kiu certe pro ĝia precizeco trovos rolon eĉ inter la tradukmaŝinoj.

Nia redaktoro, S-ro F. R. Banham, kontribuis 2 interesajn prelegojn "Al pli penetra propagando" (2/1) kaj "Zamenhof kaj Ni" (3/1). S-ino P. Hanks (Melbourne) parolis pri la temo "En la aŭstralia naturo" (2/1), dum S-ro Hanks projekciis belajn memfaritajn diapositivojn sur la ekranon kaj eĉ imitis kriojn de diversaj birdetoj en la arbaro. D-ro Ross Robbins (Canberra) prelegis, kun lumbildoj, pri "La ridetanta Tajlando" (1/1), ĉarma lando kiun li lastjare vizitis. Fritz Mueller-Sorau (Sydney) parolis pri la iom metafizika temo "Kaŝmo, la bona leĝo" (2/1).

### Labor — Kunsidoj

Okazis tri A.E.A. kunvenoj kaj po unu U.E.A., S.A.T., Junula, Geografia kaj Instruista fakkunsidoj.

La ĝisnuna A.E.A. Prezidanto D-ro Ross Robbins (Canberra) prezidis la A.E.A. kunvenojn. La Sekretario, S-ro Herbert Koppel (Melburno) donis la raporton pri la agado de la Asocio dum 1962/63. Li raportis pri la fidela laboro de S-ro F. R. Banham, kiu redaktas nian gazeton, pri la laborplena agado de S-ino I. Milligan por la Libro-Servo, kiu pro ŝia sindona laboro havis £170 profiton en

1963 kaj pri la konsciencia ekspedado de nia gazeto flanke de F-ino V. Cox. Sed, S-ro Koppel diris, se nia Asocio ŝuldas specialan dankon tiam estas al nia kasisto S-ro Ken Linton, kiu dediĉas multajn horojn al la registrado de la membroj kaj al la zorga enkasigo kaj kvitanĉado de la kotizoj; krome S-ro Linton agis ankaŭ kiel Sekretario de la Ekzamen-Komitato. (Aplaŭdo) Kun bedaŭro la kunveno aŭdis ke nia altŝatata D-ro C. C. Caldera, kiu dum kelkaj jaroj tiel entuziasme plenumis la postenon de Ĉef-Ekzamenisto, nun deziras transdoni la postenon al pli juna persono. La Ekzamen-Komisiono elektis S-ron L. N. M. Newell (Adelaide) kiel Ĉef-Ekzameniston.

La kasraporto de S-ro Linton montris kontentigan staton de la financoj, sed ke ni bezonus pli da membroj por pli ofte aperigi la "Aŭstralian Esperantiston".

Vigla diskuto okazis pri diversaj proponoj. S-ro Koppel proponis dekreton "Honorinsigno" aŭ "Honor-medalo" por honori tiujn Esperantistojn kiuj faris elstaran kontribuon al la aŭstralia movado. La plimulto de la ĉeestantoj malakceptis tiun proponon, ĉar ili opiniis ke Esperantisto ĉiam devas sindone labori por nia movado eĉ sen espero gajni "Honorinsignon". D-ro Robbins, subtenita de S-ro Newell, proponis ke A.E.A. donacu £625 al U.E.A. por nomi ĉambron "Aŭstralia Ĉambro" en la U.E.A.-domo en Rotterdam. Forte kontraŭstaris tiun proponon S-ro Koppel, kiu proponis ke anstataŭe ni kreu Esperanto-Domon en Perth aŭ en Canberra. La propono de D-ro Robbins estis akceptata per 26 kontraŭ 11 voĉoj. Proponon pri la aranĝo de ĉiujaraj ŝtataj kongresetoj (S-ino Fink kaj S-ro Maddern) la kongreso akceptis kaj ĝia efektiviĝo nun dependas de la ŝtataj kluboj. (Viktoriaj jam decidis kunveni je Pasko 1965 en Morwell).

Elektiĝis la jena nova estraro: Prez.: S-ro M. Leereveld (Melbourne); Vic-Prez.: D-ro Ross Robbins (Canberra) kaj S-ro F. Taylor (Melbourne); Sekr.: S-ro H. Koppel (Melbourne); Kasisto: S-ro K. Linton (Melbourne). (Ĉiu aliĝinta organizaĵo ne reprezentata en la Estraro rajtas elekti po unu estrarano.) D-ro Robbins petis ke oni ne reelektu lin kiel Prezidanton, ĉar li intencos organizi la venon-

tan landan kongreson en Januaro 1966 en Canberra kaj sentas ke li ne havos la tempon por plenumi du taskojn. Tiun peton la kongreso respektis kaj bonvenigis kun aplaŭdo la decidon aranĝi la venontan kongreson en la federacia ĉefurbo.

Multipromesa por la estonto estis la junula fakkunveno. S-ro D. Kane raportis pri siaj ĝisnunaj kontaktoj kun TEJO, kaj la ĉeestintaj junuloj decidis fondi la "Aŭstralian Esperantistan Junularan Asocion" kaj aliĝon al TEJO. Elektiĝis la jena komitato: Prez.: F-ino Georgette Fink; Sekr.-Kasisto: S-ro D. Kane; Estraranoj: F-ino Marg. Fink; S-roj I. Heldzingen kaj M. Forster. La A.E.A. Estraro decidis doni £25 subvencion al la Junulara Asocio.

La instruistan fakkunvenon prezidis S-ro Leereveld. La Sekretario-Redaktoro S-ro I. Maddern donis tre kontentigan raporton. Li speciale menciis la metodan laboron de la kasisto, S-ro A. Fridenbergs, kaj opiniis ke la kaŭzo de la sukceso dum la pasintaj 2 jaroj estis la regula eldono de "Klerigo", la kvaronjara bulteno de la A.E.S.I. La nova estraro: Prez.: S-ino G. Pollard (Perth); Vic-Prez.: S-ro M. Leereveld (Melbourne); Sekr./Kasisto: S-ro I. Maddern (Morwell); Redaktoro: D-ro A. Fridenbergs (Melbourne). Ŝtataj reprezentantoj: F-ino G. Fink (Melbourne), S-roj F. Mueller - Sorau (Sydney), G. Lancaster (Hobart), S. Grant (Port Lincoln), S-ino A. Sedgley (Perth).

### Fino de l' Kongreso

Sabatan (4/1) matene D-ro A. Fridenbergs faris festparoladon en kiu li skizis la evoluon de Esperanto ekde ĝia apero ĝis al la nuna stato kiel grava interhoma kaj kultura faktoro. La "Geografian Horon", posttagmeze, prezidis S-ino I. Fink kaj lumbildparoladis S-ro W. Chandler (Sydney).

S-ro V. Gueltling anoncis la rezulton de la Internacia Konkurso por la plej bela aŭ interesa saluto al la kongreso. Alvenis granda nombro da salutoj, kiuj estis ekspoziciataj en la kongresejo. La unuan premion (£5) gajnis la Junulara Esperanto-Rondo "Guto en Maro" en Nowy Sacz (Pollando) per luksa bildlibro de Varsovio, tute en Esperanto, en

belege afrankita koverto. Dua premio (£2): F-ino Nora Hartwich (Frankfurt, Germanujo) "Plumvireto", tute farita el prunoj, figoj kaj nuksoj. La 3-an ĝis 5-an premion (po £1) gajnis S-ro Ivan Bril, Ĥarkov, USSR. ("Kantoj de Sovetaj Komponistoj"); S-ro S. Duin, Haarlem, Nederlando (ilustrita bildlibro pri Haarlem); F-ino Maria Vari, Miskolc, Hungarujo (bildsalutoj afrankitaj per la hungaraj Esperanto-poŝtmarkoj).

En sia fina parolado Dr. Ross Robbins dankis la Melburnanojn pro la granda laboro farita por organizi ĝindan kongreson. Li transdonis, nome de A.E.A., donacojn al merituloj: vekhorloĝeton al S-ro K. Linton (kasisto), tualetilaron al S-ino I. Milligan (Libro Servo) kaj perlan broĉon al F-ino V. Cox (gazet-ekspeĉado). Li invitis ĉiujn ĉeestantojn nepre veni en Januaro 1966 al Canberra por partopreni la 15-an kongreson.

#### Distra Programo

Okazis 3 aŭtobusaj ekskursoj: Urbekskurso (31/12); Vizito al la Chadstone Komerca Centro (2/1) kaj tuttaga ekskurso al la bestrezervejo en Healesville (5/1).

La registara Esperanto-Filmo "Jen Aŭstralio" prezentigis je 3/1; samvespere S-ino I. Fink montris memfaritan filmon pri la agado de la E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj. Proks. 150 personoj plenigis la "Memorial Hall" en la YWCA je sabato (4/1) por ĝui muzikan vesperon. La programo, aranĝita de S-ino M. Sanders, inkluzivis niajn elstarajn akordionistojn Jennifer Clack kaj Jim Dimo. Ĝuindaj por Esperantistoj estis ankaŭ la belaj E-kantoj de S-ino D. Thyer (filino de S-ro F. Taylor) kaj la magiaĵoj de D-ro Robbins.

#### KONGRESEĤOJ

Parolado de D-ro Ross Robbins, en la 31a de Decembro:—

"Kun la paso de ĉiu jaro Aŭstralio sin movas pli kaj pli al internacia mondloko. Ni nin trovas pli proksimaj al nove difinitaj najbaroj; ne plu ni estas izolitaj geografie; ne plu ni senatentas transmarajn aferojn, sed ni jam formas parton mem de Suda Azio. Kontraŭ ĉi tiu fono estas ja interese, rimarki, ke oni nun rekomendas instruadon de la Japana kaj Indonezia lingvoj en niaj lernejoj.

"Jen bona signo, ke eĉ en Aŭstralio oni nun pli atentis pri la lingva problemoj; ke oni nun vidas, ke lingvoj estas praktikaj iloj al kompreno kaj kunvivado kun aliaj popoloj. Tamen se persono lernas la lingvon 'bahasa Indonesia' aŭ la Japanan, li parolas nur al unu el niaj proksimaj najbaroj. Eĉ por fari tion li devas sin dediĉi al multe da studado. Certe, majstru la Indonezian kaj vi povos paroli al mutaj homoj tra suborienta Azio. Elspezu kelke da studjaroj, ellerninte la Japanan, kaj vi povos komuniki kun Japanoj. Sed ĉu vi povos paroli al la mondo?"

"Dum la milito, kiam mi deĵoris en Egiptujo, mi kapablis iome paroli la Araban lingvon. Poste la fronto sin movis al Italujo. Kiam mi atingis Italujo mia scio de la Araba estis tute senutila. Denove mi estis senparola kaj devis ekstudi novan idiomon antaŭ ol mi povis senti min ano de la komunumo.

"Pri mia scio de Esperanto—jen alia afero! En la Araba mondo mi multe uzis Esperanton, kaj nun en Italujo ĝi ankoraŭ utilis. Esperanto transsaltis la landlimojn, kaj per ĝi mi baldau trovis Italajn amikojn.

"Ni Esperantistoj penpacience stariĝis monumenton al nia celo, nome, provizi komunan rendevuon por ĉiuj najbaroj de la mondo pere de unu sola facila helplingvo. Kiam lingvisto parolas, li komunikas nur al tiu grupo kies lingvon li lernis. Kiam Esperantisto parolas, li parolas al la mondo. La diverseco de lingvoj forte farindigas provan enkondukon de Esperanto en niajn lernejojn. Post malpli ol generacio ni povus pruvi niajn preteĵojn".

#### DISERVO ĈE ST. MARY'S

Iris el la preĝejo unu tieano en kies kapo kirlis la jenaj pensoj kaj impresoj. Pastro Cowling havis tekston: 1 Kor. 13.

Esperanto servas kiel perilo ne nur inter homoj kaj kulturoj, sed, pli vaste ĝi celas krei interkomprenon inter popoloj mem—popoloj ofte kun diversaj kulturoj propraj al si. Nia idealo ja estas: unu granda ronda familio de ĉiuj popoloj en konsento. Tio realiĝos nur pere de Amo, pri kiu tiel perle parolis la Apostolo.

Zamenhof, ĉe la Kembriga Kongreso 1907 diris: ". . . krei ponton inter la popoloj . . . devas esti ĝuste la esenco de niaj kongresoj". La figuro de "ponto" aplikinda al Esperanto estas vera en alia kaj tre signifa senco. Sur malnova ŝtono ĉizis Arablingve iu Islamano, Jozef: "La mondo estas ponto. Transiru ĝin, sed ne konstruu loĝejon sur ĝi."

Cio tera estas efemera; sur la ponto de l'vivo ni iras de unu loko al alia, de unu ekzistostato en alian. Esperanto estas ponto konstruita por servi al provizora mondo, kiu mem estas ponto ne eterne daŭranta.

La Apostolo antaŭdiras, ke venos epoko, kiam ĉiesigis lingvoj, kune kun profetado, scio kaj ĉiuj ceteraj homaj atingoj kaj kapabloj. Sed Amo—nur ĝi—neniam pereas.

"Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan urbon . . ." "La surtera loĝejo disolvigis . . . ni havas domon eternan".

## Australia Kroniko

● **BRISBANE:** 12/12 okazis la Zamenhofa Festo en la bela nova kampara domo de Ge-sroj Grant. Ĉeestis proksimume 15 personoj, kaj kantoj, babilado, kun bela vespermanĝo, kontribuis al plensukcesa Festo. S-ro K. D. Gunster dankis pro la gastemeco de Ge-sroj Grant, samtempe dankante ĉiujn helpantojn pri instruoj kaj senlaca laboro dum la pasinta jaro. La laborjaro por 1964 komenciĝis frue en Januaro, kaj estas atendite ke plua progreso kaj alveno de novaj lernantoj kuragiĝos la Estraron.

● **REDCLIFFE, QLD.:** Bonsukcesa Festo denove havis lokon ĉe S-ino V. Fraser (12/12). Ĉeestis 30 personoj, kaj kantoj, konkursoj, kune kun bela Kristnasko-arbo, el kiu ĉiu persono ricevis donacon, helpis fari grandan sukceson de la Festo. Lerte verkita teatraĵo de S-ino Fraser okazis, kaj verkinto kaj la tri roluloj ricevis fortan aplaŭdon.

Honorgastoj, la Urbestro de Redcliffe kaj lia edzino S-ino Houghton, ĉeestis, kaj S-ro Houghton faris tre gravan anoncon dum li alparolis la gastojn. Pro intensa propagando fare de S-ino Fraser, la Urbestro tiom firme konvinkigis ke en Esperanto kuŝas la solvo de la lingvo baro, ke

li proponis al la Konsilantaro ke nova strato apud la konstruota hospitalo estu nomata honore al Esperanto, kaj la Plena Kunsido de la Konsilantaro senhezite akceptis la proponon. La nomo estis tuj enskribita en la protokolon.

Tiu ĉi nomigo de strato honore al Esperanto estas la unua kiu troviĝas en lando kies nacia lingvo estas la Angla, kaj dankante la Urbestron kaj Konsilantaron, la Delegito por Brisbano esprimis ankaŭ la dankojn de la tuta Espist-aro, aldonante ke tre taŭge estas ke la loko, Redcliffe, kie komenciĝis la konstruado de tia granda urbo kaj poste la grandega Ŝtato, Kvinlando, ankaŭ estas la unua inter anglo-parolantoj nomi straton honore al nia lingvo.

La movado multe ŝuldas al la Urbestro, S-ro Houghton, kaj Konsilantaro. Dece estus sendi al ili gratulojn kaj dankojn (en Esperanto) pro tiu ĉi ago. Ankaŭ salutinda estas S-ino V. Fraser, en kies ŝuldo la Esperantistaro ĉiam restos.

La nova strato portas la nomon Esperanto Avenue.—S.L.P.

● **MELBOURNE.** — Esperanto Klubo De Orientaj Antaŭurboj: Post la Kongreso okazis nia unua monata Societa Kunveno (6/2) en la hejmo de S-ino Fink. La unua klubkunveno (semajna) okazis 13/2 jam en nia nova klubejo (Mt. Waverley Stata Lernejo). 19/2 kunvenis la STUD-grupo, kiu okazos ĉiumerkrede de 8-9. Sekvos ĝin klubkunveno kun prelegantoj pri div. temoj.

Kurso por komencantoj kun 8 lernantoj okazas ĉiujauĝe je 7.30-8.30 vespere. 27/2 prelegis S-ino M. Sanders; 4/3 S-ro Baines pri La Vivo de Plantoj.

6/3 estis elektitaj: Reelektitaj, S-ro Milligan (prez.); S-ino Smith (vic-prez.). S-ro Peter Priestley (novelektita) dua vic-prez.; S-ino Fink (sekr.-kasisto); S-ro Alan Edmunds (novelektita), bibliotekisto; kaj membroj de la estraro S-ino Sanders (protokolanto) kaj novelektita S-ro L. McLochlan.

18/3 Ge-sroj S. & I. Milligan distris nin per mapoj kaj diapozitivaj pri sia vizito al Canberra kaj Sydney. 27 klubanoj enskribiĝis al la 14a Kongreso. Ankaŭ en preparo estas nova teatraĵeto.—Iren Fink.



D-ro Jim Cairns malfermas la kongreson.



Ĉe la malfermo: De maldekstre al dekstre: S-ro I. Maddern (Morwell), S-ro E. McKenzie (Melbourne), S-ro J. Matasin (Sydney), S-ro K. Linton (Melbourne), S-ro M. Leereveld (Melbourne), S-ro H. Koppel (Melbourne), D-ro Ross Robbins (Canberra).



### LA KONGRESANARO

The zinc plates for these Congress photographs were generously given by Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Treasurer, Mr. Ken Linton.

● **SYDNEY.**—(29/7 - 31/12). Tri-foje prelegis S-ro F. Dunn: "Herooj ebria je Dio": la Portugaloj venas al la Oriento"; "Mezepokaj libroj kaj medio"; "La Lingva Problemo en Indonezio". Dufoje S-ro W. Chandler: "Miksita historio"; "Rememoroj pri evoluiginta socio". S-ro S. Drake: "Ni ĉiuj estas fantazioj"; "Kelkaj spertoj de farmacia vivo". S-ro T. Elliott pri "Televido en medicino". S-ino M. Duncan parolis kun helpo de lumbildoj pri "Specialaj lernejoj por infanoj kun difektoj: la Spastic (spasmula) Centro de Manly; estis aliaj bonaj prelegoj. S-ro P. Laufen parolis pri "La Ekonomia de migrado"; S-ro V. Guelting pri "Naturkatastrofoj"; S-ro R. Springer pri "Kokinaj aferoj"; S-ro J. Matasin pri "Huna: sekreta doktrino".

D-ro R. Robbins montris lumbildojn pri botanika ekskurso al Nova Kaledonio kaj poste mistifikis per iluziaĵoj. F-ino M. Hocking lumbilde informis pri Londono kaj Anglujo; S-ro F. Mueller-Sorau donis programon de gramofondiskoj pri "Kantistoj" kaj, ĉe sia hejmo, "La Piano kaj la Pianisto: muzika posttagmezo", kiu enspezis por la klubo iom da profito. S-ro F. Franjic: "Gramofondiskoj: slavaj kaj aliaj"; S-ro V. Guelting; "Vivanta Leksikono"; S-ro V. Bourlin: "Forumo". Oportunvendado (S-inoj Parker, Morrison; Browne, Matasin, F-ino Hocking k.a.) enspezis £23.

Ĉe la Zamenhofa vespero S-ino K. Burrow prelegis Angle pri La Homaj Rajtoj; S-ro Guelting deklamis; S-ro Chandler rakontis spertojn pri Esperanto; S-ro Mueller-Sorau kaj S-ro Guelting ludis skeĉon: Kvizludo; S-ro Dunn legis tradukon el Malaja romano. Oni muzikis.

Ni preparis regularon por poŝta servo biblioteka al izolaj E-istoj. Pri tio skribu al la klubo, 143 Lawson St., Redfern, N.S.W.—F. M. Dunn.

● **MANLY.**—La verda standardo altiris atenton ĉe Shelley Beach, Manly (19/1) kiam ni tie renkontiĝis por piknike lunci, naĝi, sunbani kaj gaje babilu ĉe la marbordo. Poste, dum Katrina ludis la gitaron, ni kantis komune. Ni tetrinkis en la apudmara hejmo de S-ino Duncan. Je 16/1 en la kantino de "Manly Daily" Ges-roj P. Schwerin regalas nin per interesplena raporto pri la 14-a Aŭs-

tralia Kongreso en Melburno. Dimanĉon, 16-a Feb. ni kunvenis en la hejmo de Brenda Cooley, piknikis, naĝis kaj muzikis. La 3-an datrevenon de la fondiĝo de nia klubo ni festis dimanĉe, 15/3, ĉe la hejmo de S-ino Enid MacGillivray. Ĉiu ĉeestanto kontribuis eron al la programo.

Ĉiujāude okazas paroligaj kunvenoj en la Vespera Kolegio de Manly. Kultura Vespero okazis 23/1 kiam S-ino Schwerin deklamis poemojn kaj F-ino Cardale parolis pri dramoj. "Diversaj Aspektoj de la E-Movado" estis la temo de nia kunveno de la 30/1. S-ro Schwerin parolis pri spertoj de Fakdelegito, F-ino Henderson pri la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj, S-ino Forrest pri "Esperanto por Handikapitoj", S-ino Schwerin pri "Skoltoj kaj la Internacia Lingvo" kaj S-ro K. Smith pri "Ekumenismo". 13-a Feb.: Diskuto pri ekzamenoj kaj korespondaj kursoj (S-ro Schwerin), 20/2 "Alilandaj Aferoj" (Anoj legis leterojn aŭ artikolojn pri diversaj landoj); 27/2 okazis denove "Kultura Vespero": S-ino Bedwell legis Svedan poemon, S-ino Schwerin parolis pri "Roma Civilizacio", S-ino Cooley pri "Teatro de la Aŭstraliaj Indigenoj", F-ino Cardale legis poemojn de Longfellow kaj S-ro K. Smith pri "Kulturaj kontaktoj inter Okcidento kaj Oriento."

Kursoj okazas denove en la Vespera Kolegio de Manly: F-ino Cardale instruas komencantojn merkrede kaj S-ro K. Smith la progresintojn lunde. "Esperanto Corner" aperas ĉiusemajne en "Manly Daily". Nia klubo decidis doni financon helpon por la "Aŭstralia Ĉambro" en Rotterdam.—Marjorie Duncan.

● **CANBERRA.**—The 12th annual general meeting took place in the new clubrooms at the Friends' Meeting House, Turner, on Feb. 13th.

Officers elected for 1964 are: Pres.: Mr. N. Gamble; Vice-Pres.: Mr. W. Amies; Secretary: Miss W. Zagorskis; Treasurer: Mrs. A. Pill; Librarian: Mrs. J. Le Roux; Publicity Officer: Dr. R. Robbins.

The acceptance of the 15th Australian Esperanto Congress to be held in Canberra in January, 1966, was confirmed. The club undertook to donate a further £10 to the U.E.A. "Australian Room" Fund to be raised during the course of the appeal.



It was decided to affiliate to A.E.A. by paying a levy of 5/- (associate membership) for all club members not yet in A.E.A. Advanced, Intermediate and Beginners' classes will be held weekly on Thursdays in the Friends' Meeting House this year.

Mr. R. Harry gave an account in Esperanto and showed films of his recent trip to Africa when he represented Australia at the Independence Celebrations of Kenya.—R. Robbins, Publicity Officer.

● **ROCKHAMPTON.**—From Mr. H. V. Petley come three cuttings from the "Morning Bulletin": a front page photo and text on the Festo Zamenhofa, a pithy well-written article on The Origin of Esperanto and a report on the Esperanto Society's activities and a neat presentation of the U.E.A. Delegate system with its 3197 "consuls" in 64 countries. Mr. Petley is the Delegate for Rockhampton.

He thanked the Adult Education Centre for its continued support, the "Morning Bulletin" for its publication of monthly reports, &c., 4RK for its broadcasting of class arrangements, and all those who in any way had helped the Society. Everything pointed to a further influx of members in the coming year.

Officers elected: President, H. V. Petley; vice-president, N. Russell; secretary, V. B. Moore; treasurer, J. C. Pinwill; auditor, D. McIntyre; librarian, J. B. Moore; social secretaries, Mesdames T. Bencke, D. Nedrie, D. Connor and Messrs. R. Ross and W. Dunbar. The committee: Mesdames T. Bencke, D. Nedrie, D. Connor; Messrs. R. Ross and Privatera.

17/2/64: Classes have started and will continue on Thursday evenings in the Adult Education Rooms, with many enthusiastic students; about 70 are receiving instruction. The population of Rockhampton is 45,000 odd.

A Japanese girl in Tokyo has offered hospitality to one of its members, leaving shortly for the Games.

It is suggested that the Society be listed in the telephone book under "E" for Esperanto instead of under "R" for Rockhampton, as hitherto.

Books to the value of £10/1/- will be ordered.

Progress of the translation into Esperanto of a brochure issued by the local Promotion and Research Bureau was discussed.

● **HOBART.**—En Februaro okazis la jarkunveno kaj la jena estraro elektigis: Prez.: S-ro G. Lancaster; Vic-prez.: S-ino Shankley, S-ro J. Gibson, S-ro E. Bantick; Sekr.: S-ino H. Cooper; Kasisto: S-ro G. Cooper; Bibliotekisto: S-ino M. Shanley; Libro Servo: S-ino H. Cooper.

Kun bedaŭro ni ricevis la eksigon de nia antaŭa prezidanto, S-ino A. Douglas, kiu pro grava malsano ne povis denove akcepti la oficon de prezidanto. Dum multe da jaroj ŝi instigis novajn kaj malnovajn Esperantistojn. La grupo elektis ŝin unuanime "Honora Dumviva Membro". Ĉiuj deziras ĉian baldaŭnan resanigon.

Dum la pasinta jaro ni bonvenigis Ges-rojn E. Loorits al nia klubo. Por propagandi Esperanton en Tasmanio ni decidis meti afiŝojn en la Turista Oficejo, La Publika Biblioteko, la fako por plenkreskuloj, kaj en la Friends' Lernejo. Tiamaniere ni esperas varbi novajn membrojn.—H.C.C.

### TASMANIAJ GEJUNULOJ SUKCESAS EN OFICIALA EKZAMENO

En la unua oficiala sta:ekzameno pri Esperanto en Tasmanio (provinco de Aŭstralio) en Decembro, 1962, tri gejunuloj de la Kvakera Lernejo sukcesis kun honoro kaj gajnis la Lernejan Diplomon.

En la dua ekzameno, en Decembro, 1963, naŭ sukcesis, inter kiuj kvar kun honoro. Iliaj nomoj estas:

Mary Gibson, 19 Richards Av., Launceston (kun honoro).

Peter Williams, Brian May, Christina Oakley (kun honoro); Jill Hay, Lea Oakes, Dianne Berry, Christine Tyson, Merrilyn Batt (ĉiuj en Friends' School).

La gejunuloj, kaj ilia instruisto, S-ro George Lancaster, 848 Huon Road, Fern Tree, Tasmania, estas gratulindaj.—Ralph Harry.

### EINO LOORITS

Our philatelist friend in Hobart has gained a prize given by Polish Radio—a large album of Polish stamps.

## Recenzoj

**Vivo kaj Opinioj de Majstro M'Saud:** Jean Ribillard. 128 teksto- + 6 bildopaĝoj. Eldonis Stafeto. Prezo 1.50 Us. dol.

En 1956 aperis Vagado sub la Palmoj de tiu aŭtoro, jam mortinta. Ĝi kaj la ĵus eldonita stampas lin kiel elstaran proziston. En la unua ĉapitro li iom montras sian personecon kaj sian pensdirekton, kune kun artisma bildo el la vivo de dezertaj nomadoj kaj ties fono historia kaj legenda.

En la ceteraj ĉapitroj li uzas mirakle inteligentan azenon kiel parolmedion, kaj per ĝi pipre regalas per ridigaj anekdotoj el propra sprito kaj revestoj sialingvajaj de rakontoj el la literaturoj sanktaj kaj profanaj . . . dum ĉirkaŭ ni ŝvebas la spirite senŝanĝa etoso de l'Mezoriento.

Kiel drinkemulo per vino, tiel li ebriiĝas per vortoj. Li plenstreĉas la vortrimedojn, ludante tutgame, ĉiukombine. "Per vino venas vero", kaj per ĉi stranga fando de dolĉe delira formo kun klarvida racio, li lasis al niaj filozofoj multon por primaĉi.

**Duonoĉo:** Poemaro de G. E. Maura. Dua eldono ampleksigita. Eldonis Stafeto. Prezo 1.50 Us. dol.

Jen libro, kiun ĝuos lingvoamatoroj kaj homoj simpatiaj al eksperimenta esprimismo, al la aŭdaca artefeko. Ĝi estas trezorujo el kiu ili ĉerpos laŭplaĉe. Komence, fasko da amorpoemoj, kiun sekvas simila pri amaro, en kiu la aŭtoro profete voĉas el sia angoro meze de la Hispana konflikto de 1936. Sub Humuro, li pludaŭrigas signifajn dirojn. Lerte rimante, li pikkomente revuas Esperantajn verskorifeojn, -koteriojn kaj -skolojn. Valoran komparon kaj konsilon li faras pri prosodia teorio.

La finan parton, Dum Iro, konsistigas kolekto da impresoj pri sezonoj, klimatoj kaj lokoj, hele koloritaj de lia arda vivpulsemo.

En Litiano li uzas kuriozan teknikon, jam prezentitan de Auld en parto de lia kolosa streĉo—La Infana Raso—nome, intence frapstranga misformado de vortoj kaj ŝoka, delire ekkria elipsado de ligvortoj. La efekto, timinde, restas duba por multaj legantoj, kiuj ne povas dividi kun tiaj aŭtoroj ties psikan staton.

Maura estas lingvuza majstro, post kiu bedaŭrinde devas nur troteti homoj de malpli alta pensstato.

### DENOVE HAVEBLA

La bona libro de S-ro P. E. Schwerin

### GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

Tre taŭga libro por viaj klub-vesperoj Spritajoj, Vortludoj, Preseraroj, Anekdotoj, Matematikajoj, Rimajoj, Societludoj, Konsiloj por grupestroj kaj kursgvidantoj, Demandaro.

Prezo: 3/6.

Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo aŭ de S-ro P. E. Schwerin, 12 McDougall Street, Milsons Point, NSW.

Aleksandro Kajti, Str. Terez No. 9, Pecs, Hungario (45-jara oficisto) dez. koresp. kun ĉiu lando pri ĉiu temo. Interŝanĝas Bildkartojn, Esperantaĵojn kaj Filmrevuojn.

"The Public Trustee, as executor of the Will of Frederick James Williams, deceased, is desirous of selling the deceased's 50 £1 shares in 'Esperanto Advancement Co-operative Ltd'. The shares are available as one lot at £50 or in five lots at £10 each. Any person wishing to purchase these shares should contact the Public Trustee, 256 Flinders St., Melbourne, and quote reference No. K4147."

### KLARIGO

"Monda Kulturo" (Somero 1963) uzis "paternalisma". Por Orientanoj kaj aliaj ni tradukas: "patrece sintena; patrece korektema" (-ec = "simila", laŭ Plena Gramatiko, paĝo 90).

Sentante nin "paternalismaj", ni proponas starigi servon, traduki iujn Esperantajn tekstojn—en Esperanton.

### POR EKSPOZICIO

NI deziras: bele afrankitajn p. kartojn, revuojn k.t.p. Ĉiu ricevos recompence belajn p.k.—Leon Zlotnik, Dzerzinski 12-42, Vilnius 5, Lituania, USSR.

## FOR-NAĜO AL AVENTURO

### .Submara Esplorado ĉirkaŭ Insulo Ardeo.

"Kiel mistera kaj bela estas la subakva mondo! Diverskoloraj maraj ardeoj, fiŝoj, kiuj mute naĝas kaj scivoleme rigardas la mondon ĉirkaŭ si: konkoj, submaraj rifoĵoj kaj tiu eterna kvieto, kiu regas sub la maro, tiel ravas kaj altiras la homon, ke li neniam plu rezignos pri tiu "mondo de la kvieto" se unufoje li gustumis ĝin." Tiel komenciĝas artikolo en freŝdata "Geografia Revuo". Certe oni devas esti submare kun masko, spirtubeto kaj piednaĝiloj, por konstati iel la nepriskribeblan belecon tie.

Insulo Ardeo estas koralaj insuleto, kaj estas malfacile priskribi la puran belecon subakvan. La insuleto situas je la suda pinto de la Granda Baranta Rifo ĝuste sur la Tropiko de Kaprikorno 40 mejlojn oriente de Gladstone. Kvankam la insuleto enhavas nur cent akreojn, kreskas abunde kazuarinoj (1), mangloj kaj fotografindaj pandanaj palmoj (2) kun subtenilaj radikoj ĉirkaŭantaj la pionian (3) jangalon. Laŭ la sezono gregegoj da ardeoj, fraterkuloj pacifikaj (4) kaj ŝternoj tie generadas. La akvo estas absolute klara, rave varma (oni preskaŭ ŝvitas en plastika kaŭĉuka jako). Submare la tuta vidaĵo estas kvazaŭ nova, nekonata mondo. Ĝis la bordo de la koralaj rifo, eble duonmejlon, jen diversaj koloraj koralaj formitaĵoj—elegantaj malvkoloroj, bluoj, purpuroj, flavoj, oranĝkoloroj, ruĝoj, armerikoloroj, verdoj. Laŭ la tajdo la akva profundajo estas kolorojn aŭ futojn al la koraltruetoj, fendetoj kaj sablorifetoj disŝutitaj dense kun algoj, marherboj, tripangoj nudibranĉaj moluskoj (5) (similaj al abalonoj (5) sude) kaj klamegoj (9) kun grandioze altiraj manteloj (borderoj de la konkoj) havantaj tekson kaj kolorojn velursimilajn.

Preter la rifo la koraloformitaĵoj iĝas pli kompleksaj. La kutimaj cerbo-, cervokorno- kaj agariko-formoj estas anstataŭataj de grandaj formoj similaj al plantoj: tutaj sekcioj similas al apartaj arbaregoj au amasoj da grandegaj agarikoj kun diametroj de ses futoj sed ankoraŭ nur duoncolon

dikaj. Mireginda! La fiŝoj ankaŭ pligrandigas—moruoj, seriozoj dorsalaj (6), makajroj nigrikanzaj marlinaj (7) k.t.p. pezantaj ĝis centoj da funtoj (ĉi tiun jaron jetilnaĝisto kaptis rekordan 550-funtan bluan serinadon (8) sur Glicinio Rifo apud Insulo Ardeo), grandaj kelonioj kaj, kompreneble ĉiam, la minaco de la ŝarko se ne la ŝarko mem.

Notoj: (1) She-oaks (kverkinaj?). (2) Pandanus. (3) Pisonia. (4) Mutton Bird. (5) Mutton Fish. (6) Yellow Tail. (7) Marlin. (8) Groper. (9) Clam.

Kvankam ili estas diferencaj, la abalonoj de N.S.K. kaj la moluskoj de Kvinslando estas nomitaj same: mutton fish! (Leach: Nature Studies, p. 330). — Kontribuita de la Kanbera Grupo.

## EDUCATION

The Guatemalan Government permits students to choose English, French or Esperanto in the higher schools of the capital.

See The AE 7/63: We add that earlier another student of the Amsterdam university, Mlle. C. E. Baarslag, passed final exam. with Esperanto as second language. She is now assistant to the professor of Dutch linguistics.

Yet another, Mlle. C. van Kleef, passed her final with Esperanto, 19 Nov., 1962. She is at present professor in Hoorn Catholic school.

These diplomas of the Uni. of Amsterdam are indeed significant, showing as they do the high recognition accorded officially to Esperanto as a literary subject. One may hope that now Esperanto has attained equal rank with the other subjects for study at the Faculty of Letters there, more students will choose it for their exams., and that the example may be followed by other universities in Holland and other countries.

Central Esperanto Documentation statistics 1962-3 give 563 schools with 16,272 students of Esperanto in 32 countries.

University of La Laguna (Canary Isles) has chair of Esperanto in its institute of languages.

Menciis E-on la Eduka Aŭtoritato en Nov-Zelando en bulteno: 1962.

"Sugestoj pri Instruado de la Angla en Elementaj Lernejoj": ". . . en kluboj kaj klasoj instruistoj rajtas instrui sur ĉiu lernnivelo la Maorian, fremdan lingvon, aŭ E-on; tion oni povas rigardi kiel etendon de instruado pri la Angla lingvo aŭ pri sociaj studoj, aŭ ambaŭ. . . Post jarlonga studado multaj geknaboj povas paroli, legi kaj skribi E-on kun iom da memfido kaj facile. Ĉar E-o estas tute logika, ĝi malkovras la grammatikan strukturon de unu el la ĉefaj lingvogrupoj en maniero tiel simpla, ke 12-jaruloj povas ĝin kompreni. Por tio, E-o estas bonega preparlingvo por postea studo de Eŭropaj lingvoj. Iuj asertas, ke prepara jaro da E-oinstruado ŝparas jaron da postea studo de la Franca.

"Ĉar la prononco kaj strukturo de E-o estas raciaj, instruantoj kaj lernantoj povas kune lernadi la lingvon ĝis ia grado. Certe ne estas necese, ke la instruistoj havu la fluantecon kaj mastrecon pri idiotismoj dezirindajn ĉe instruado de natura lingvo."—Tradukita laŭ raporto en N.Z. E-ist, 9-10/63.

### LA KONSERVEJO DE PIONIRAJ VOĈOJ

Ĝi starigis en Londono sub la aŭspicio de al Londona Esperanto-Klubo, honore al niaj pioniroj. Ĝia celo estas konservi la voĉojn (surbendigitajn), krome fotojn kaj biografiajn notojn.

- (1) de tiuj, kiuj fariĝis E-istoj jam en la antaŭa jarcento.
- (2) de tiuj eminentaj E-istoj pli junaj, tamen pioniroj en specialaj medioj aŭ fakoj.
- (3) kolekti ekzistantajn registrojn de voĉoj de pioniroj jam mortintaj.

Por atingi tiun gravan celon ni urĝe bezonas helpon de sindonaj, kompetentaj kunlaborantoj en diversaj landoj, kaj invitas vin sendi al ni proponojn de praktika kunlaboro.

La nomo de ĉiu helpanto trovos lokon en "Honora Nomaro de Kunlaborantoj de K.P.V."

Teknikaj kunlaborantoj notu: Registroj estu farataj per dutrakaj maŝinoj; rapideco 19 cm/sek. prefere, aŭ 9.5 cm/sek. Direkto: de maldekstre dekstren. Daŭro: maks. 30 min.; eĉ kelkminuta parolo bonvena. Bendo:

devas esti nova, elstare bonkvalita. Enkonduko nur kelkminuta, de registranto, dezirata.

Mi esperas raporti pri atingoj dufoje jare. Servu al la Historio! Konservu pionirajn voĉojn.—Peter Schilperoord, 10 Langbourne Av., Highgate, London.

### BAZSTONO

de la Zamenhofa lingvuzado estas: La Esperanta Biblio. Ĉiu E-isto devus ĝin havi kaj studi. Por vi mem aŭ por via amiko en donaca okazo, ĝi estas bonega akiro. Ne multekosta. Mendu ĉe The Bible House, Flinders Lane, Melbourne.

### VETERANOJ

E-istoj rajtas aliĝi al la Veterana E-ista Klubo post 40-jara scipovo de E. Kiel "Jubileanoj"—post 50-jara. Nenia kotizo. Vidu: UEA Jarlibro 1963, p. 93.

En Aŭstralio troviĝas veteranoj, kaj almenaŭ unu jubileano. Ni volus aperigi liston de tiaj en nia gazeto.

Bonvolu sendi nomojn kaj detalojn al la Redaktoro.

### "LA MIZERULOJ"

Ĉu iu povas informi pri la propra nomo de "Centezimala", kiu tradukis en Esperanton la romanon de V. Hugo, "Les Misérables"? Aperis nur la unua parto en 1914; eldonis la du libretojn W. Nutters, Amsterdam, por la "Internacia Socia Revuo".

### "OOMOTO" IN AUSTRALIA

A list received from Kyoto gives 18 addresses to which the gazette "Oomoto Internacia" has been regularly sent. Seven are classed as subscribers, all of whom have lapsed in payment, the last one in 1963.

Would those still receiving the gazette please inform me as to their attitude towards renewal.—Editor.

### MUZIKISTOJ

Kontraŭ p.m. ni sendos al vi faskon da muzikaĵoj, kiun ni ricevis el Pola centro. Racia notskribo kun kelke da kantoj.

### BEN EHRlich

Ĉu iu povas informi S-ron M. G. Niewiarowski, Zetkin 21/5, Katowice, Poland, pri lia adreso? Laste konita en Sidney.

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15\$ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5\$.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 40 (120)

MELBURNO

Majo - Julio, 1964

---

## ABOUT PARTICIPLES

Greek is the only Aryan language (of those commonly studied) that compares with Esperanto in its participial system, which lends to it a great part of its admirable flexibility.

In translating into Esperanto, we should utilise the facilities offered us, remembering, however, that the participle calls for care in its use. Never use it without considering the question of tense. The Esperanto participle, like the English, has tense, but do we use it correctly?

"Seizing a sword from a table, the king ran his enemy through the body". Translate that literally into Esperanto, and we have a strange statement. We must believe that the enemy somehow got himself in the way between the king and the table as the sword was passing from the one to the other, and lost his life by that mischance.

"Picking up a stone, the boy threw it at the dog" makes nonsense if translated literally into Esperanto. "Hurrying home, he told the news to his wife", likewise translated would probably be a mis-statement. For, were the English logically expressed, we should have to say: "Having seized a sword from a table, the king ran, &c." "Having picked up a stone, the boy . . ." "Having hurried home, he told . . ." Here the participle must be in the past tense in Esperanto, despite the loose English usage.

Now take these three sentences: Leaving the child at the railway

station, the mother gave him instructions as to what he should do. Leaving, &c. . . the mother looked back and nodded to him. Leaving, &c., . . . the mother bought goods in the town.

In the first sentence the Esperanto participle must be "lasonte", in the second "lasante", in the third "lasinte". You can see why, can't you?

In having a future participle, Esperanto has an advantage over English, which relies on a makeshift form: "about to" followed by an infinitive. "Being about to begin his work, he stopped a moment to talk to me". The translation "Komenconte sian laboron, li haltis momenton por paroli al mi", is briefer and more definite than: "Antaŭ ol li komencis sian laboron k.t.p."

"The speaker arose." A simple sentence, but before we translate it with the noun-participle we must know whether he arose after, during, or before he spoke, as a speaker at a meeting. In the first case, it's parolinto; in the second, parolanto; in the third, parolonto.

You would search in vain in the New Testament for a form ending in -ote; likewise in the Fundamenta Krestomatio, though -oto is found there once.

Grabowski in "Sinjoro Tadeo" experimented with the synthetic, compounded form of the participle, e.g., ŝuldantas (estas ŝuldanta(j)); allogatas (estas allogata(j)); laŭdatu (estu laŭdata(j)). Kalocsay followed him, using such forms at least five

times in "La Infero", also the conditional "havunte" three times. The objection to this is an over-density of the time element and a consequent difficulty in apprehending the sense at hearing. Zamenhof in "Lingvaj Respondoj" says that such use presents no "break in the language" and leaves approval or rejection to the Language Academy. He nevertheless counselled against its use by private authors on their own initiative.

M. C. Butler in his "Klasifo" registers some weird forms: Timintus batati: Mi estus timinta esti batata; I would have feared to be beaten. And, Mi estis estinta kantonta.

"estas estinta" is normal, and so used by Zamenhof (Originala Verkaro, p. 261).

The Esperanto participle is a treasure of conciseness; let us never, by careless usage, destroy its great effectiveness. The Esperanto New Testament is a rich field of study, and in many a passage participles swarm: e.g., Acts 3: 1/9; 2 Cor. 5: 3/4; Revelation 12/2. Make a point of noting them.

### MANKAS AL A.E.-VORTAROJ:

Traymobile or Tea Wagon.  
Cafeteria (self-service)  
(memserva manĝejo?).  
Supermarket (self-serve)  
(memserva vendejo?).  
Milk bar (laktotrinkejo?).  
Public "image".  
Lounge (present-day drawing room).  
Radiator (electric portable).  
Pressure Cooker  
(vaporprema kuirilo?).  
Electric Frypan  
(elektra fritujo).  
Tatting.  
Stroller (baby carriage)  
(infanĉar(et)o).  
Supersonic (transsona?).  
Hovercraft.  
Rotary Clothes Line.  
Roll on, roll-off Ferry.  
Drive-in Theatre  
(aŭto-alirebla, por-aŭta kino?).  
Homogenized Milk  
(homogena lakto? P.V.).  
Speedway (senlimita veturvojo?).  
Expressway (ekspresvojo? P.V.).  
One-way Traffic (unudirekta trafikvojo).  
The Speaker, The Whip  
(parliamentary).  
Shrinkproof (ŝrumprezista?).

Grandstand.

Car Park (aŭto-restigejo; aŭto-parko laŭ Hans Wingen).

Ten-pin Bowling Alley.

Plus Fours.

Fluoridation.

Streamlined (flulinia; fluforma—Aeronaŭtika Terminaro, Jarlibro 1941).

Surfboard.

Stereophonic.

Traffic Roundabout.

Trolley Bus.

Bank Form; Telegraph Form.

Drivers' Licence (veturig-atesto?).

Chorus girl (horgambistino).

Call girl (telefauŭnino—ha, ha!).

Denier hose (denar-ŝtrumpoj).

Dead heat (nedecidita (ĉeval)konkurso).

Juke box (groŝmuzikujo, disko-gurdo).

"Kombi" (pluruza aŭto).

Preventive war (antaŭgarda milito).

Slimming cure (sveltiga kuracado).

Inking pad (stampkuseno).

Jackpot (migra premio).

Medicine ball (pezpilko).

Wildcat strike (nesindikata striko).

Marching girls.

Helicopter (helikoptero, en Aero. Term.); scooter, skotero, en PVS.); jet-propelled (jetmovata, laŭ PVS.).

Kun helpo de legantoj, ni aperigos ankoraŭ liston de ekzemploj.—Red.

### EPOKFARA VERKO!

Dulingva eldono de la DIA KOMEDIO de Dante Alighieri, en la traduko de Giovanni Peterlongo, ilustrita per 89 tutpaĝaj reproduktajoj de la originalaj desegnaĵoj de Botticelli, neniam antaŭe kune publikigitaj.

709 paĝoj 28 x 21 cm., kun antaŭparoloj de Bruno Migliorni, Paolo Peterlongo, Piero Bargellini kaj Gaston Waringhien, kun komentariaj notoj, listo de variantoj kaj indekso de propraj nomoj.

Tole bindita kun plasta ŝirmilo kaj kartona skatolo.

La norma prezo 240 steloj estas reduktita por Esperantistoj al 144 steloj (unu stelo—8p. Aust.). La solrajto de vendado en la Esperanto-movado estas rezervita al UEA.

## Recenze

**"Tio, Kion Mi Kredas":** Jean Rostand, Membro de la Franca Akademio. El la Franca trad. Pierre Berlot. Eldonis U.F.E., 34 rue de Chabrol, Paris. 39 paĝoj. 3 Fr. frankoj.

Temas pri la genezo, vivkialo kaj fina destino de la homo. Vasta kampo, por kies pritrakto la aŭtoro limige al si rezignas "ian revelacion supoze faritan al niaj prapatroj", kaj uzas nenian konilon ol rezonon. Li ne fidas la "rekantan intuicion, nek subjekтивan certecon".

Li ekzamenas la rilaton de la homo al lia ĉirkaŭo, materia kaj bestviva, esplorante la teoriojn de la evolucio. Li konkludas, ke inter la bestoj kaj ni ekzistas diferenco nur kvanta, ne kvalita, kaj li sentus sin frato, ne afekcie, sed racie, al kiu ajn malalta vivantaĵo. Li forlasas esperon kompreni la evoluon de l'vivo, antaŭ ol kompreni, kiel ĝi estiĝis. Ekster tio, ke la nevivanta tempe antaŭis la vivantan, li scias nenion, kaj la scienco ankaŭ ne. "La vivo devenas de materio, sed mi ne scias, kio estas materio".

Kredante, ke la konscio estas ligita al sia materia substrato, do dubante, ke la spirita personeco povas vivi post detruo de la cerbo, li tamen konsideras la verkojn de Rhine, Huxley, James, Bergson, Osty, Carrel k.a. kaj la kampojn de la metapsikio, telepatio kaj telekinezo. Li forlasas ilian kompanion, ne konvinkite, ĉar li "ne multe kredas al homa atesto, el kie ajn ĝi venas". Li konkludas, ke post mil milionoj da jaroj la homoj daŭre restos nesciaj. Ili venkos ĉiujn materialajn malfacilaĵojn, solvos ĉiajn sociajn demandojn, navigos inter la steloj, kreas materion, eble eĉ vivon, progresos ĝis superhomeco. Ili verŝajne plilongigos vivdaŭron ĝis apero de "mortodeziro"; ili decidus la sekson de la infanoj kaj aplikos la partogenezon, eble la ektogenezon.

La konfeso de Rostand klare indikas la povolimojn de la racio. Ĝi meritas la respekton de teistoj, sed kompreneble ne ricevos konsenton, ĉar la pensabismo inter li kaj ili tro larĝe faŭkas. Por ili la aŭtoro tro-supoze neas la Eternan Menson—sekve la ekziston de la menso antaŭ ol aperis la materio. Kontraŭe, ili kredas, ke la Dia Intelektio ekzistas

jam de eterne kaj per krea volponto projekcias siajn "arkitipajn formojn" (Platono) en formo de la fenomenoj de la Naturo, jam de la Lumo (Genezo 1/3) ĝis la Logoso (Johano 1/1).

Finaj paĝoj esprimas fidon pri eventualaj ŝanĝoj en la individua kaj kolektiva psiko favore al pli bona homsocio. Tamen lia lasta linio avertas, ke "tio, kion mi kredas, komencas simili al tio, kion mi esperas".

Trovas plezuron en la verko nur homoj, kiuj amas esplori la eternajn problemojn de nia mistera ĉesto sur la tero.

**Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto.**—Marjorie Boulton. Eldonis Stafeto 1963. 268 paĝoj plus 26 bildopaĝoj. Broŝ. 3, bind. 3.80 Us. dol.

Ĝen la plej ampleksa kaj detaliĉa biografio de Zamenhof. Neniu ĝin superos ĝis la tempo, kiam ne plu estos bezono de sinreteno pri personaj aferoj nun necese sekretaj, kaj ankoraŭ ekzistantaj arĥivoj jam estos ĝisfunde esploritaj.

Per la nun havebla materialo F-ino Boulton sekvas en 23 forte impresaj ĉapitroj la sorton de la glora Pol-Hebreo de lia infaneco ĝis lia agonio. Sekvas du ĉapitroj pri la postea historio de Esperanto—ĝiaj turmentoj kaj triumfoj—kun taksoj pri elstaraj verkistoj, gvidantoj k.a. kaj informoj pri la sorto de la Zamenhofa familio kaj fidelaj E-istoj sub la Nazia teroro.

Po hazardo, la du ĉefaj biografistoj—Privat kaj Boulton—estas poetoj, sekve en iliaj verkoj ilia sentemeco respesuligas kun evidenta forto. Tio estas precipe vera ĉe tiu ĉi verko, en kiu cetera la subjektiveco de penso povas ĉe iuj legantoj vekti diskutemon.

La renomo de la aŭtorino kaj de la eldoninto asekure staras kiel garantio pri la valoro de la libro, kiun ni rekomendas al ĉiu povanta ĝin legi. Saĝe akceptinte tiun rekomendon, ĉiu mendinto mem laŭdos la verkon el koro plena de admiro kaj danko.

Konstrua kritiko estas pli bona tributo al la laboro de la aŭtorino ol nova voĉo en la horo de ĝenerala laŭdo. Jam homoj diversgazete vidis erarojn pri datoj kaj faktoj en ĉi granda fortostreĉo. Kaj foje iliaj asertoj estis korektitaj de aliaj . . .

Ni aldonas kelkajn dubajn aferojn:

P. 49: Pri la Unua Libro. "Iomete antaŭ la apero de la libro, Ludoviko kaj Klara geedziĝis, je la 9a de aŭgusto . . ." La Encik. de E-o donas la daton de la libroapero: 14 jul. 1887, kaj Holzhaus: la 26a de Julio, 1887. Sajnas do, ke la teksto devus esti: "Tom post la apero . . ."

P. 59: ". . . lia Aldono al la Dua Libro, 1889". Privat en sia Historio de E-o donas la daton: Junio, 1888.

P. 148: "Felix Moscheles . . . kiu en 1905 faris portreton de Zamenhof". Tre duba! Vidu: Nica Lit. Revuo, n-ro 33; British Esperantist, Jan. 1918. Legu prefere: 1907, post la Kembriga Kongreso.

P. 249: Sajne la aŭtorino ne sciis pri rakonto de Margrethe Noll (en 1961), kiun tiu siatempe ricevis de Lidja mem en Kopenhago. Laŭ ĝi, Wanda kaj ŝia filo Ludoviko savigis per riske sinofera ago de kuracisto—nenomenda.

P. 49/12: "presprovajoj". Legu: manuskriptoj.

P. 167: Ric. Berger, Occidentalisto, artikolis en 1937, ke la vera aŭtoro de Ido estas Couturat. Se jes, kial do De Beaufront sin deklaris la aŭtoro? Boulton konjektas: Ĉu Couturat ĉantaĝe uzis lin kiel pajlohomon, pro ia persona scio sekreta? Sed estas alternativo: Ĉu la du homoj, sentante, ke la reputacio de De B. estas preskaŭ samforte influa\* inter la E-istoj, decidis, ke tiu deklaro tirus multe da E-istoj en la Ido-kampon? Kio efektive okazis en iuj lokoj. Tio akordus kun la neŭroze martirigema naturo de De Beaufront.

\*t.e. Kiel tiu de Zamenhof.

Sur nobla noto finiĝas la lasta paĝo de tiu ĉi proza epopeo. Sur la estrado de la Kongreso Majenca staris la nepo transvivinta el teroro, kies familianojn detruis la diabloj de l'naciismo. Sub flago neniam makulita per sango, li grandanime voĉis: "Anstataŭ saluti vin je la nomo de la familio de Zamenhof, mi volas saluti vin ĉiujn, kiel la grandan familion de Zamenhof en la plej nobla senco de la vorto".

**Homoj sur la Tero:** Stellan Engholm. Romano. Enkonduka skizo de Ferenc Szilagyi. Eldonis Stafeto. 236 paĝoj plus 4 bildo-paĝoj. Broŝ. 2 Us. dol.; tolbindita 2.80.

Engholm estis vortartisto pejzaĝa kaj homkaraktera, ne fabrikanto de sensacia intrigo. Liaj kvalitoj reliefiĝas per ĉi-romano, scenigita en la Sveda kamparo. Ĝia literatura kanvaso ampleksas tri generaciojn.

Li prezentas la vivojn de kvin anoj de familio en kiu "ne ĉio estas, kia devus esti"—nome, mankas al ĝi amo natura de samsanguulo unu al alia. Amikaj sed ne amemaj ili estas.

La libro certe plaĉas al legantoj, kiuj sentas naŭzon al sekse-saturitaj perfortoplenaj verkaĵoj tiel tre vaste troveblaj, kaj kiuj serĉas honestan analizon de homaj situacioj senan je pusputraj priskriboj. Kun minimumo da vortoj Engholm delikate enteksas en sian kronikon la eksteredzegan gravedigon de Selma la servantino (p. 94-5). La respondeca viro estas samspeca kun alia malsaĝulo, kiu diris (Luko 12) "Mi diros al mia animo: Vi havas multan riĉon: ripozu, manĝu, trinku, estu gaja". Al li venis Dia damno: "Ĉi tiun nokton oni postulos al vi vian animon!" Felice por nia Svedo, li—iom nekonsekvence—ricevis duan ŝancon reveni al sana rigardo sur la vivon, grande pro la saĝa antaŭvidemo de tiu virino, kiun li fi-traktis.

La verko prituŝas interalie la tradician tirforton de la tero al la animoj de homoj grade sentantaj la kontraŭefikan influon de evoluanta industria socio; sed ĉefe impresas lia bildo pri la lukto de viroj kontraŭ la unutoneco de izola kamparvivo—iuj serĉas faciligon per nenifara ĝuanteco; aliaj per trabreĉo en la pulsantan mondon ekstere. Strange signife estas, ke en lando alte civilizita kun longa Kristana historio la aŭtoro ne menciis ekziston de ia ajn sane-societa kunvenejo, interhelpa lokalo en la distrikto.

La romano aperis en eldono de Literatura Mondo en 1931. Ĉi dua enhavas ĉ. 200 ŝanĝojn faritajn de la aŭtoro dum liaj lastaj tagoj sur la tero. Pro simpla sed sentoria stilo kaj scivolveka temo, ĝi pensigas pri komparinda romano—La Idoj de Orfeo—ankaŭ de Teŭtona majstro, Bulthuis. Amantoj de sincera literatura esprimarto legos la rakonton kun admiro, kaj verkemuloj—kun envio.

**Gaja Leganto Per Esperanto:** P. E. Schwerin. Dua eldono. Prezo 3/6. A.E.A. Libroservo aŭ ĉe la aŭtoro,



12 McDougall St., Milsons Point, N. S. W. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd., Rickmansworth, Anglujo.

Per ĝi S-ro Schwerin lerte-kompetente daŭrigis la serion de "gajaj" legajoj, kiun verkis siatempe lia "patreca amiko" Carl Walter. Li kompilis ĝin laŭ ties principo: provizi legajon amuzan, kiel instigon al lingva lernado. "Amuzi" signifas iom pli ol nur ridigadon, nome, ankaŭ agrablan distradon. Tion la aŭtoro donas interalie per ludoj kaj matematikajoj, plezure ĝuataj.

La libreto 47-paĝa meritas vastan uzadon ĉe kursoj kaj grupoj, kies estroj devus sekvi la saĝajn konsilojn sur p. 42-44.

P. 18/11: ĉirkaŭskriba (popola?): 15/2: farmo (farmbieno); 29/-7: Legu: "ĉu ankaŭ li volas esti prezentata..."

**MONDA KULTURO:** Vintra numero. Eld. UEA. 60 steloj jare. Eldonas ĝin D-ro A. Albault. El plaĉa enhavo da dekok verkajoj elstaras Waringhien: Longa studo pri la Esperanta leksikologio; Paul Lobut: profunda ekzameno de la "kosma vizio" de Teilhard de Chardin, kies lego postulas konantecon, ankaŭ simpatian, kun la temo; D. B. Gregor: egale erudicia pri la animo de Dante kaj la mezepoka menso; Prof-o P. Naert: Lingvo kaj Kulturo, per kiu li pledas protekton por la malgrandaj lingvoj kaj dialektoj kaj konservon de ties kulturoj; Roger Bernard: Traduko de akto IV, sc. 4 el Horaco (Corneille); Henri Vatre: penetra analizo de "Homoj sur la Tero" (Engholm). Ĝi estas modelo de kompakta, klarpena literatura takso.

La nova paĝo da dialogoj estas tre leginda.

Plumeraroj: p. 176: "ili anstatauas aliaj..."; "necesas lerni la nacia aŭ la naciaj lingvoj". Kial "eskluda"? Prefere "ekskluda" (War.)—komparu: inkluda—se oni pri io ne volas uzi la oficialan "ekskluziva". "atava". Ne tre klara. La radiko estas "atavism"; "objeto" (lernobjekto?).

La insistoj, ke ĉiu artikolo aŭ grava kontribuo nepre havu sian titolinion ĉe paĝkapo, rezultigas konstantan paŝserĉon por trovi ĝian daŭrigon. Per tiu metodo sep artikoloj estas tranĉitaj, trovante finon sur nesekvaj paĝoj. Tia aranĝo ne kompensas la ĝenon.

## Australia Kroniko

### ORIENTAJ ANTAUURBOJ:

25/3: Prelego de S-ino Fink pri Tajlando. Dum la Monata Societa Vespero, nia gasto, S-ino Doris M. Worcester, prelegis pri Japanujo kaj montris diapozitivojn. La saman tagon ŝi gastis ĉe nia sekr-o, S-ino Fink, en kies hejmo ni surbendigis ŝian prelegon pri ŝia E-a agado en Japanujo kaj E-istiĝo en 1938. Ni veturigis nian gastinon tra la orienta parto de Melburno kaj vizitis la Komercon Centron en Chadstone. Post vespermanĝo ni aŭtomobiligis ŝin al ŝia hotelo. Nia Klubo delegis niajn membrojn, Ges-rojn Edmunds, adiaŭi ŝin ĉe la haveno.

La komencula kurso havas 10 lernantojn kaj okazas ĉiuŝaŭde. 1/5 ni gastis ĉe Ges-roj Smith dum nia Monata Societa Kunveno; nia preleganto estis S-ro Ryding, kiu ilustris per lumbildoj sian prelegon pri Bulgarujo kaj la Universala Kongreso.

La Junia kunveno okazis en la hejmo de S-ino Fink, kie paroladis nia juna sam-o Danny Kane pri la Internacia Movado Junulara. Samprograme estis deklamo de E-a poemo kaj prezento en E-o de filmo: "Kelkaj Aspektoj de Melburno Hodiaŭ", farita de la Filmo-Foto-Fako de IGA. La monata kunveno okazis 3/7 en la hejmo de Ges-roj Alan Edmunds. La klub-estraro propagandas la projekton "Junulo al Tokio".

—Irene Fink.

### VETERANOJ (vidu: p. 20)

#### 55 jarojn Esperantisto: en la 72-a vivjaro.

Mi mem pretendas esti kaj veterano kaj jubileano. Mi komencis studi E-on en 1909j. Tiutempe la nova ĵurnalo The Sydney Sun transprenis la malnovan ĵurnalon The Evening Star kaj ĉiutage publikigis lecionojn en E-o. Tiu kolumno interesigis min kaj mi aĉetis lernolibrojn por akceli mian studadon. Mi tuj E-istiĝis. Poste en 1911j. mi loĝis en Brisbano. En suda Brisbano, ĉe privata hejmo — "Bonvenu" — kvar-kvin lernantoj kunvenis por helpi unu la alian studi la lingvon. Mi forgesas la nomojn de miaj kunuloj kaj tiun de mia E-ista gastiganto.

Dum 1912-13j. mi abonis la gazeton La Abstinencia Observanto, oficiala organo de la Internacia Ordeno de

Bontemplanoj, kontraŭalkohola organizaĵo, kies ĉefsidejo estis en Germanujo. Kelkfoje mi donis alparolon pri E-o al niaj lokaj membroj. Tiutempe mi estis sufiĉa sperta por instrui. En 1920j. mi reiris al Sydney kaj abonis al La Suda Kruco, kaj foje vizitis la Sidnejan Klubon, kiu kunvenis en ĉambro de la Rawson Building (nun malkonstruita), lokita en Placo Fervoja.

Do, antaŭ 50 jaroj mi povis facile legi kaj kompreni tiun plej belan lingvon el ĉiuj—Esperanto.—V.J. Timmins, sek. Hornsby Esperanto Klubo. Aŭstralia rep. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

John N. Prewett (ĉe Mailbag, Rochester, Vic.) estas E-isto jam de 1924, kiam li aĉetis lernlibron en la butikoj de S-ro Rawson. Li ankoraŭ uzas la lingvon.

#### KOMITATO DE U.E.A.

Pola UEA-komitato, kiu redaktas Esp. disaŭdiĝojn ĉe sendstacio, petas en amika letero, ke ni sendu The A.E. al li, konforme kun decido de UEA en Sofio, nome: "ĉiu komitatano rajtas senpage ricevi la gazetojn de naciaj asocioj".

Nu, bone. Tamen rigardu la situacion. Estas 64 komitatanoj (Jarlibro 1963, p. 10). Sendi ekzempleron al ĉiu kostus al ni franke 26ŝ. 8p. krom preskosto (proksimume sam-suma) por la bezonataj ekzempleroj. La abonmono ricevata de la Asocio apenaŭ kovras la koston de eldonado, sekve sendi al 64 senpaguloj ankoraŭ pli grave nin elspezigus.

Estas menciinde, ke liaj vortoj "rajtas ricevi" ne signifas laŭstatutan, kvazaŭ-juran rajton, sed nur la simplan rajton de kiu ajn homo ricevi ion jam libervole senditan de konsentinta doninto. Legu nur:—

("Esperanto", p. 160, Sept. 1963. "Ni direktas publikan peton al ĉiuj Landaj Asocioj, ke ili inkluzivu en la ricevantojn de la nacia organo ĉiujn Komitatanojn de UEA . . .").

**RADIO.**—Dec. 9, 1963, la sendstacio de Pola Radio en Gdansk dissendis sian 130-an 15-minutan disaŭdiĝon pri E-o, komencante ankaŭ la 4-an jaron de dissendoj. La disaŭdiĝoj okazas ĉiulunde je la 7.15 matene

laŭ Pola vintra horaro sur la mezondo 230m. en normala programo. La redakcio de la E-a programo bezonas konstantan informon kaj gratulleterojn. Adreso: Pola Radio, Gdansk, Poland.

#### POLAJ LERNEJOJ

Laŭ "POLA E-isto" 11-12, 1963, E-o estas instruata en 65 Polaj lernejoj kun 9597 gelernantoj (40 mezlernejoj, 23 elementaj lernejoj kaj 7 altlernejoj).

En Nov-Zelando: 1150 geknaboj en 22 lernejoj, laŭ Steiner ("Informilo").

#### POR LA KOMENCULOJ

La filo de la kampulo Bauer unuafoje vizitas la ĉefurbon. Inter aliaj mirindaĵoj li admiras en magazeno strangan verdan birdon kun granda kurba beko. Li eniras la vendejon kaj entuziasmiĝas audante, ke tiu birdo estas klera papago, kiu kapablas paroli. La papago fakte parolas, paroladas!

La juna Bauer aĉetas la papagon kaj sendas ĝin en bela kaĝo hejmen. En letero li komunikas, kion la birdo deziras manĝi, sed li ne skribas, ke la birdo kapablas paroli. Per tio li volis mirigi la tutan familion post sia reveno.

La papago bone alvenis. La kampulo neniam antaŭe vidis tian birdon, kaj, ne sciante kion fari, li demandas la vilaĝan instruiston. La instruisto foliumas en siaj libroj kaj fine deklaras: "Bauer, mi divenis! La birdo estas speco de verda ansero, kaj via filo certe volis, ke vi manĝu tiun maloftan birdon!"

La familio Bauer do manĝis la birdon, kvankam ĝi havis strangan guston.

Kiam la filo post kelkaj tagoj revenis, li tuj demandis, kiel fartas la papago. Audinte, ke oni manĝis ĝin laŭ la propono de la vilaĝa instruisto, la juna Bauer furioze kuris al la instruisto kaj ege mallaudis lin: "Kiel vi povas diri, ke la birdo estis verda ansero? Estis ja papago, tre malofta kaj klera birdo, kiu kapablas paroli kiel homo!"

La instruisto stoike respondis: "Kial ĝi do nenion diris?"

Owing to pressure of work, our ever-active Secretary has had to hold State reports over till the next number.

## ESPERANTO LITERATURO

Post unu kongresa prelego, en kiu estis emfazita la bezono, informi edukajn rondojn pri la faktaj atingoj de Esperanto en la kulturo kaj literaturo, S-ro M. Leereveld pledis por aperigo de Anglalingva verkaĵo, kiu enhavus klaran kaj ĉiuaspektan prezenton pri la signifo de la Esperanta literaturo. Li plendis pri tia nuna manko.

Ni rimarkus, ke en "The Language Problem" (Durrant) troviĝas 11-paĝa ĉapitro pri tiu literaturo, sed, eldonita en 1943, tiu siatempe valora verko jam postrestas la faktojn, kaj bezonas fortan revizion, por ĝin aktualigi. Tia reviziaĵo, pligrandigita, grande servus kiel perilo, por porti la veron en la kampojn de la kulturo.

"Esperanto Literature" (K. R. C. Sturmer): 1930, pro sia malnovo, estas senutila por nia nuna tasko. Krome, tiu kolekto da notoj kaj impresoj estis farita de forte individuisma persono; karakterizas ĝiajn taksojn tre reliefa subjektiveco.

## MEKSIKO(I)O?

Laŭ la vortaroj de Waringhien kaj Albault kaj Wingen kaj Fulcher/Long **Meksiko** estas la urbo kaj **Meksikio** la lando. Tio estas ĝuste laŭ la konsilo de Zam. "nomi la urbon—Meksiko—kaj la landon—Meksikio (kiel Alĝero - Alĝerio, Tuniso - Tuniso k.t.p.)". Bedaŭrinde, en la UEA-Jarlibro, p. 350, "Meksiko" servas kaj por la lando kaj por la urbo.

## CITINDAĴOJ

Diris Nederlanda junulino loĝanta en Belfast: "Kiam miaj amikoj tie interparolis en la Angla, mi ne povis ilin kompreni, sed kiam ili parolis Angle al mi, tiam mi ja komprenis". Sendube pro tio, ke, konversaciante inter si, ili parolis libere-idiotisme; parolante kun ŝi, ili uzis plej simplan, elementan lingvaĵon.

El la Nazia teroro oni savis 2000 E-librojn de la Germana E-Instituto. Ili nun estas ĉe la Stata Biblioteko, Unter den Linden 12, Berlin 8.

Karl Maier, Chrysanthemum-str. 8, Berlin No. 18, akceptas mendojn de preparata katalogo.

La Ĉeĥa havas 14 supersignitajn literojn; Franca 11; Hungara, Turka kaj Pola 9; Hispana 6; Germana 4. Esperanto havas 6. Kalocsay kalkulis la ĉapelhavaĵajn literojn en du artikoloj. El 4800 literoj nur 102 havis tiajn, do proks. 2%.

Tradukante la Biblion, Zamenhof uzis nur 87 radikojn ne en la Universala Vortaro kaj la Unua Aldono Oficiala. El tiuj 55 estas teknikaj. ("British Esperantist", Nov. - Dec. 1950).

Viro tre lakona sciis pri la morto de la edzo de konata sinjorino. Li skribis al ŝi jene: "Estimata sinjorino: Ho ve!"

Post unu jaro li sciis, ke ŝi reedziniĝis. Li skribis denove: "Ho, ho!"

## EDUCATION

Dept. of Philosophy and Letters (National Univ. in Rosario, Argentine) gives faculty diploma to all successful candidates of the regular Esperanto course.

Normal School of Rafaela (Santa Fe), Argentine, has obligatory course in Esperanto for students in 5th class.

State Parliament of Sao Paulo, Brazil, decrees that Esperanto is an elective subject in the middle schools. The teachers in such must have diploma of the Brazil Esperanto League.

Social School of Zaragoza (Spain), after experiments through several years, introduces Esperanto as official course on same basis as other languages.

"Modern Languages", organ of Modern Languages Assn. (2000 members), has article on Esperanto in the Secondary School in its Sept. number.

"The Linguist" includes Esperanto in its articles on 7 languages.

## LANGUAGE LEARNING

"No man acquires a mastery of a foreign language without losing something of his command over his native speech."—Dr. G. P. Marsh.

**"ORIGINALA VERKARO"**

Vidu: p. 42, supre. S-ro A. Holzhaus sendis al ni tekston Esperantan kaj Germanan de tiu "mistera, mala-perinta" **Enkonduko** verkita de Zamenhof en 1891. Valora havaĵo!

**PRESERAROJ**

Vi akurate abonas nian gazeton; tial vi estas homoj de pli ol meza inteligento. Pro tio, la redaktoro, post trovo de tia aŭ alia preseraro, ankoraŭ dolĉe dormas. Li bone scias, ke vi, rimarkinte presfuŝaĵeton, tuj funkciigas la oleglitan maŝinaron de la cerborgano kaj postete ĝuste divenos, kiel la teksto devus stari.

En via servo ŝvitas la plej lerta linotipisto en la urbo. Sed li estas ne-Esperantisto, krome nur homo, do eraripova, ho ve ankaŭ erarifara. Foje ankaŭ lia kolego ŝutas sablon en la supon, mismetante korektitajn liniojn, kio povas fuŝi tutan paragrafon.

En tiaj okazaĵoj vi, karaj, penu jongli la liniojn ĝis ili glate eldonas sian perlan enhavon, harmonie, gustasekve. Tiaj presdiablaĵoj, cetere, povas provizi bonan ludon por viklepensaj homoj, kiuj amas glui la okulojn sur krucvortenigmoj.

**AŬSTRALIA U.E.A.—FONDUSO**

Kvankam nur kelkaj monatoj forpasis depon la lanĉo de ĉi tiu fonduso, la sumo kolektita jam kreskis de la £209 anoncita en la Jan-Feb-a numero ĝis £248, kiu kun promesoj estas preskaŭ duonvoje al nia celo.

Donacoj ricevitaj depon nia lasta raporto:

- Anonima, £10.
- Cooper, Ges-roj G., £10.
- Fordham, S-ro F., £1.
- Fraser, S-ino V., £2/2/0.
- Kanbera Esperanto Klubo, £10.
- Koppel, Ges-roj H., £2/2/0.
- Moore, S-ro J. B., £1.
- Ross, Ges-roj, £1.

**Promesintaj:**

- Costa, S-ro E., £10.
- Godfrey, F-ino A., £5.
- Grahovacs, S-ro I., £10.
- Newell, S-ro L. N. M., £5.
- Sedgley, S-ino A. B., £2/2/0.
- Sendu donacojn al S-ro K. G.

Linton 11 Poplar Street, S. Caulfield, VIC.

**JAM ALIĜINTAJ AL LA  
50-A UNIVERSALA  
KONGRESO EN TOKIO,  
AŬGUSTON, 1965**

- F-ino M. Hocking, Lindfield, N.S.W.
- S-ino M. Duncan, Manly, N.S.W.
- F-ino V. Cox, Surrey Hills, Vic.
- S-ro N. Collier, Buderim, Qld.
- S-ino N. Collier, Buderim, Qld.
- S-ino V. King, Richmond, Vic.
- F-ino J. King, Richmond, Vic.
- S-ro V. Gueltling, Strathfield, N.S.W.

La ĉefdelegito jam ricevis multajn petojn pri loĝado en Japanujo dum la kongreso. Ĉi tiuj estos anoncigitaj en la Dua Bulteno al kongresanoj, sed tio, kompreneble, ne estos eldonita ĝis post la ĉijara kongreso.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 41 (121)

MELBURNO

Aŭg. - Sept., 1964

---

## THE "DIVINE COMEDY" IN ESPERANTO

Complete Masterpiece with Parallel Italian Text.

An authority on Dante and an expert Esperantist, Giovanni Peterlongo died in 1941, having translated into the international language the complete work of the Master. His son, Paolo, with a committee of Esperantists, prepared the manuscript, and this unique edition has been issued by Edizione SIEI, Milan.

The de luxe volume is enriched by the appearance, for the first time in any one book, of all the known illustrations made by Botticelli for the 15th century edition of the "Divine Comedy". Fascinating is the story surrounding the history of these pictures, some of which were found in a Berlin bunker and given by the Russians to the West Berlin Museum.

The text of the Comedy is preceded by several introductions and prefaces, i.e., "Dante, Man and Poet", by Prof. B. Migliorni; "Sandro Botticelli and His Drawings for the Divine Comedy" by Prof. P. Bargellini; "Preface to the Esperanto Translation", by Prof. G. Waringhien; a biography of Giovanni Peterlongo by his son, who also contributes a sketch of Dante's life; an essay by Dr. Clelia C. Guglielminetti, "Places and Times of the Poem". With the exception of the last, which is in Esperanto only, all the texts, together with the complete Comedy, have the Italian on parallel pages.

To enjoy this masterpiece fully more is needed than mere aesthetic

perception of its form. To share with Dante something of what burned in him and impelled his fruitful genius to such expression, one must understand as much as possible its background of history, culture and religion. Such comprehension is much helped by the several introductory articles and the notes richly provided on the pages concerned.

The translation is unrimed, but preserves much of the rhythm of the original. An interesting comparison may be made with the Esperanto translation of "La Inferno" (1933) by Kalocsay, who followed the terza rima.

This immortal work has received fitting vesture. With marble-like coverboards, silk bound, on worthily durable paper, it stands as the finest edition that has ever appeared in Esperanto.

Giovanni Peterlongo, saturated in his lofty subject, knowing Dante to be universal in his appeal to the human spirit, and desiring that such appeal be importantly widened by translation into the international language, devoted many years to this end. The filial homage of his faithful son has at last revealed his monument of faith to the world.

The rebate price of £4/12/8 (Australian) for Esperantists is below that asked for comparable volumes on the general book market.

## Recenzoj

"**Biblia Revuo**". Redaktoro, Donald Broadribb, 64 Ardmill:n Rd., Moonee Ponds, W.4, Victoria. Vidu: p. 2 The A.E.

La unua numero enhavas 20-paĝan pritrakton: Carl Jung kaj la Biblio, de la red; Artikolon pri la Uppsala-skolo de ekzezo, de H. Ringgren; Sklaveco en la Antikva Proksima Oriento, de E. J. Gorlich, helpredaktoro, kaj ekzamenon de la komisio al Skta. Petro, de R. Ring. Bibliografiaj indikoj akompanas ĉiun, ekster la lasta.

Dezirante sukceson al la entrepreno, ni tamen ne povas deteni nin de rimarko, ke la du unue menciitaj verkaj interesas nur malgrandan nombron da homoj jam funde konantaj pri kio temas. Ne abonigos multajn E-istojn la evidente forta inklino, aperigi tiele tre erudiciajn studaĵojn, ekster la penskapablo de la granda plimulto.

Ni preferus vidi renaskiĝon de gazeto, kiu similus al La Eklezia Revuo (1917-22), kiu pli taŭgis al ĝenerala legado inter Bibliuzantoj, kaj certe meritus pli vastan subtenon ol ĝi efektive ricevis. En ĝi troviĝis pribibliaj artikoloj kompreneblaj por ĉiu kaj legindaj tradukoj de konataj religiaj poemoj klasikaj.

Se la celo de la nova revuo estas nure Biblia tekstkritiko, interpretado kaj rilata, kial ne plivastigi ĝian allogpovon, aperigante artikolojn malpli cerbostreĉajn, ekzemple de la speco jam aperinta en "Dia Regno" per plume de S-ro Broadribb mem?

Timinde, ke oni vane proponas al la E-publiko tian tro menslacigan legmaterialon. Interesatoj pri Bibliaj aferoj inter ni estas jam ne multaj—kaj certe estas mikroskopa la Bibliamanta elito intelekta, kiun ĉi cetero valora revuo povus altiri per sia nuna enhavo. Ni bezonas revuon, kiun volonte abonus religianoj kaj kiu varbus ankaŭ homojn ĝin nun ne sentantaj intereson pri la Biblio. Tion oni atingos nur per organo preta preni al si lokon pli modestan ol la altkultura nivelo elektita de ĉi brava sed verŝajne tro ambicia redaktoro.

"**Sennacieca Revuo**", N-ro 92. 67 Av. Gambetta, Paris-20. 58 p. 9 steloj (4 ŝil. Australia), plus afranko.

Verŝajne la plej malmultekosta revuo en E-ujo, ĉi tiu fasko da legindaĵo ĝustproportie prezentas regalona al homoj de diversnivela penskapablo. Por intelektuloj troviĝas Pli da Aspektoj pri la Filozofio de tiu mondovasta mensgiganto Teilhard de Chardin; pri la Semantiko, bazita sur Usona verko "Science and Sanity" (scienco kaj mensekvilibro); la Aktualeco de Galileo, kaj prozpoemoj de Baudelaire.

Pli populara estas amuza satiro pri songita reveno de Zamenhof sur teron, por kontroli la progreson de E-o. Ĝi estas efektiva leciono de memkritiko. Meritas vastan kaj instruan diskuton longa tezo de J. Regulo, kiu pledas por senĝena libera uzado de "tabuaj" vortoj en E-o. Valoraj, ĉar freŝaj rektaj atestaĵoj, estas du artikoloj de Japanoj pri la milito de 1939-45. Aliaj temas pri montgrimpo en Jugoslavio kaj religioj en Etiopio. Du versaĵoj klareprime elspiras la humanecon de viroj en la omoro de interfrata buĉado.

**La Fundamento de Esperanto:** La ĉefa bazo de Esperanto. 355-paĝa. Eldonis Editions Francaises d'Esperanto, rue P. Vergnes, Marmande, France. Broŝ. 38 steloj 5; bind. 51 steloj 4. Ĉe nia agento.

La teksto aprobita de la Universala Kongreso de 1905 estas fote reproduktita, por certigi absolutan aŭtentikecon. La verko enhavas: longan historian enkondukon kaj komenton de D-ro A. Albault; la Akademiajn Korektojn en kvin lingvoj; la Buljonan Deklaracion kun klarigaj notoj; analizon de la Ekzercaro; lingvaj rimarkojn pri Fundamentaj vortoj grave priindikindaj; detalan bibliografion de verkoj leksikologiaj, kaj alion.

Elstara libro, kiun ŝatos ĉiu studenta Esperantisto.

**Sen Eliro kaj La Respektama P...** J. P. Sartre; tradukis Roger Bernard. 8 Fr. fr. plus afr. Eld. Editions Francaises d'Esperanto (supra adreso).

La duan oni prezentis ĉe la Arta Festivalo en Sofio antaŭ Kongresanoj, kaj ĝia temo siatempe vekis iom grandan diskuton en la Esperanta gazetaro.

Jam per kelkaj elstare bonaj tradukoj, Bernard sin montris majstro,

kiu kaptas la plej subtilajn sencuancojn de originala teksto.

**Aventuroj de Pioniro:** Edmond Privat (1889-1962). Enkonduko de Henri Vatre. Eldonis Stafeto. 143 paĝoj. 1.80 Us. dol.

Ĝi estas aŭtobiografia skizo, kolekto da travivaĵoj dum liaj noble plenaj jaroj deposed 1906. Tra ĝi entekse brilas la orfadenoj de liaj idealoj kaj vivceloj, al kiuj tiu morale kuraĝa homo oferis tutan sian forton.

Privat, kiel apostolo, ĵurnalisto kaj organizanto, estas por nia movado kolose signifa figuro. Al ĝi li turnis la penson de multaj eminentaj homoj, kaj lia oratora voĉo brave batalis por ĝi ĉe la Ligo de Nacioj, sceno sur kiu li longatempe aplikis siajn specialajn talentojn.

Esperantistoj rigardas lin ĉefgrave kiel brillan advokaton por nia afero. Tia certe li estas; sed kiom el ili scias pri lia multflanka laboro en aliaj altruismaj kampoj de homa plibonigo? Li pledis kaj agis por la sendependeco de la Poloj kaj aliaj popoloj; helpis al Nansen pri forigo de malsato, al Ceresole ĉe civila helpservo, al rifuĝintoj el Norda Italujo dum la Hitlera milito, kaj multalie. Sian altpostenan agadon por Esperanto li senĉese faradis dum li gvidis multajn komitatojn, verkis librojn, skribis artikolojn, faris universitatajn kursojn kaj ĉiam pripensis iniciaton de ankoraŭ novaj entreprenoj de socia bonfaro. Mondfederalismo, virina voĉdonrajto, revizio de la Charto de la U.N. ricevis subtenon per la manoj kaj menso de tiu persiste sindona viro.

Mankas al la Esperantaĵo de Privat la pacienca pedanteco de Pierre Corret. Homo de klarvida racio en aferoj, Privat tamen ne ĉiam montras tiun kvaliton ĉe frazoj. Ofte okazas pleonasma "pli" antaŭ "poste". "Pli poste" estas uzinda nur en okazo de neceso. Ekz., Poste mi faris ĝin... sed pli poste mi bedaŭris la agon.

"Centjaro" estas tralibre uzita anstataŭ la ĝusta "jarcento". Centjaro (Angle: centenary); jarcento (A. century). 15: abiturian. Ĉu ne "abituriantan"? Anstataŭ la Z-a "la sekvanta (tago)" ni trovas iufoje "la posta, la morgaŭa (tago)".

27: aranĝoj estis konkluditaj (finfaritaj). 40: afektiva (afektaĉa, afek-

tula?); 48: grandunifforma ofiĉiro (impon-, bel-, pomp-?). Certe ne grand-!

52: li estus devinta preni (li devus esti preninta?). La Privata formo signifas por ni: He would have been forced...aŭ, he would have had to take). Sed la senco ŝajne estas: he should have taken...

57: Eĉ farante sian devon de soldato, necesis memori pri la vero... Al kio rilatas la adverba participo? 58, 74, 76: speciale (aparte, precipe). 84: anglistiko. 86: moslema. Jam en E-o tri formoj! Islama, muzmana. Krome: mahometano!

90: Greka pago de domaĝo. Domaĝo, domaĝumo? Kompatinda vorto. 91: Si estis virino... membrino... kaj prezidantino. Ĉu necesas ripeto de la sufikso? 92: agon de... administradoj (-acioj). 110: studjo (radistacia "studio").

128: Zamenhof mortis pro ekkuŝo! Ĉu preseraro aŭ plummisajo por "okludo", "okluzo"? (Briquet, Waringhien).

Jam sufiĉe pri flankaj relative bagatelaj. Ni forlasu la "literecon" por reveni al la spirito. En Decembro 1916 Privat vizitis al Zamenhof. Aŭdinte el la animo de tiu kara homruino krion pri la amata idealo: "... la celo de mia tuta vivo. Por ĝi mi fordonus ĉion ofere!", la fidela disĉiplo sentis la dramatan alvokon sagi en sian koron, por ĝin potence influu dum ĉiu postea jaro. Povu, ke tiu ĉi malforta raporto simile efikas sur nian!

**La Vojo al Mondpaco:** 40 p., 4½ steloj. Interesa verketo, kies aŭtoro emfazas la vegetarismon kiel faktoron en la universala problemo de homaj terurilatoj. Ĉe Gunnar Rugland, Hornsgatan 89, tr. 2, Stockholm 17.

**La Konsumkoopera Movado en Svedujo** (J. Lundberg kaj T. Odhe), 24 p. Petu ĉe Koopera Federacio, Stockholm 15.

Traktaĵo pri signifa movado, kiu havis originon en Rochdale (Anglujo) en 1844. Tiu komerca sistemo organizas konsumantojn tiamaniere, ke ili kiel akciuloj fabrikas kaj provizas al si ĉiajn artikolojn bezonatajn en la ĉiutaga vivo. En Svedujo membroj nombras 5½ milionojn, t.e. 33½ elcenton de la loĝantaro. En Anglujo 12½ milionojn en 1960.

**Internacia Mondregno Kreiĝanta:** Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, Copenhagen F. Tradukis P. Zacho. 92 paĝoj. Prezo 13 steloj.

N-ro 9 en serio de E-tradukoj. La kvara ĉapitro de la ĉefverko "Livets Bog" de Martinus: ĝi temas pri politikaj kaj sociaj problemoj ankoraŭ agitantaj la homaron hodiaŭ. La ankoraŭ aktuala teksto restas sama kiel tiu de la Dana originalo de 1932j. La fragmento celas atingi la materiec-an menson, prefere ol la religian, tamen kelkaj paĝoj pritraktas la Biblian Eden-paradizon, kiel bazgrundon por sia prisocia tezo.

Ni dezirus, ke estu pli klare kaj nete esprimita la simbola vero de tiu stranga kaj vaste konata rakonto, kaj dirus, ke iuj teologiaj manlibroj jam ĝuste tion faris. La lingvaĵo de Martinus entute en ĉiuj liaj verkoj estas tro abstrakta, senilustra, por teni intereson de simplaj homoj, kiuj serĉas historiajn, vivbildajn analogojn kaj komparojn por kompreni al si la dirvojojn de la spekulativa aŭtoro.

La Kristana apologiisto C. S. Lewis tion faradis en ĉiuj siaj verkoj, same profundaj kiel tiuj de Martinus, kaj, por paciencaj legantoj, multe pli klaraj. Pensuloj, verkante, ne devas heziti antaŭ uzado de konkretaj okazaĵoj kaj konataj nomoj, kiam tia uzado helpas al pli rekta kompreno. Filozofie verkadi nur per ĝeneralaj, abstraktaj formoj, ignorante pli vivigajn esprimrimedojn, signifas nur tedi ver-serĉantojn.

Malgraŭ ĉio dirita, ĉi-libro morale postulas atenton de ĉiu en kiu ardas la ideo pri mondregsisistemo, kiel ĉef-elemento en universala paco.

**STEYR (Aŭstrio):** belkolora gvidfolio, kun E-a suplemento. Kun du aliaj, vi ricevos ĝin kont. I r.p. ĉe Internacia E-Muzeo, Hofburg, Vienna I.

**Granda Moravio:** Interesa por arĥeologoj. Eld. Parko de Kulturo, kunlabore kun la E-klubo en Brno. J. Vondroušek, Botanické, Zahrady 31, Brno.

**Smorrebrod:** Danish Sandwiches. Perfekta kolorreprodukto de sandviĉaj frandaĵoj lau la Dana kuirgenio. Plumroes Ltd., Copenhagen.

"NORDA PRISMO", red. F. Szilagyí. Dumonata. 2½ Usonaj dol.

"GEOGRAFIA REVUO" 4 n-roj por 1 dolaro Usona. Mr. A. Diaz, 27 Hanley Rd., Shirley, Southampton, Eng.

"OOMOTO": 18 steloj, regule aperas. Agento, la Redaktoro.

### ELDONEJO STAFETO

**Sen Paraŝuto.**—Originaloj kaj tradukitaj poemoj de Poul Thorsen, konata Dana literaturisto. 144 p., 1.20 dol. Usona.

**Sub Stelo Rigida.**—Islanda poemaro de Þorsteinn frá Hamri, trad. Baldur Ragnarsson. 132 p., 1.20 Us. dol.

### ELDONEJO KOKO

anoncas aperon en Aŭgusto de sia dua volumo de la Fabeloj de Andersen, tradukita el la Dana de Ib Schleicher. Bele ilustrita. 30 steloj. Kolby Kaas, Denmark.

### MUZIKISTOJ!

Por diskonigi konon pri la verko en taŭga rondo, ni sendos kontraŭ afranko: Lernolibro de Muzilo (20 steloj) kaj Muzilo-Kajero 1 (14 steloj) al muzikisto, kiu ĝin pripetos. Multe da bonekonataj arioj, plena informo pri ĉi nova muziknota skribo kaj termina vortareto.

MUZILO estas vorto prenita el Esperanto: instrumento (ilo) de la Muzoj. Havebla ĉe Prof-o H. Parizel, Frederikstraat 2, Dordrecht, Holland.

### BONVENON AL OSLO

We have received an excellent brochure with the above title, printed in 10,000 copies. This is the fifth time the Tourist Traffic Assocn. of Oslo and Region has issued an Esperanto folder. Some years ago it made a film under the same title with Esperanto commentary. It is still successfully shown in several countries. Groups should order free copies in bulk for distribution: Boks 942, Oslo.

### "LA SKOLTA MONDO"

Gazeto por Skoltoj. Agento: S. H. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, E.10, Victoria. Mendebila ankaŭ estas "Skolta kaj Tenduma Terminaro". 3 steloj.



## QUEENSLAND

**Rockhampton:** Mr. J. Matasin, of Sydney, spoke at the Rockhampton Esperanto Society on July 23 of his world trip, during which tour he used the language practically everywhere. The talk was illustrated with over 100 slides.

In Spain he visited a village where almost the whole population of more than 1000 spoke Esperanto. Crowds circled his car to ask what part of the world he came from.

Mr. Petley reports registration of some 55 fresh learners to the courses.

The "Youth of Tokyo" fund now stands at £14. The High School here ordered 24 textbooks for lunch-hour class. At another school 46 pupils have bought textbooks for similar class.

Mr. Petley is translating into Esperanto a 46-page booklet for a State promotional centre, which will be given world-wide circulation.

## LET'S BE LUMINOUS

In "The Age" (2/9) Dr. Margaret Mead, speaking of The Future as an Era of Shared Cultures, mentioned the need for a common secondary language and urged acceptance of a natural tongue for the role. "Not a European language," she warned, "for Asians would not accept it, although English speakers hoped they would."

Striving to inject "brightness" into depreciation of Esperanto, she held it to have failed, because "it was devised by bright people". When "bright people make up a language they are unable to build into it the necessary allowance for stupid people". She continued: National languages, polished and developed by time and mass usage, are learned by all, bright or stupid.

Letting pass the fact that Esperanto was devised by an individual genius, not by a bunch of "bright" people, we should have thought that a mother tongue, be it Basque, Gaelic or Finnish, is learned from the cradle on, and not by reason of any quality inherent in it.

To assume that the learning of another's tongue is something that "anyone can learn" does not impress us as being very bright.

## Lingvaj Problemoj

## REGNI?

"Fundamenta Krestomatio", kvara eldono, p. 297/17; komparu: 279, 17a eld. "frazo . . . kiam vi ĉesos **regni** super la spiritoj de la homoj!"

La vorto "regni" estas preseraro, kiun Z. korektis por la kvina eldono. Tamen la eraro ofte represiĝis en diversaj tekstoj, ekzemple Jaumotte (en Franclingva) kaj De Schutter (en Nederlanda traduko), ambaŭ eld. de La Belga Esperanto-Instituto: 1932, tiel faris.

En "Amerika Esperantisto" (Feb., 1921) instruanto (ĉu H. M. Scott?) streĉe eksplikas "regni", skribante, ke "tio estas la unusola ekzemplo de tiu uzo. Ĝi virtuale egalas 'regi', sed eble entenas pli pompan efikon pro sia sono kaj sia kunsignifeco kun 'regno'."

Tio pensigas nin pri simile amuza afero, nome, preseraro "orvelki" anstataŭ "forvelki" ĉe Fab. de Andersen, vol. 1, 97/3. La genia misinterpreto de Waringhien—"iĝi orkolora por velkiĝo"—ornamas la Plenan Vortaron sub "oro". The A.E., Marto, 1962; Lingvo kaj Vivo (Waringhien), p. 70.

## ESPERANTO—PONTLINGVO!

La tradukajon el la Kroata—"Traĝedio en la Universo"—tradukis en la Islandan B. Ragnarsson. Tio estis aparte tikla tasko, pro la mirinde genia esprimformado de la Esperanta teksto de Ivo Rotkvič.

"Mistero Minora" (Szilagy): La Pola Stat-presejo eldonis en 40,000 ekz. tiun originalan romanon, tradukitan el Esperanto en la Polan.

La originala romano "Kredu min, sinjorino", de Cesar Rossetti, jam elirinta en la Hungara lingvo, kaj tradukita (sed ankoraŭ ne eldonita) en la Polan, nun aperos en Japana traduko.

Aldonu notojn je p. 28, "Esperanto", Jan., 1963, kaj p. 84, Majo, 1964.

## JEREMIA 17/5

". . . la homo, kiu faris karnon lia apogo". Iuj E-istoj uzus "sia", pledante gramatikon korektecon. Tamen "lia" estas defendebla pro la logika senco: "kiu faris, ke karno estu lia apogo".

**BECAUSE . . .**

Interese estas, studi la diversajn manierojn per kiuj la angla "because" estas tradukebla en E-o: Jen,

(1) ĉar; (2) tial ĉar; (3) pro tio, ke; (4) tial ke; (5) pro ke (analoge kun "por ke"); (6) pro tio, ĉar.

Ekzemploj: Mi ne povas iri, ĉar mi estas malsana.

La E-istoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar ili . . . (Z., Unua Kongreso.

Ĉiuj ŝatas E-ton nur tial ke ĝi . . . (Z.)

Mi ne povas viziti vin, pro tio, ke (au, pro ke) mi . . .

Ne afliktiĝu pro tio ĉar la glavo formanĝas . . . (2 Sam. 11/25).

Rimarku, ke en la angla: "I am not writing to you because I love you" signifas: Mi ne amas vin; do ne skribas al vi pro amo, sed pro ia alia kaŭzo, motivo.

Metu komon post "you" kaj vi per tio havas signifon:

Mi amas vin; do ne skribas al vi (pro deziro ne dolorigi vin per ia skribajo).

Studu la sekvantajn frazojn: "Tial ĉar (pro tio ke) ni timis, ke pluvos, ni kunprenis niajn omŝ-relojn, ĉar efektive la barometro falis de kelka tempo".

Aŭ, pli bonstile: "Ni kunprenis niajn ombrelojn pro timo, ke pluvos, ĉar la barometro . . ."

**TRANSITIVA AU NE?**

Por multaj, estas malfacile, ĉu verbo estas transitiva au ne. La verbo mem ne montras tion. Tion oni devas scii per granda sperto kaj atento au per konsulto de vortaro, kiu indikas tiun verb-karakteron.

Por decidi, ĉu oni devas uzi "ĉesi" au "ĉesigi", "komenci" au "komenĉigi", lernanto devas konsulti la Plenan Vortaron. Cetere oni trovas multajn ekzemplojn sur paĝoj 182-187. Eĉ bone konataj adeptoĵ iufoje eraras, ekz. ĉe konfuz', konstern', ŝvel' terur'. Vidu: La Rondo, Dec., 1950, p. 321.

**LONGAJ KUNMETAJOJ**

Makulokululo; Levidoj 21/20. Penetrigintajo, 13/55. Tendananaro, Juĝ-istoj 7/21. Nemaalobeebla, Ester 1/19.

Mirindajsto, multinfanulino, unuenas-kiteco. (Poto rompita, kiu ne povas esti) tutajigita. Rimarku: ne "repaired" (riparita), sed "put together again" (kunpecigita, lau F. & L., sed ankaŭ "reunupecigita").

Ĉu vi povas trovi pli longajn ol tiuj de Kofman (La Iliado): malproksimenpafanto, ponardegojnjetistoj?

**La Lingva Akademio:** "La unuaj Lingva-Akademianoj en 1905 ne ĉiuj posedis la nivelon de Kabe kaj Grabowski; eĉ estis inter ili homoj, kiuj apenaŭ scipovis legi Esperanton".— W. F. Kruit, en "Laborista E-isto".

"En la unua Lingva Komitato, inter 100 membroj estis nur 10 kapablaj libere esprimi sian penson per klare aŭdebla buŝa parolo". (Petro Stojan, "Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto", p. 69). "Oni elektis grandiozan 'Lingvan Komitaton' kun 99 anoj . . . el tiu nombro nur 20 kapablis kontentige paroli en Esperanto, kaj el tiuj 20 eble 3 aŭ 4 kapablis serioze gvidi la lingvon." (same, p. 91).

**NEKLARA PAROLO KAJ SKRIBO**

Lordo Casey (kejsi) en letero al The Age (Melburno) 26 Aŭgusto: "Mi kredas, ke la plimulto da junuloj en Aŭstralio nebone sin esprimas parole kaj skribe. Tiu aserto ne estas pruvebla, tamen mi opinias ĝin laŭfakta, malgraŭ multaj esceptoj. Konsentas kun mi la plimulto da instruistoj, kun kiuj mi diskutis la aferon. Mi kritikis ne ian regionan tonakcenton, sed la evidentan malkapablon klareprime diri aŭ skribi kion junuloj deziras komuniki. Se ne korektita dum la lerneja tempo, tio daŭros dum la posta vivo.

"Malklara parola kaj skriba esprimado forte efikas kontraŭ sukceso en la vivo de individuoĵ. Malgraŭ la kresko de edukadaj faciligoj ĉe aliaj lernniveloj, mi kredas, ke tiu supra gravajo ne ricevas adekvatan atenton ĉe lernejoj aŭtoritatoĵ".

**Komente:** Logike konstruita lingvo, Esperanto certe efikas bone sur la uzadon ankaŭ de la gepatra lingvo. Studado de ĝi ordinare helpas ĉe korekta, klara esprimado, precipe ĉe inteligentaj junuloj. Se Esperanta verkaĵo estas nebone esprimita, tio indikas, ke (a) mankas al la aŭtoro

pensa kaj mensa klareco, aŭ ke (b) ankoraŭ li ne sufiĉe lernis la lingvon. Troviĝus ne malmultaj homoj al kiuj aplikigiĝus ambaŭ malavantaĝoj.

Komparu: artikolon sur p. 100, *The A.E.*, Okt., 1960.

### CITINDAĴOJ

"There are actually 5000 Esperantists in Zagreb"—R. H. M. Makarian in "*British E-ist*", 1/64.

"Ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj institucioj interpretistoj normale tradukas fremdan al si lingvon en sian gepatran, ĉar opiniate estas, ke eĉ la plej talentaj interpretistoj pli precize tradukas en tiu direkto".—R. Jossinet en "*Franca E-isto*".

"Jam de la infanaĝo mi aŭdis saĝemulojn antaŭdiri pri estonta milito kontraŭ Japanujo . . . Ili konjektis pri tio: kiom longe daŭrus vere kontentiga milito, kaj avertis, ke ni devos forcedi la Filipinajn Insulojn kaj poste kolekti fortojn por ilin regajni . . . kaj tielade plu.

"La militado ne estas mia metio, kaj mi konfesas, ke mi rigardas la profetatan militon kiel la aferon de junuloj nun en lernejoj aŭ de gepatroj ĉe farmbienoj atentontaj leterojn, kiuj neniam venos . . .

"Mi nur povas esperi, ke, se tia milito efektive venos, kaj se ni sukcesos en ĝi, ni tenos en penso, ke la venko estas la nia simple ĉar ni estas pli granda, pli multnombra, kaj tial ni ne tro fieros pri ĝi. Ĉar mi jam sufiĉe vidis Japanujon kaj la Japanojn por suspekti, ke tia venko estus nur ankoraŭ unu el tiuj sensentaj venkoj, kiujn la Historio blinde donas al Kvantio super Kvalito".—Alexander Woolcott (*Penguins*: 1934).

"Paul Robeson estas la plej granda muzikinstrumento kiam ajn farita de la Naturo". (Woolcott).

### DU VERAJ VOĈOJ

"Neniu alia ol planita internacia lingvo povas sekurigi liberan kaj universalan kontakton por ĉiuj popoloj unu kun alia".—Paavo Ravila, Helsinki Universitato. (El teksto en *The A.E.* 5/63.)

"Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom arta"—Zamenhof, *Fundamenta Krestomatio*, p. 313.

Grandaj mensoj, samaj pensoj.

### KRUCVORTENIGMOJ

Pro ia hazardo, favora al ĝi, la vorto IDO kelkfoje dum la jaro aperis en enigmoj de la plej vaste vendata jurnalo *Melburna*. La indikdifino estas "international language". Per tio la nomo Ido ricevas senpagan publicon, kiun pli ĝuste Esperanto meritas.

Supozinde, pro sia mallongeco la nomo estas oportuna por faristoj de tiaj enigmoj.

### "THE BRITISH ESPERANTIST"

(Junio, 1964): "*The Australian Esperantist* ofte enhavas trafajn propagandajn artikolojn ankaŭ en la angla lingvo". Ĝi menciis la front-artikolon de n-ro 36, kiu, laŭ ĝia opinio, estas taŭga esti flugfolio.

### KORESPONDADO

17 - jaraĝa gimnaziano: Choung Young-joon, 31-4 Ka Hi-dong, Chong-ro, SEULO, Koreo. Literaturo, p. markoj.

Emilja Ivanova, 15-jara, Sergej M. Kirov 10, Vraca, Bulgaria, volas korespondi.

### "NUNTEMPA BULGARIO"

Monata kultura revuo, 60-paĝa, kun Esperantaj rubrikoj. Plurkolora kaj belarte presata, ĝi estas ĉiam ankoraŭ pli vaste legata. Pri ĝia malalta abonprezo vin informu ĉe Current Book Distributors, 40 Market Street, Sydney.

### DIAFILMSTRIOJ

Rudolf Burda, Republikanska E 576, Plzen-Letna, Czechoslovakia, dez. interŝanĝi ilin por magia lanterno en kluboj. Li sendos Ĉ. S. striojn el 20-30 kolorbildoj kun E-igitaj tekstoj. Sendu unue kaj registrite. Li certe rekompensos per sama kvanto.

### ZAMENHOF KAJ LA ANGLA

Skribis Zamenhof: ". . . estante en la 5-a klaso de la gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan." (Letero al Borovko.)

H. Holzhaus: "En rusaj klasikaj gimnazioj oni ne instruis la anglan lingvon". Same asertas D-ro A. Einihovici (Perth).

Jen mistero, kiun eble la sekvantaj vortoj helpas solvi: "D-ro Im. Olsvanger supozis, ke la anglan lingvon

Zamenhof lernis private, ĉar en la rusaj gimnazioj oni tiam NE lernis la lingvon. Samtipe gimnazon finis D-ro Olsvanger kaj mi. Verdire la anglan oni ĉe ni ne lernis. Tamen en kelkaj gimnazioj, kie ekzistis sufiĉa kvanto da volontuloj, oni eble aranĝis apartan, eksterprograman kurson. Guste tiel mankas en la abitur-atesto de L. L. Zamenhof noto pri la angla lingvo". (Letero de Prof-o J. Kohen-Cedek al F. R. Banham.) "Zamenhof" (M. Boulton), p. 27 kaj 32.

### KOMUNA BIBLIO?

Patro W. M. Abbott, S.J., en "America" (10/59) skribis: "Komuna traduko de la Biblio estus granda farindajo en la historio de Kristaneco . . ." Li menciis, ke Romkatolika grupo en Britujo lastatempe studis la Revised Standard Version kaj konstatis, ke nur proksimume 20 ŝanĝoj en la teksto farus ĝin akceptata de Romkatolikaj legantoj.—F. F. Bruce: "The English Bible", 1961.

Cetero, estas sciinde, ke en artikolo ("Espero Katolika", Apr., 1963) W. Flammers klare evidentigas, ke por Romkatolikoj la Esperanta Biblio ne estas kontentiga, kaj li pledas por nova traduko, kun aŭtoritata notaro, akceptinda kaj -enda por siaj sameklezianoj. Ĝin, kompreneble, oni farus sub aŭspicio, permeso kaj aprobo de la eklezio.

### POLUJO - VARSOVIO

Utila gvidfolio al Varsovio kaj Polujo entuta estas havebla kontraŭ 1 r.k. ĉe Pola E-Asocio, Nowy Swiat 27, Warsaw. Ekzemplero ornamu vian muron, al kiu vi povus ĵeti rigardon, por scii, kiel literumi la ofte neklarajn adresojn de viaj Polaj plumamikoj.

### MOSKVO — ESPERANTO

Post silento de 28 jaroj aperis en Moskvo libro en Esperanto—"Kantoj de Sovetaj Komponistoj".

### BENGALO — ESPERANTO

La unuan fojon aperis en Hinda indiĝena lingvo libro pri Esperanto...

pro decido de la Bengala Literatura Akademio verki artikolon por ĝia nova enciklopedio.

### BELE IRONIA!

Organizajo por interpreta servo—Centro Traduzioni e Servizi di Congresso—serioze (?) proponis al la Kongresa Komitato de la 19a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso en Vraca (Bulgarujo) organizi samtempan interpretadon en kelkaj lingvoj por tiel "helpi" la kongresan laboron. Ni rapidas diskonigi tiun "trafan" proponon, ĉar eventuale ankaŭ aliaj E-kongresoj ŝatus profiti la helpemon de tiu afabla organizo. Estus bedaŭrinde, se ili ne antaŭvidis en siaj buĝetoj sumojn por teknika interpretado.—"Bulgara Esperantisto".

### SAT-ANO PAROLAS

"Se ne ekzistus la nuntempa fortekvilibro inter la grandaj antagonistoj okcidente kaj oriente, kaj la timo antaŭ la detrua efiko de l'atomarmilo, kiu neniiĝus eĉ la instigantojn mem, tiam militego denove estus sur la tagordo".—N. Bartelmes, en "Sen-naciulo".

### AND IN ENGLAND!

Stoke-on-Trent.—Zamenhof Street is to be near Esperanto Way, says "Worker Esperantist".

Harold Wilson, leader of the British Labor Party, greeted H. Barks in Esperanto on seeing his green star. It seems that Mr. Wilson learned Esperanto when he was a Boy Scout.

### STATE REPORTS

With regret the Editor has again had to omit the Australian Chronicle of club activities through pressure of work at the secretarial office, whither they are customarily sent.

Two more numbers are in progress of compilation for this year, making six in all. Copy will be sent to printers early in October and November.

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 42 (122)

MELBURNO

Okt. - Nov., 1964

---

## FOREIGN LANGUAGES AND ESPERANTO

Useful is that which serves. What service does one expect from a language? Clearly, that it enable communication with those who speak it. A language, then, will be the more useful if a large number of people use it? Not exactly, for then would come to mind Chinese, Hindi, Arabic, Japanese.

For us, in our present situation, it is necessary rather to consider the languages of our Western civilisation. In the order of their numerical expansion, or density of usage, the most useful would then be: English, Russian, Spanish, German, Portuguese, to speak only of those surpassing French in the number of users.

For each of them, however, usefulness stops short at the limits of its domain, or in regions where it enjoys a certain prestige. If English on occasion serves you in Norway, you find German doing so in Sweden.

The usefulness of an instrument depends also on the facility which one may avail oneself of it, without an outlay, say, of six years or more in its acquirement. All languages are more or less difficult, and rare are those who acquire "linguistic consciousness" of a foreign tongue. Hence the inferiority complex of the Englishman who stands in fear of an error in gender; or of the Frenchman who blushes at his mispronunciation of English.

Esperanto is the easiest language to learn; it has no irregularities. Its domain has no limits, for today, through the zeal of its adepts, one may meet, in any part of the civilised globe, people who use it.

The useful language, then, is the international language. This is true not only for Europe but for the world. This is true today, and will be truer still tomorrow, when with yet denser and wider expansion its usefulness will have increased.

To usefulness and facility—practical advantages—Esperanto adds formative and cultural qualities. Educative, because language is the mould of our thinking, and it is desirable to cast it in a logical form. Truly civilising, because it expresses no nationalism or imperialism, but is motivated by, and dedicated to, the generous ideals of human brotherhood.

Our scholastics give inadequate thought to the usefulness of languages introduced into our educational centres. The day may come, however, when reason will assert itself and, as Nietzsche prophesied, the heads of children will be filled with living ideas and not dead words.

---

### PETO DE RUSO

En "Svisa Espero" 8/64 Rusa instruisto petas pri E-a lernlibro, ĉar li "ne povas akiri" ĝin en la Sovet-Unio. Atesto malimplica pri la fakta situacio de nia movado en tiu landego, lulilo de E-o mem.

## Australia Kroniko

**ADELAIDE:** La ĝenerala jarkunveno de la Adelaide Esperanto-Klubo elektis S-ron Len Newell prezidanton, post la rezigno, pro malsano, de Kolonelo Dave Fulton, tre kapabla kaj konscienca prezidanto ek de la fondiĝo de la klubo. Oni dankis la Kolonelon pro lia laboro kaj deziris al li feliĉon kaj sanon en la estonteco. Oni reelektis Rex Hanney kiel sekretario-kasiston kaj S-inon Beryl Randles librovendiston.

Oni kreis novan oficon de helpsekretario kaj elektis al ĝi S-inon Thea van den Boogaard, tre entuziasman junulinon, kiu, ni esperas, vigligos ne nur la Adelajdan Klubon, sed ankaŭ la Aŭstralian movadon. Jam ŝi sugestis planon prezenti Esperanton en trafa alloga formo al la gejunuloj de Aŭstralio (vd. A.E. Jan.-Feb., '64). Oni esperas ke ŝi ricevos la subtenon de multaj aliaj Aŭstraliaj Esperantistoj, krom tiuj de Adelajdo.

La klubo ankoraŭ kunvenas ĉiun merkredon en la "South Australian Institute of Technology". S-ro Newell gvidas kurson por progresintoj, el kiuj kelkaj esperas ĉeesti la Univ. Kongreson en Tokyo la proksiman jaron.—Rex Hanney.

(La granda E-Fr. Vortaro de War- inghien kaj tiu de Albault (Fr.-E.) donas: Adelaido. Tiuj vortaroj estas pli influhavaj ol tiu de F/L (kiu donas: Adelajdo), kaj la nomo de la ĉefurbo en Esperanto meritas konsideron de la Klub.—Red.)

**PERTH:** Spite de malbona vetero 17 anoj kaj amikoj vizitis la belan domon de Ges-roj W. H. Howard ĉe Floreat Park. Niaj gastigantoj akceptis nin ne nur kun afablaj ridetoj, sed ankaŭ kun diversaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj. S-ro Howard invitis nin al "ĉevalkonkurseto", kiun li estris ĉe la ludotablo. Tio donis oportunon al multe da praktikado en la kara lingvo. Fine, S-ino Howard, regalis nin per alloga vespermanĝo. Samvespere, ni ĝojis revidi, post longa malsano, nian malnovan membron S-ino Fidock.

Gratulon al S-ro Howard, kiu jus sukcesis en la Duagrada Ekzameno de nia Ligo.

S-ino O. Malcolm, nia Bibliotekisto, estris "Libro-Vesperon". La tablo estis ŝarĝita per libroj el la libro-

ŝranko. Turninte la paĝojn, ĉiu anoj ĉerpis kaj legis allogajn ĉapitrojn kaj vice resumis kelkajn el niaj plej ŝatataj verkaĵoj. Tiel la uzado de la Biblioteko ricevis stimuleton.

Dum la vintro S-ino G. Pollard gvidis 20-semajnan kurson ĉe Armadale. La studentoj estis tre viglaj kaj submetis sin al ekzameno (2-a Sept.). Kune kun la anoj de nia Ligo ili festis la finon de la kurso dum Amuzvespero en la St. Andrews Halo (9-a Sept.).

S-ro Walker suferis pro akcidento ĉe sia hejmo. Kelkaj anoj vizitis lin ĉe la malsanulejo "Woorloo". Nia sekretario, S-ino A. Sedgley, bedaŭrinde ankaŭ malsaniĝis kaj nun kuŝas en la Sir Charles Gairdner Hospitalo. Dum ŝia malsano F-ino A. Longson anstataŭas ŝin kiel sekretario. Post longa vojaĝo tra Eŭropo, dum kiu li ankaŭ partoprenis la Univ. Kongreson en Hago, D-ro A. Einihovici (kun edzino) revenis al Perto. Kun intereso ni anticipas prelegon de li pri liaj spertoj eksterlande.

**SYDNEY:** La Esperanto-Kooperativo jus finis profitdonan jaron. La jara raporto montras net-profiton de £1106. La Ĝenerala Kunveno okazis je 17-a Sept. kaj decidis pagi 5%-an Dividendon al siaj akciuloj. La nuna akcia kapitalo estas £3019.

**MELBOURNE:** La E-ista vivo ĉe nia societo vere viglas ĉi-jare. Okazas 2 klasoj por komencantoj, unu kurso por progresintoj kaj Traduka Klaso, ĉiulunde inter la 7-a kaj 9-a. La grupvespero okazas de la 9-a ĝis la 10-a. La propra E-Domo multe helpas al nia sukceso, sed ankaŭ aliaj faktoro kontribuas al la vigla agado.

En Januaro alvenis ĉe ni el Londono F-ino Helen Prent, denaska E-istino, filino de la bonekonata brita E-redaktoro Ethel Prent (de "Worker E-ist"). Por Helen Prent Esperanto ne nur estas la gepatra lingvo, sed ŝia multflankeco kaj laboremo multe kontribuas al nia nuna sukceso. Helen elektigis 2-a sekretariino, gvidas kurson por komencantoj, elektigis prezidanto de la junula grupo kaj organizis tre sukcesan junulan koncerton. Depost ŝia ekloĝo en la E-domo antaŭ kelkaj monatoj ŝi nun ankaŭ agas kiel gardanto kaj "anĝelo" de nia domo.

Ĉe la ĝenerala kunveno elektigis la jena komitato: Prez. S-ro E. Mc-

Kenzie; Vic-prez., S-ro W. J. Drummond kaj S-ino Valda King; Sekretarioj, S-ro H. Koppel kaj F-ino Helen Prent; Kasisto, S-ro M. Cohen; Direktoro por Kursoj, S-ro M. Leereveld; Bibliotekistoj, S-roj Ivan Heldzingen kaj Danny Kane.

La 10-taga vizito de la angla E-propagandistino Doris Worcester (2-11 Aprilo) revene al Japanujo de granda mondvojaĝo fariĝis elstara evento por nia movado. Nia kapabla samideanino aperis ĉe la A.B.C. Televida Stacio, ĉe 3KZ Radio kaj estis intervjuita de provincaj radio-stacioj kaj lokaj gazetoj. Dufoje ŝi plenigis la Esperanto-Domon kaj alparolis la 2-an Melburnan Klubon, "Orientaj Antaŭurboj".

S-ino Fay Koppel komencis serion da literaturaj prelegoj: 2 prelegoj pri Grabowski, pri Kabe, la "Hungara Periodo" kaj pri K. Kalocsay. La ĉi-jaran Amerikan Teon partoprenis 55 personoj (29-a Junio) kaj la rezulto estis profito de £34-5-6.

La lastan lundon en la monato ni ĉiam dediĉas al la komencantoj kaj havas, kredo aŭ ne, anglan prelegon. Tiu arango ne havas la aprobon de la "ortodoksaj" Esperantistoj, sed la rezulto estas ke 40-50 personoj ĉiam ĉeestas je tiu vespero kaj bona kontakto kreiĝas, super vespereangeto, inter la malnovaj kaj novaj klubanoj. Je tiuj kunvenoj prelegis, ĉiam kun lumbildoj: F-ino Amy Godfrey pri Hindujo, Irano, kaj Turkujo; S-ro Ryding pri Bulgarujo, Malaja instruisto pri sia hejmlando; S-ro E. E. Thompson pri vojaĝo tra Europo, F-ino J. Billham pri laboro kiel flegistino en Nov-Gvineo kaj S-ro Fordham pri vizito al Skandinavio kaj Francujo.

"La Junularo prezentas" estis la titolo de koncerto je 31-a Aŭg. organizita de Helen Prent kune kun Marguerite Fink, Heather Clarke, Margaret Nicholson, Ivan Heldzingen kaj Danny Kane. Monkolekto por la junula kaso rezultigis £5-10-0.

Lastvendrede en ĉiu monato okazas la RENDEVUO en kiu prelegis S-ro Ryding pri Hong Kong; Amy Godfrey pri Cejlon; S-ino I. Fink kun memfaritaj filmoj pri la agado de la E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj; Ges-roj Hanks pri la mirinda Mallee-Birdo; D-ro A. Fridenbergs pri "Krimo kaj puno"; kaj en Aŭgusto

venis speciale al Melburno S-ro Percy Hoimes (Seymour) por prelegi kun diapozitivaj kaj sonbendoj pri sia vizito al Germanujo.

La E-Kooperativo faris ĉi-jare profiton de £159 kaj la jara kunveno (19/9) decidis pagi 4%-an dividendon al siaj 43 akciuloj. La akcia kapitalo nun estas £5018.

### ROCKHAMPTON (Kvinslando):

Two entries for the Tokio Youth Competition; several more expected by end of September. Lunch-hour class at High School: 13 of 24 interested have bought textbooks.—Press report from Mr. H. V. Petley.

### LIBERA FORUMO

#### "Junulo al Tokyo"

La sugesto de S-ino T. v.d. Boogard ke A.E.A. sendu junulon al Tokyo estas ja ekzameninda—sed de kia vidpunkto??

Cu dezirinda estas la lernado de Esperanto pro nur egoista celo gajni valoran premion?

Troviĝas inter la gejunuloj multaj, kiuj tre facile povas lerni kaj tre brile sukcesi, sed, post gajno de premio, jam ne interesigas pri la studtemo. Antaŭ ol promesi la monon de helpopretaj malavaruloj kaj negrandaj klubkasuloj, mi sugestas, ke klubkomitatoj zorgeme ekzameni la historion de pasintaj jaroj. Post 12-jara agado en la Melburna E-Societo mi konstatis, ke estas la plej brilaj kaj plej esperigaj studentoj, kiuj plej rapide forlasas la Movadon. Krom la junaj gajnintoj de la 1960-a Hobarta ese-konkurso, mi povus citi almenaŭ kvin kiuj gajnis la Pyke-premion. Eble klubanoj en aliaj ŝtatoj povos aldoni al la listo.

Cu juste al la malpli brilaj, sed pli fidelaj anoj, ke oni eble malŝparu monon por simila rezulto?

—Fay Koppel (Melburno).

### Nova Esperanto-Stilo

En sia recenzo pri la libro "Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto" nia redaktoro nomas la Majstron "glora Pol-Hebreo". Kvankam ĉi tiu es-primio estas ĝusta laŭ historiaj faktoj, ŝajnas al mi ke tiuspeca E-jurnalismo ne nur kreus strangan novan

stilon, sed tia stilo estus eĉ tute "MAL-Esperantista", ĉar ĝi klasifikas homojn laŭ naci-religia deveno.

Homaranismo, Internaciismo, Universalismo aŭ Sennaciismo ĉiam strebas al la forigo de tiuj "muroj de miljaroj" kaj ne al la kreo de "lertegantaj" novaj.

Tamen, ni imagu, do, artikolon en ĉi tiu "nova" stilo:

"La granda Hungar-Katoliko Kalocsay ĵus vizitis la Londonan E-Klubon. Anglo-Protestanto Holmes kore bonvenigis lin kaj prezentis lin al kelkaj elstaraj ĉeestantoj. 'Permesu ke mi prezentu vin al la Brit-Kvakero Montagu Butler', diris Anglo-Protestanto Holmes. 'Kaj jen estas Kroat-Katoliko Ivo Lapenna!' D-ro Lapenna embarasite respondis: 'Kiel Universalisto mi ne ŝatus malargmense nomi min Kroato, nek mi praktikas la katolikan kredon. Prefere, do, vi povas nomi min "Jugoslav-Liberpensulo". Ili iom pridiskutis la bedaŭrindan morton de la Japan-Budisto D-ro Yagi.

Subite Anglo-Protestanto Holmes embarasiĝis: En la angulo amike babilis niaj grandaj poetoj William Auld kaj Marjorie Boulton. Li sciis ke W. Auld estas Skoto kaj M. Boulton Anglino, sed kiel "korekte" prezenti ilin al la granda Hungar-Katoliko?

Alproksimiĝante al la 2 grandaj poetoj, li diris: 'Jen estas nia granda Hungar-Katoliko Kalocsay. Mi ŝatus prezenti vin ambaŭ en la nova Aŭstral-Protestanta Bahama stilo, sed malfeliĉe mi neniam interesiĝis al kia religia sekto vi apartenas.' Niaj poetoj ridetis: 'Nomu nin Esperantistaj Homaranistoj', fine diris William Auld, kun flagreto en la okulo.'

—Aŭstr-Liberpensulo Herbert Koppel.

Tiu formo estis uzita por eviti jam evidentajn aŭ eluzitajn, kiaj "Zamenhof", "la elpensinto de Esperanto", "la kara Doktoro", "la amata Majstro" k.a. Estas strange, sed ankaŭ supozinde, ke "Pol-Hebreo" povas porti utilan informon eĉ al iuj E-istoj.

Tiu unuopa kaj senĉava uzo havas nenian rilaton al absurda fantazio, kies aŭtoro sprite enskribis dekon da propranomoj epitetoj tute nenecesaj al la kunteksto.

Tamen ni dankas lin pro lia kondona klasifiko pri konataj E-istoj, kaj admiras lian intiman scion pri ili.

(Findire, ĉu "lertegantaj" signifas "lerte legantaj" aŭ "lert-elegantaj"?). —Red.

## LINGVA PRIBABILO

"A.E.", p. 22, kol. 2, oni legas: "Auld kaj Rossetti faris la akton . . ." La aŭtoro volis pli intensan vorton ol "agon", nome vorton, kiu enhavu ideon pri "ago, kiu estas jam fakte atestita, kvazaŭ jure registrita, de la historio".

Jen ekzemploj: "via elpaŝo estis nur akto de . . ." Originala Verkaro p. 531. "kiam venis la ĝusta akto . . ." La Gimnazio, p. 64. "tiel solenaj, kiel ĉe la plej sankta akto . . ." Fab. de Andersen III, 61. "en la aktoj de ambaŭ edzoj" Batalo de l'Vivo, 58/21. "la kiso havis sian komencon en la akto patrino . . ." Fund. Krest. 198/22. "Tio estas ankaŭ akto de amo", Marta 2/12, 14, 15, 16.

En tiuj frazoj la vorto "akto" certe signifas fizikan faron de persono. En la sekvantaj ĝi signifas ian skribitan atestilon: "Kiel oni vidas el la preparaj aktoj . . ." F. Krest. 71/14. "aktoj parlamentaj" Batalo de l'Vivo 19/8. Ne tuj klara estas la senco de ". . . en la policejo ĉe la enuigaj aktoj". Fab. de A. vol. 1, 88/-7.

Strange estas, ke vortaristoj rifuzis registri la unue menciitajn sencojn. Vidu ekzemple la Planan Vortaron. Waringhien en sia E-Fr. vortaro difinas per: acte (teatra); acte (juro), piece (d'un dossier); document (d'archives etc.).

"Suriĝi la ŝipon". Sajnas klare kaj korekte, uzi akuzativon post -iĝ, kiam temas pri pezo, distanco aŭ direkto. Ekz. "Li malpeziĝis tri funtojn en unu semajno". Li proksimiĝis tri futojn al la serpento". "Li lace suriĝis la ŝipon".

Se mi estus sana, mi estus feliĉa.—Nerealo. Se mi estos sana, mi estos feliĉa.—Potencialo. Mi volus . . . Mi dezirus. ke . . . Realo, sed ĝentile montrante, ke la propra deziro ne estas absoluta.



**Antaŭ ol, antaŭ kiam?** Zam. ĉiam uzis "antaŭ ol". "Antaŭ kiam" ne estas trovebla en la Z-verkoj.

"Ol" montras komparon, rilaton de supereco au malsupereco. "Antaŭ" egalas "pli frue". "Li venis antaŭ mi", t.e. pli frue ol mi venis. Do logike en tiaj frazoj "antaŭ" postulas post si la konjunkcion "ol".

Se "antaŭ" kun verbo egalvaloras "pli frue" kaj postulas "ol", same la prepozicio "post" egalvaloras "pli malfrue" kaj devas ankaŭ postuli la konjunkcion. Diru: "Post ol la kurteno falis, oni aplaŭdis la . . ." "Post ol manĝi, la pastro diris . . ."

Tamen estas certe, ke Zam. ne uzis "post ol". Kiam oni sentis la bezonon havi specialan esprimon por tiu ideo, oni elpensis "post kiam", kvazaŭ ne memorante pri "antaŭ ol", nek atentante la necesan rilaton inter "antaŭ" kaj "post".

Ne necesas diri: "Post kiam li estis kantinta . . ." Diru: "Kiam li . . .", au simple, "Kantinte . . . li . . ."

- (a) Antaŭ ol. Zamenhofa, kaj sole konforma al la Fundamento.
- (b) Post ol. Ne uzita de Zam., sed plene aprobita de li.
- (a) Antaŭ kiam. Uzata nur de malmultaj aŭtoroj.
- (b) Post kiam. Pli ofte trovebla, eĉ, mi pensas, en la lastaj verkoj de Zamenhof.

La unua paro ŝajnas havi por si la aŭtoritaton de la Fundamento.—E. Boirac, Oficiala Gazeto Esperantista, N-ro 57, 25 Julio 1913.

(Kabe uzis "antaŭ kiam" tre ofte en La Faraono, 1912.—Red.)

"Nobel'" estas substantiva, do "nobelulo" aŭ havas nenian sencon aŭ signifas "ulo rilatanta al nobelo", parenco aŭ servisto de nobelo, aŭ eĉ persono, kiu afekta manierojn aŭ vortojn de nobelo, kiel en La Burĝo Sajniganta Sin Nobelo" (Moliere). estus nobelulino . . ." Tuj poste oni legas trifoje "nobelo(j)", do Zam. evidente volis ne ekvivalentigi "nobelulino" kun "nobelino", kiuj signifas: virino havanta nobelecon en propra rajto. Li uzus ĝin sence de: parenco de nobelo, virino apartenanta al la nobelaro.—Oficiala Gazeto E-ista, Marto 25, 1914.

## LA AKUZATIVO

Sekvas ekzemploj de uzoj iafoje kuriozaj kaj plejparte arkaikaj, sed pri kiuj estas bone, ke ekzamenotoj, kaj -antoj, sciu pri ilia ekzisto.

Post substantivo: elekto min (Originala Verkaro, 501); fermado ĝin (Fund. Krest. p. 198, 17a eld., 199 en la 9a eld.); malamon konservanto (Dua Libro, represo F.K. (p. 329, 9a eld.); vastigado ĝin, komparado ĝin ("La E-isto"); uzado ĝin (Dua Libro, Aldono); alkalkulado ĝin (Alvoko al la Diplomatoj, 1915). Egalas: de —o.

Post adjektivo: inda nenian atenton ("Esenco kaj Estonteco"); inda vin (Marta). Inda de . . .

Post verbo: iros ĝin (Juĝistoj 2/22); konigi tiun ĉi lingvon ("La E-isto"); tiu gravediĝis malbonon (1908, Psalmo 7/14; Biblio, 1926: gravediĝis per malbono).

Li . . . kolektis . . . kolocintojn, planan sian veston (2 Reĝoj 4/39); la sepan tagon estas sabato (Levidoj 23/3).

Vojon Hispanujon, Hindujon (Rabeno de B. 8 kaj F.K. 270, 9a eld.).

En letero al Fruitier (1907) Zamenhof skribis: "Defendinto la patron mi ne konsilas uzi, sed mi preferas defendinto de la patro".

Vidu planan pritrakton en "Lingvo kaj Vivo" (Waringhien) aŭ represon en "La Progresanto" (Nederl.) 1955-6.—F.R.B.

## DENOVE HAVEBLA

La bona libro de S-ro P. E.

Schwerin

## GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

Tre taŭga libro por viaj klub-vesperoj Spritajoj, Vortludoj, Preseraroj, Anekdotoj, Matematikajoj, Rimajoj, Societludoj, Konsilioj por grupestroj kaj kursgvidantoj, Demandaro.

Prezo: 3/6.

Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo aŭ de S-ro P. E. Schwerin, 12 McDougall Street, Milsons Point, NSW.

## KORESPONDADO

Polo 20-jara, kun junulino, prefere en Esp-o; aŭ angle, pole, ruse, germane, itale, hispane, latine, greke. U.N. Andreo Marŝaŭkovski, Poŝtfako 254, GDANSK 1, Poland.

## Recenzoj

### "Nia Historio"

Detala pritrakto 159-paĝa pri la historio (1911-61) de la **Kristana Esperantista Ligo Internacia**, verkita de D. de Hoog L.A. Bindita 22 steloj; broŝ. 18. Mendu ĉe A. v.d. Land, Hogerbeetsstraat, Wassenaar, Holland.

Jen, ne kompilo da grizaj faktetoj kaj seka statistiko, sed atentotira rakonto de nasko kaj kresko de kolorplena komunumo en kiu sinceraj animoj strebas al sia idealo. Verkis ĝin homo literature dotita, kiu scipovis vefte-varpi en sian kronikon multajn valorajn konojn pri la E-a historio entuta. Krom tio, legantoj, pro lia vasta scio kaj plumuza talento, revivas la krizojn de Eŭropo perturbata dum kvin jardekoj, kaj partoprenas la barakton de ĉi tiu Esperanta fakanaro kontraŭ inundo da malfaciloj.

Paul Hul'ner en 1908 eldonis Kristanan gazeton kun . . . 8 abonantoj. Hodiaŭ la adreslisto de KELI enhavas 63 paĝojn, plejparte de Svedaj kaj Nederlandaj membroj.

Havante bazon de fido: ke la Biblio havas absolutan aŭtoritaton por doktrino kaj vivo, kaj ke Jesuo Kristo estas la Solenaskita Filo de Dio kaj Sola Savanto de la mondo, la organo de la ligo, "Dia Regno", pro konscienco devas kritiki certajn tendencojn en la E-a literaturo. Ĉiaj recenzoj enhavas tian sukan kernon de dirindeco, kia vekas diskutemon ĉe alipensuloj. Neniām banalaj, ili ordinare miksas firman opinion kune kun tioma simpatio permiesebla inter sia kredkadro.

Inter aliaj interesajoj ni ekscias, ke oni dankas al J. H. Fred la tradukon de Alta Kanto de Salomono, kiu troviĝas en la E-a Biblio, ĉar Zamenhof nur iom ĝin reviziis. Simile Zamenhof uzis por Rut la tradukon de E. Neumark (1893). Kontraŭ la diro, ke Z. finis la tradukon de la Biblio en 1917, "nur mallongan tempon antaŭ sia morto", staras la fakto, ke ĝi estis fintradukita jam en Marto 1915 (Orig. Verk. 567).

La "Historio" donas lokon al preskaŭ ĉi simila Kristana agado sur la pres- kaj agitkampoj: La Kristana Revuo (1927-31) tute farita propramane de "la plej rimarkinda KELI-

ano", F-ino F. Hanbury; La Eklezia Revuo (Ashley, 1917-22); la eldonoj de L. Jenkins kaj la Kvakeraj. Registro de personaj nomoj faciligas citserĉon.

Utila kaj inspira verko, kiu ne manku sur breto de ĉiu Kristana E-isto kaj ĉiu, kiu sekvas la zigzagojn de entrepreno fondita sur la fido de bravaj homoj.

### "ESPERANTO?"

**Eldiroj de Eminentaj Polaj Intelektuloj.** Kompilis per intervjuoj Walerian Włodarczyk, ul. Suchodolska 18-7, WARSAW. En Esperanto kaj la Pola. p. 152.

Jen ni havas eldirojn de 36 elstaraj Poloj. Ili sin esprimas tre diverse pri la lingvo kaj ĝia situacio en la monda socio. Ili unuanime konsentas inter si pri io, nome admiro al ĝia homama idealo interfratiga, sed ne tiel samopinie ili sintenas pri ĝia lingva kaj literatura pretendo kaj ĝiaj ŝancoj de ĝenerala akcepto kaj la metodoj tion efektiviĝi. Ni ekzempligas per subaj citoj.

Kelkaj el ili certe modifus siajn dubojn, se ili intimiĝus pli profunde en la lingvon mem. Ellerno de E-o forigus el ilia menso iujn miskomprenojn, erarajn konceptojn, kiuj nebuligas la penson de rektaj kontraŭuloj al la lingvo. Aliflanke, avertoj kaj priduboj de kelkaj el la forte objektivaj ne-Esperantistaj simpatiantoj povas servi kiel saniga duŝo al trooptimisma fantazio de superfervoraj E-istoj.

El la 36 nur ĉ. ses estas E-istoj. Iom el la aliaj diletante lernludis ĝin iam dum la vivo, kaj ankoraŭ parolas pri ĝi kun sentimentalo. Estas signife, ke la konfesantaj E-istoj ne sentas dubon pri ĝia ĉiufanka kapableco. ("Esperanto estas la sola fremda lingvo, kiun mi scipovas uzi parole kaj skribe sen malfacilaĵoj", atestas unu el ili, D-ro Hausbrandt.)

Almenaŭ kvar emfazas malfacilaĵojn, kiuj frontas provojn enkonduki E-on en la lernejojn; unu-du pridubas ĝian farindecon, pro tio, ke emas forgesi lingvon homoj nehavantaj sufiĉe da uzokazoj en posta tempo. Tiu penso levas la demandon pri la efektiva valoro de amasa infaninstruado,

pri kio kelkaj pedagogoj preferus vidi venkon ĉe akademiaj rondoĵoj, kolegioj kaj similaj altedukejoj. Per tio E-o gajnus rajtojn de agnoskita fremda lingvo ĉe diplomekzamenoj. Lastatempe E-o faris signifajn antaŭenpaŝojn, ekzemple en Nederlando kaj Hispanujo. (D-ro Neergaard preparas liston de katedroj kaj lektoratoj Esperantaj.)

Simpatie, sed ne samsente! Iu plendas pri "manko le riĉa sinonimeco en E-o"; alia asertas, ke ĝi havas "longan liston da homonimoj kaj sinonimoj".

P. 103: "E-o ne estas vivanta lingvo". P. 120: "ke E-o estiĝis ankaŭ lingvo originala, ne nur lingvo de la tradukitaj verkoj, povas atesti pri ĝia vivanteco". 128: "Pri ĝia vivanteco atestas . . . la fakto, ke . . ." 133: "La Kongresojn (ktp) mi traktas kiel pruvon de la vivanteco de E-o" . . .

Al unu simpatianto "estas malfacile imagi originalan Esp. verkadon, ĉar ĉiu lingvo respegulas multjarcentan kulturon . . . kaj E-o ekzistis apenaŭ 75 jarojn". Alia demandas: "Ĉu verkoj tradukitaj en E-on povas plenumi la bazajn kondiĉojn de la tradukado? Mi ne scias, ĉar mi ne povas kompari". Ankoraŭ alia: "Se E-o havus propran literaturon, kompareblan kun kiu ajn monda (nacia?), literaturo, tiam mi lernus ĝin".

Respekte ni petus ilin, ke ili lernu E-on kaj mem legu certajn nomindajn verkojn en tiu lingvo. Tiel dece faras scienculoj, serĉantoj al la vero.

Interesas Aŭstralianojn tio, ke E-istoj petis al D-ro Jerzy Loth, ke li faru prelegon pri Polujo, kiam li vizitis Melburnon okaze de la Olimpiko 1956.

La kompilo, kiu estas imitinda en aliaj landoj, meritas atingi sian celon — vastan, fruktigan diskonigadon pri E-o en rondoĵoj, kiuj ĝis nun restis nepenetreblaj por nia prinfirmado.

**Sub Stelo Rigida:** Porsteinn fra Hamri. Prologo kaj traduko de Baldur Ragnarsson. Eldonis Stafeto. 132 p. 1.20 Us. dol.

Signifa verko, ĉar ĝi estas voĉo el etnombra popolo, kies lingvo restas preskaŭ nekonata de la cetera mondo. Povus taŭge ĝin recenzi nur homo simpatie sentante en si la animon de tiu izola landeto kaj funde konante ĝian fonon.

Taŭzas la koron tio, ke plaĉas al la Kreanta Inteligento revelacii al elektitaj mortemuloj, al kiuj tamen ŝajne mankas la necesa kapablo transesprimi iliajn strangajn viziojn en klara lingvaĵo al siaj kuteranoj.

Ĉu vere ĝuste ĉi tiu aŭtoro sukcesis en tio, unue per la propra forto, kaj due per sia tradukinto: lia subtila simbolismo devas pasi tra la menso de lia Esperantiganto, kaj poste tra la medio de nova parolformo, nome nova lingvo. La spiritaĵoj de homoj ho tre ofte similas al terursonĝoj, inkuboj, pri kiuj oni scias ja, kiel malfacile estas rakonti ilin post la unike persona sperto dum ilia vigriga prezentado.

La tradukinto en prologo konsciencie penadis interpreti la psikon de la aŭtoro kaj indiki la gvidliniojn de ties pensado. La meza leganto dezirus iom pli netan, klare kompreneblan prezenton de la aŭtora filozofio. Ĉu vere, ke R. ne povus redukti sian dirvolon ĝis malpli komplikaj kurturoj?

Ni rekomendas la libron nur al intelektuloj dediĉitaj al intensa cerblaburo pri abstrakta spekulativo kaj vizioj ne malpli obskuraj ol tiuj de Jehekel.

## SABATAJ SONORILOJ!!

En "La Batalo de l'Vivo", p. 6, linio 16, "sabataj" devus esti "dimanĉaj", ĉar en la Angla originalo staras la adjektivo "Sabbath" (t.e. Sunday). Zamenhof, tradukante el la Germana traduko, ial kopiis la eraron, kiu estis en tiu ĉi verko. Waringhien, en "Traduko de la Provtekstoj en la Gvidlibro" (1937) ankaŭ sekvis la misajon, tradukinte "Sabbath bells" per "cloches du samedi". "La Rondo" (Melburno) kiel unua rimarkigis pri la afero en la n-ro 2, Feb. 1940.

En sia "Eseoj" Waringhien en 1956 komentis pri tiu kaj aliaj tradukeraroj de konataj laborantoj en malfacila kampo.

La vorto Sabbath, certaronde kaj certacele uzata anstataŭ Sunday, havas interesan studflankon. La Puritanoj de la 17a jarcento, influataj de la Hebrea teologio kaj religia mentalo, respektigis la unuan tagon de la semajno, kaj konscie, intence imitis la Hebreojn ankaŭ en tio, ke ili nomis sian plej sanktan tagon

Sabato, derive de la Hebrea **shabbath**: ĉesi taradon; ripozi. Hodiaŭ la vorto estas uzata serioze de:

(1) riĉemaj homoj, kiuj respektegas la unuan tagon kaj ne volas vidi ĝin tago de komercado, amuzo frivola kaj simila, kaj kiuj volas konservi ĝin aparta, solena tago de spirita meditado edifo. Ĉi tiuj uzas la vorton Sunday en ĉiutaga parolado nur kiam ne estas necese, emfazi la religian karakteron de la tago.

(2) De aŭtoroj, kiuj celas ial solenecon, aŭ poeziecon, aŭ unucon en kiu restu iom de la Diadoro, Dire-spekto aŭ anima sinteno, kiu karakterizas homojn, kiuj kutime tiel uzas la nomon.

(3) Neserioze de homoj, kiuj en iu okazo volas impresi per ridiga patoso, moketa ŝajnpieco, aŭ ŝajnseriozeco.

Dickens uzis ĝin pro (2), penante redoni la pacan pitoreskon de Angla agroteo en Dimancaĵo mateno, kiam preĝejoj sonoriloj muzikas tra la sunoritaj scenoj de forlasita laboro, vokante al Diservo piajn kamparanojn.

La Juda "Sabbath", kompreneble, estas la sepa tago de la semajno: en Esperanto, sabato.

### PLENDPETO AL POETOJ

Multaj E-istoj grimacas pri la forma kvalito kaj gargara galimatio de tre multe da E-a versaĵo, kiu tro facile trovis lokon sur presitaj paĝoj. Estas certe, ke la plimulto da ĝi destiniĝas al plena forgesiteco, ĉar ĝi ne havas kapablon formi parton de la animo de legantoj kaj stimuli ilian imagon.

Grandparte ĝi estas aŭ nebulose pesimisma, aŭ fantazie "kosmecaj", aŭ simbolisme subtilaj, kaj ofte verkitaj bastarde en jargona mikso en kiu poezio kaj prozo estas malfacile limdifineblaj. Ni bezonas drastan reduktion de kvanto kaj pli evidentan kreadon de poemoj, kiuj, per senc-hava dirvolo kaj zorge elpensita esprimklaro, rajtas esperi trovi lokon en la cerbo kaj koro de inteligentaj homoj.

Ho, se pli vaste en la versfarado oni atingus la metrikan modelecon, la admirindan senc-kristalecon de la perfekta "En Amara Horo" ("Streĉita Kordo") de Kalocsay—el ĝiaj versoj literaturamuloj, citante, ĝue ĉerpas, bone sciante ilian frapforton.

### "MONDA KULTURO"

Legante la Soman numeron, ni rimarkis en artikolo pri Dante uzadon de "Kantiko" kaj "kanto" en sencoj ne ĉiam facile diferencigeblaj. Kaj kion signifas: "la neforcizebla homo Dante"? Eble figure: neforcizebla?

En traduko el la Hebrea Biblio, Broadribb uzis "Qišon", "Qedar", do ne-Esperantan literon. Tio neniel helpas al kompreno. Zamenhof uzis "Kiŝon", "Kedar". Ĉu temas pri dezirinda redono de Semida ĝorgsono? Se jes, kial ne Ĥ? Tiu precedenco estas dubinde sekvinda.

Al Szathmari "plaĉis la vorto **sunatiki** kiel sprita pandanto de **lunatiki**". Ĉu preseraro por "pendanto", kiu ĉiokaze devus esti: "analoga formo (je)"?

p. 249: "la prodajojn de" (la reĝo Arturo). Kial ne simple (1) mirindajojn; (2) heroajojn? Albault dubeme donas: prodiĝo, krom (1). Kiom da strangaj vortoj bezonas niaj kulturemuloj, por esprimi simplajn nociojn?

### SCIO KAJ VOLO

Helpu min, Dio, kiam mi deziras fari justan aferon, sed ne scias, kio ĝi estas. Ankoraŭ pli efike helpu min, kiam, kvankam mi perfekte scias kion mi devas fari, mi tamen ne volas ĝin fari.—Peter Marshall.

### LABORO

Ĉu estas io pli malgaja ol laboro nefinita?

Jes, amikoj; kreu min—labor' ne komencita.

### NEKROLOGO

S-ro Frank Taylor.

Mortis fidela kolego. Antaŭ sia emeritiĝo li instruis en Albury (N.S.W.) dum multaj jaroj. Poste, li partoprenis ĉe pluraj Esperanto-Kongresoj—Kopenhago, Bruselo k.a.: kaj bone reprezentis Aŭstralion. Li estis vicprezidanto de la A.E.A.—Laŭ informo de "Klerigo" N-ro 13.

"THE A.E.", p. 31. Temas pri la vorto "ekkuŝo". S-ro Towsey atentigas, ke Privat skribis kion li volis diri. Z. efektive mortis pro ekkuŝo. Li devis ne kuŝiĝi, nur sidi aŭ stari, pro sia malsana koro. Li eksufokiĝis, kiam li tendiĝis sur kanapo. Dankon, amiko!

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 43 (123)

MELBOURNE

Decembro 1964

---

## ESPERANTO WOULD ENSURE EUROPE

Based on article by Professor F. Lejeune in "Frankfurter Allgemeine Zeitung"

Knowing something of the Slavic languages and in some measure possessing well the European tongues proper, I venture to give a short judgment on Esperanto, as a specialist who has been devoted to "comparative Romance linguistics". I will anticipate my judgment by saying: Esperanto is the realised dream of many "world-linguists". Its word wealth is built not only on the most-used tongues of Europe, but it is, over and above this, possessed of a simple and logical grammar. The planned language of Zamenhof reveals a unique genius, who sought not scientific glory, but willed to create, and did create, a language fitted to become the world language—not in the sense of taking the place of the national idioms, but as an auxiliary or bridge language.

What has hindered it from becoming in very fact that which Latin was in the Middle Ages? The answer is simple: egotistic nationalisms, and such people as have felt themselves destined to see their own language the most widely used. Nobody has wished to give anything away, just as now, when there is question of building the enthusiastically promised new Europe. Shortsightedness, jealousy and obstinacy have hindered the march of Esperanto (1) and today threaten it still. Let us ask ourselves seriously: Which other languages are so easily learned—in their

structure so simple and so clear in their expression as is Esperanto?

LATIN is today impossible. As the language of the erudite few it may serve within limits, but as a language of general intercommunication it is useless because of its grammatical (2) complications.

FRENCH? Hardly. Its nasal sounds (3) are for many peoples a serious bar, even for those using Romance tongues. Just listen to a Spaniard speaking French!

GERMAN is ruled out because of its difficult grammar.

SPANISH would be possible, but its role in the world is too weak, although millions use it.

RUSSIAN is eliminated because of its difficult Cyrillic alphabet, and, more importantly, because of its extraordinarily difficult grammar.

ENGLISH and CHINESE remain.

English has an abominable orthography, if one may use the word as applied to it. There is no standard English. I imagine myself to speak good English, but during my war captivity I had to admit with chagrin that while Southern-States Americans and Africans understood me, I could not follow what they said to me. The differences were so great that I believe that a Ghanian could understand a New-Zealander or a Canadian only with difficulty. Pidgin English is a failure.

More people in the world speak Chinese than any other tongue. This, however, is not uniform. It is a "one-syllable" language. Simple in word-building and grammar, its writing is a grave barrier. Spoken in tone-nuances, words convey different senses according to their intonations. Only children master this with ease. A European finds no connection between Chinese and European roots.

As for TURKISH. Since it abandoned the Arabic script it could be considered as a moderately satisfactory bridge language, for it is logically constructed and by its system of affixes lends itself to facile word-building. It is, however, a tongue without relation to the languages better known, and thus more readily mastered. We must turn it down also.

None of this criticism applies to Esperanto. It is directly derived from European roots, its grammar is simple and has no exceptions, its word-wealth is enormous, as one may form by the syllabic mechanism of one root a whole series of nouns and verbs. Its pronunciation is easy for all.

One talks loosely about a great and powerful Europe without considering that to attain this one must have a widely used popular idiom. Nationalism still forms a formidable barrier to collaboration.

Congresses to draw the world's youth together are vain so long as language diversity holds it mute. What are UNO, NATO, UNICEF, &c., doing about this? If Esperanto were taught to children in progressive countries working to set plan, the future of Europe would be assured.

(1) Compare the action of Leon Berard, who banned Esperanto in France under the Poincaré Government in the '20s. (2) Add: and lexicographical. (3) Add: and the uvular R, a sound produced far back in the throat and resembling a quick gargle.—Ed.

En ĉiu numero de nia gazeto, tenata kun amo sub via nazeto, vi trovas enhavon preskaŭe naŭfutan, kaj—ĉu supozinde?—vi sorbas ĝin tutan.

## FROM KIPLING

God gives all men all earth to love,  
but since man's heart is small  
ordains for each one spot shall prove  
beloved over all.

Each to his choice, and I rejoice  
the lot has fallen to me  
in a fair ground—in a fair ground—  
yea, Sussex by the sea.

Al ĉiuj homoj Dio donas  
la tutan teron amadotan.  
Sed ĉies koro ja bezonas  
preferatan landolokon.

Al vi la via! Jen la mia,  
bela loko, dolĉe kara!  
Regiono idilia—  
nome, Sussex apudmara.

—F.R.B.

## KRISTNASKO KAJ LA KOMERCISTOJ

Vidante homojn uzi sanktajn lokojn  
kaj objektojn,

Por gajni pli da riĉo kaj profiti  
fi-projektojn,

Ekflamis Vi, sur Templaj grund', per  
indignego Dia,

Kaj vipan ŝnuron svingis Vi per  
forta mano Via.

Rigardo Via, fulme fajra, en pekulojn  
brule boris,

Kaj voĉo Via, tranĉe, akre, kontraŭ  
ili plenstentoris.

—Se venus Vi Kristnaske sur nian  
nunan teron,

Pro sama kaŭzo sentus Vi la saman  
Di-koleron.

—Farbo.

## SANGAJN MANOJN LEVAS NI AL VI . . . .

En "The Sun" 18 Nov. troviĝas reklamo por The Home Beautiful (La Hejmo Bela). Temas pri desegnoj **Matador**—aŭtentikaj bildoj enkadrigindaj" pri la areno bovatala. Ili estas "idealaj kaj kolorriĉaj donacoj". Jen Kristnaska "vendopropono favore-preza"! Akompanas la tekston bildo de matadoro enpuŝanta glavon en la kolon de tauro, kies dorso portas faskon da enpikitaj lancoj.

Malfacile oni trovas pli teruran ateston pri la malkristana, ja bestece subhoma koncepto, kiun stulte kruelaj idiotoj povas rigardi kiel kongruan kun la Sankta Festo. Abismo faŭkas inter la du spiritomondo.

## Australia Kroniko

**MANLY:** Niaj ĉiumonataj societ-kunvenoj okazas ĉiun 3-an dimanĉon en la monato. Je 16-a Aŭg. ni piknikis kune kun la Hornsby E-Klubo ĉe "Cheltenham Reserve" kaj poste finis la agrablan tagon en la hejmo de F-ino D. Hasluck. Je 20-a Sept. ni piknikis ĉe "Manly Dam" kune kun la Sydney kaj la Hornsby E-Societoj kaj kunvenis samvespere en la hejmo de S-ino R. Carruthers en Balgowlah. Je 18-a Okt. pikniko okazis en la hejmo de Ges-roj C. Graham en Balgowlah. Ĉe ĉiuj piknikoj ni "barbekuis", kantis E-kantojn kun muzika akompano de S-inoj Sedwell kaj Cooley kaj F-ino Dennys.

Ĉiujade okazis klubkunvenoj en la Vespera Kolegio de Manly. La programo kutime konsistas el kurso gvidata de Ges-roj P. Schwerin, diskutoj pri lingvaj problemoj kaj konversacio. En Aŭgusto finiĝis kurso por progresintoj de S-ro Kevin Smith ĉe la Kolegio. En Septembro 2 novaj kursoj komenciĝis. Tage instruas S-ino B. Cooley, vespere S-ino M. Duncan. Ĉiu kurso okazas en la hejmo de la instruistino. Nur 5 komencantoj serioze aliĝis malgraŭ la elsendado de 50 cirkuleroj kaj kelksemajna reklamado en la loka ĵurnalo. Ĉe 4 diversaj post-lernejaj kursoj, S-rino M. Duncan instruas entute 40 geknabojn.

Ĉiusemajne aperas rubriko "Esperanto - Angulo" en la loka gazeto "Manly Daily". Nia Parlamentano S-ro Douglas Derby dufoje favore menciis la atingajojn de Esperanto en siaj prelegoj en la ABC-Programo. S-ro Kevin Smith alparolis 60 Rotarianojn ĉe Newport (1-a Okt.) kaj montrigis intereso pri la internacia lingvo. La urbestro de Manly akceptis Ges-rojn Duncan ĉe kunveno por organizi vastan monokolekton por "Domoj por Maljunuloj".

Pro eksiĝoj la anoj elektis kiel novan Sekretarion S-inon B. Cooley (27 Waratah St., Harbord, N.S.W.—Tel. 93-4933). Ni ĉiam bonvenigas vizitantojn.—Marjorie Duncan, Manly.

**PERTH:** En Septembro vizitis nin F-ino Rita van Rijswijk, bonekonata nederlanda Esperantistino, kiu loĝis en Melbourne kaj Sidnejo kaj post

reiro al Eŭropo nun denove venis al Aŭstralio. Dum mallonga restado en Perth ŝi vizitis lokajn s-anojn, piknikis kun ni kaj partoprenis klubkunvenojn. La 24-an de Sept. ŝi foriris trajne al Melbourne.

La 17-an de Sept. okazis prelegvespero pri Esperanto ĉe la Unuigo de Instruistoj. S-ino Ruth McGrath, S-ro J. Hawks, F-ino Longson, D-ro Einhovici kaj F-ino R. V. Rijswijk (vizitanto) emfazis la teorinan kaj praktikan flankojn. La intereso estis granda kaj multaj instruistinoj intencas lerni la lingvon en la estonteco.

Ges-roj Einhovici revenis el Eŭropo, kie ili partoprenis la Universalan Kongreson en Hago. La 8-an de Okt. D-ro Einhovici entuziasme rakontis pri la diversaj imponaj aranĝoj, kulturaj aranĝoj kaj la fakkunsidon de medicinistoj, kiun li ĉeestis kaj priskribis renkontiĝojn kun famaj Esperantistoj, i.a. ankaŭ S-ro Titov, la patro de la Sovjeta kosmonaŭto.

Bonvena vizitanto al nia urbo estas nuntempe la angla mondmigranto W. L. Simpkin, kiu ja estas konata al multaj E-istoj tra Aŭstralio. Post 10-jara foresto li denove vizitas nian landon. Li estis intervjuita de la gazetaro. La 28-an de Okt. li komencis Cseh-metodan kurson en kiu partoprenas multaj interesuloj.

**MELBOURNE:** La 11-an de Okt. S-ro H. Koppel sekvis inviton al la Baha'i movado kaj parolis pri nia lingvo kaj la E-movado ĝenerale. Bahai-anoj ĉiam interesiĝas pri nia lingvo kaj la parolinto, kaj la aliaj E-istoj kiuj akompanis lin al la kunveno, devis respondi al multaj demandoj.

S-ino Fay Koppel daŭrigis sian serion da prelegoj pri la E-literaturo. Pri "Julio Baghy" ŝi prelegis 12-an Okt. kaj pri la 2-a literatura periodo ("Dek du Poetoj") la 9-an de Nov. Ĉe la societ-vespero de 26-a Okt. S-ro J. Ryding montris lumbildojn pri Kvinlando. Tiu feliĉulo pasigis la vintron en varma Kvinlando kaj nun regalas nin, kiuj frostis en Melbourne.

En la septembra kunveno de la "RENDEVUO", S-ino Fay Koppel rakontis pri la konstruo de la Aswan Alta Digo kaj la fruaj esploroj pri la fontoj de la Nilo. S-ro E. Hanks,

en Oktobro, montris diapozitivajn pri vojaĝo de Townsville al la Thursday-Insulo.

### ESPERANTISTA RENKONTIGO EN MORWELL, PASKO 1965

Okaze de la lastaj 2 aŭstraliaj E-kongresoj aŭdiĝis voĉoj ke ŝtataj "kongresoj" okazu ĉiam en la jaro inter 2 kongresoj. Nia vigla Vic-Prezidanto, S-ro I. Maddern, jam dufoje organizis tiujn kunvenojn, en Moe en 1960 kaj en Morwell en 1963.

Dum Pasko 1965 (16-a ĝis 19-a Aprilo) denove okazos Esperantista Renkontigo en la bela Altlernejo de Morwell. Interesuloj TUJ anoncu sin ĉe S-ro I. T. Maddern, Box 411, Morwell, Vic. kaj samtempe sendu la kotizon de £1.

### NOVA LIBRO-PERANTINO

Dum preskaŭ 5 jaroj gvidis la A.E.A. Libro-Servon S-ino I. Milligan, Melbourne. Si plenumis tiun taskon kun entuziasmo kaj lerteco kaj pro ŝia sindona laboro la A.E.A. Libro-Servo havas nun stokon da libroj je valoro de preskaŭ mil pundoj. Si petis ke ni trovu pli junan anstataŭulon por tiu grava kaj laborplena ofico. Kun bedaŭro ni devis akcepti ŝian decidon. Nome de la A.E.A. Estraro ni publike dankas al S-ino I. Milligan pro la modela laboro.

Nia nova Peranto estas S-ino J. Andrews, Flat 10, 341 Nepean Highway, Frankston, Vic. Ni petas ke niaj membroj kaj ŝtataj libro-perantoj donu al S-ino Andrews la saman bonan kunlaboron kiun ili donis al S-ino Milligan. — Herbert Koppel, A.E.A. Sekretario.

### HISPANAJ NOMOJ

"Mia familia ĉefnomo ne estas Perez, sed Regulo. Mi estas S-ano Regulo, au S-ano Regulo Perez, neniam S-ano Perez. Se iu fremdulo venus al mia universitato kaj demandus pri Prof-o Perez, neniu eĉ de malproksime suspektus, ke temas pri mi. Ĉiuj Hispanoj portas lauleĝe du familiajn nomojn, el kiuj la ĉefa kaj patra estas la unua. Memoru: Vicente Inglada Ors (S-ro Inglada); Julio Mangada Rosenorn (S-ro Mangada); Jaime Grau Casas (S-ro Grau, au S-ro Grau Casas), Miguel de Cervantes Saavedra; Pedro Calderon de

la Barca; Jose Ortega y Gasset, ktp." (subskribita: Juan Regulo).

### NAŬ TAJLOROJ FARAS UNU VIRON

Generale oni uzas tiun popoldiron en malestimiga senco, nome, ke nau tajloroj egalas nur unu viron; alivorte, ke tajloro estas nur naŭono de viro. Tamen la dirajo rajtas estimigan interpreton, nome, ke nau tajloroj povas "fari" homon el kompatinda mizerulo, kiu en ĝusta senco ne fariĝus "hominda homo" sen ilia helpo.

Iam estis malriĉa viro, senmona kaj ĉifonvestita. Vesperiĝe li eniris urbon, ĉe tiu parto en kiu tajloroj praktikis sian metion. Tajloro, vidinte lin de el sia laborejo, ekkompatis lin, do, vokinte al si siajn kunmetiistojn, diris: "Kion ni povas fari por tiu malfeliĉulo? Monon mi ne havis por li". "Nek mi", diris alia. Sed tria proponis: "Ni havas multe da drappecoj, kaj uzi kudrilojn ni bone kapablas. Ni faru por li veston el tiuj pecoj".

Ĉiuj tuj konsentis al tio, kaj la nau tajloroj arde kudriluzis ĝis malfrue en la nokto. Fine ili prezentis al li veston, faritan ja vere el draperoj, tamen tiel honeste farita, ke ĝi estis efektive bonkvalita.

La malriĉulo estis pro danko tre emociita kaj, surgenuinte, elkriis: "Vi nau tajloroj ja faris el mi vera homo!"

### IMPORTANT

For 1965 we intend to publish 6 numbers of the "Australian Esperantist". Copy for each will be sent to the Printer by the 15th day of Jan., Mar., May, July, Sept., Nov. This should ensure regular and spaced appearance of our paper. Club reports for "Aŭstralia Kroniko" should thus be in the hands of the Secretary (c/- Box 2122 T., G.P.O., Melbourne) by the first days of these months, otherwise they must be held over!

Would clubs wishing to see their news in print please cooperate by sending their reports promptly. (If possible typed, double-spaced.)



## Recenzoj

“Enciklopedieto Japano.” Verkita de T. Nakamura, A. de E., redaktoro de “Oomoto”. Eldonis KOSMO, Osaka. 220-paĝa, presita sur glacea papero, kun 80 fotoj, tolbindita, ĝi prezentas koncizan informaron pri la Japano vivo kaj ĝiaj apartaĵoj. La enhavo: Generalaj Notoj, Esperanta ortografio de la Japano lingvo, Leksikona Listo (E-Jap.), Indekso Japano-Esperanta, Kronologia tabelo de la Japano Historio, Mapo de Japanujo. Prezo 5 Us. dol. Mendebila ĉe nia agento, S-ino J. Andrews, Flat 10, 341 Nepean Highway, Frankston, Victoria, aŭ ĉe UEA aŭ Oomoto mem.

La aŭtoro pacience elkribris multajn vortarojn, faklibrojn kaj artikolojn, asimilante faktojn cele al formo taŭga por E-a publiko. Legantoj trovas nombron da Japanaj vortoj Esperantigitaj por la unua fojo kaj elektitaj precipe el du Japano-Esperantaj vortaroj, ĝis nun do nekonitaj de eksterlandaj E-istoj.

Pro ĉi libro oni povas atendi iompost-ioman akceptadon de Japanaj radikoj en la mondvastan uzadon de E-o. Tia “enhejmiĝo” de ne-Eŭropaj vortoj faciligus por Japanoj la praktikan uzadon de la internacia lingvo, evitigante por ili longajn kunmetaĵojn aŭ parafrazojn, kiam ili volas esprimi aferojn por si simplajn kaj familiarajn.

Tiun tendencon klare vidantaj E-istoj profetis jam antaŭ longe, kalkulante pri la efiko sur E-on, kiun havus ĝia signifa plikresko ĉe Azianoj.

Jen gravega kontribuo al la efektiva internaciigo de nia mirinda komprenilo. Atenton donos ĉiu pensanto pri la evoluinta mondsituacio.

**Sen Paraŝuto. Testamento de Poul Thorsen.** Eldonis Stafeto, La Laguna. 144 p. Prezo 1.20 Us. dol.

Enkonduke prezentas ĉi kolekton da versaĵoj la iom mistera Henri Baupierre, kiu “aligis al” Esperanto aŭ almenaŭ “la movado” en 1958 kaj jam produktas juvelan verkaĵon. Malmulton sciante pri la aŭtoro, li tamen elverŝis 2½ paĝojn da lumiga prozo pri sia temo.

Thorsen donas tradukojn de specimenoj el 15 Danaj poetoj kaj multajn originalajn versaĵojn, miniature kaj pli ambicie. Aliaj kapoj povas ne-

samopini, tamen el la unuaj ni elektas kiel plej trafajn: Rezigno, en kiu Aarestrup demandas pri la signifo de l’vivo. Mozaiko de l’Paco (Knudsen) penas konkretigi kaj difini la sencon de tiu sopirata idealo interhoma. Moller prikantas la sentojn de “oldo” amanto vid-al-vide lian vivkunulinon, kun kiu li paŝas malsupren sur la fina etapo. La originala “Ĉu Venko” satiras tro konatan karakterizon de iaj Esp-istoj: homoj, kies apostola fervoro ne permesas al ili tempon—lerni la lingvon.

Per ofte majstraj miniaturetoj, Thorsen, socia kritikemulo, vestas en kerneca formo siajn observojn, i.a. ke: malgraŭ siaj dankindoj, per-radia “jurnalo” ne provizas paperon por paki fiŝojn; Danoj ne paŝas la plankon de l’Infero, ĉar ilian “gorgano kveron” la Diablo ne komprenas; iu konatulo rilatas al E-o, kiel al aliiĝe edzino—ekstaze admiras, sed neniam akiras; viro, ekamanta, similas al alumeto flagranta, ĉar ambaŭ perdas la kapon dum ardo; junuloj ne respektas al la aĝo, krom se sur vinboteloj; ĉe festeno kun la edzino, ni duobligas la koston, kaj duonigas la amuzon!

Jen gustetoj de lia petolema sprito. Legu mem la teknikan artaĵon.

En traduko el la Dana Thorsen faris verson: “. . . vidu la lertan rimigon per koro-doloro”. Sajne, ke ankaŭ en la Dana troviĝas tiu eblo (per “hjaerta, smerte?”). Komparu: Herz, Schmerz; Heart, smart; coeur, douleur. . . . Signifa, ĉu ne? Vidu en “La Rondo”, Sept. 1956 represon el “Lingvo Internacia”, Apr. 1907: “se vi havas ian ‘koro’, ne forgesu la ‘doloron’”.

Lerta vortjonglo: venkis La peno (Lapenna) antaŭ Unesko. Informaj biografieto pri la aŭtoroj.

**SUB LA SIGNO DE LA VERDA STELO:** Diverslandaj gesamideanoj rakontas interesajn el sia Esperantista vivo. 71 p. 8/8 Australia. Ce Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Abbyhøj, Denmark.

23 rakontoj, kies legindeco varias, jam de ne tre interesa ĝis atentofrapa impresnivelo. Ili estas rezulto de sonbendaĵoj kolektitaj en la internacia altlernejo en Helsingo. Tiuj rakontoj, faritaj de homoj de ĉiu literatura nivelo, multe plaĉis al aŭ-

dintoj en aliaj landoj. Tial oni revizie preparis ilin por presado, cele al mond vasta konatiĝo.

Inter aliaj kontribuis Ginz, Faulhaber, Setala, Thorsen, kaj Rosbach. La lasta havas recepton por junuloj al kiuj mankas aŭ malabundas mono por aŭfranki leterojn al iliaj alilandaj korespondantoj E-amikoj. (Kiel junulo) "mi interŝanĝis p.m. kun eksterlandaj korespondantoj — kaj miaj kamaradoj volonte aĉetis el la plej belaj kaj maloftaj poŝtmarkoj. Tiel mi ĉiam havis sufiĉe por aŭfranko". Imitinda praktikajo!

Setala vivece priskribas la haoson en Parizo en 1914, okaze de la E-kongreso tiujara, kaj Thorsen la tremon ĉe Skopje 1963. Kustosz raportas pri 4-jara E-laboro inter Gronlandanoj, inter kiuj, pro "specialaj cirkonstancoj", bedaŭrinde ankoraŭ mankas adreso ilialanda en la Jarlibro.

Jen facile legebla kompilo forte rekomendinda por lernantoj. Malofte ili sentos neceson peti klarigon de instruisto. Ĝia apero instigu al similaj eldonoj en aliaj landoj, kie troviĝas E-istoj kun egale presindaj vivspertoj kaj preteco ilin eldiri.

—F.R.B.

## OKCIDENTA - GERMANA REVUO

N-ro 4, Julio-Aŭg. enhavas artikolon pri la atenco kontraŭ Hitler en 1944 kaj multnoman liston de eminentuloj, kiuj estis ekzekutitaj post ilia malsukceso. La Germana Federacia Poŝto eldonis 8 poŝtmarkojn por honoro kelkajn el la plej konataj rezistbatalintoj.

Inter aliaj valoraj kontribuoj estas priskribo de Hamburgo, en kiu la redakcio aperigis, krom faktoj pri ĝia komerca signifo, ankaŭ informajn paragrafojn pri Esperanta vivo en tiu "pordego de Germanujo al la mondo". La malavara pri-Esperanta enhavo de ĉi gazeto metas ekzemplon al aliaj per-Esperantaj gazetoj ŝtate subvenciataj.

Membroj de la E-movado povas ricevi ĝin senkoste. Petu ĉe Postfach 180, 625 Limburg/Lahn, Germanf. Specimenojn ĉe via redaktoro, kontraŭ aŭfranko.

## "ESPERANTO KAPABLAS ĈION"

Nekrasov kiel unua uzis la diron en poemo ("Literatura Mondo", Junio 1932):

... sed malgraŭ ke asertas oni  
ke eĉ ne eblas rekomponi  
la majstroverkon (1) en traduk',  
grenadon pafas mi je flug',  
Ne! Esperanto povas ĉion!  
Respiras ja la nova viv'  
en Esperanto kun aktiv'.

Ni komentas: Ĉe la naciaj lingvoj eĉ relative kontentigaj tradukoj de la grandioza poezio estas raraj. Ekz. Longfellow ĉe Germanaj lirikoj; Schlegel kaj Tieck ĉe Shakespeare (malgraŭ ioma mutado de la Elizabetana muziko). Tiurilate komparu la plej bonajn partojn de "Otelo" en la traduko de Rosetti.

Kiam la senco estas pli grava ol la maniero ĝin esprimi, plaĉa traduko estas ebla; sed kiam la verko estas arta kreaĵo en kiu ludas la ĉefan rolon la melodio de sonoj kaj sonsekvaj, kaj la subtila elvoko de nefacile difineblaj emocistatoj, oni rajtas supozi, ke kontentiga traduko ne estas ebla. Sekve, povas esti, ke ne ĉiam Esperanto kapablas, lau forma kaj senta fidele, traduk-redoni la tonon, etoson, pensasocion, "odoron kaj koloron" de nacilingva poemo. Tamen, Esperantaj tradukajoj de majstra mano jam ofte sin montris egale belaj, esprimivaj artproduktoj, malgraŭ ke ili havas sonmuzikon kaj senc-enhavon iom diferencajn je iliaj originalaj.

Pri la prozo estas kredeble, ke Esperanto superas naciajn lingvojn, pro sia senfina radik-kunmeteblo kaj mirinda frazleksebleco. Uz-sperta kaj inteligenta Esp-isto, eĉ se neklera je sia gepatra, kvazaŭ instinkte esprimas subtilajn nuancojn, per ludo kun afiksoj kaj efekta vortarango, ekspluatante la aglutinan genion de Esperanto.

Kiu tradukos la poemojn de Robert Browning kaj William Blake? Kaj "The Turn of the Screw" (Henry James), "Ulysses" (James Joyce)? Kiu radie aŭ televide elvoĉos priskribon de boksbatalo dum ĝi okazas antaŭ la okuloj?

(1) Temas pri lia traduko de "Eugeno Onegin".

## Citindajoj

Mi laboris dum kvar jaroj antaŭ ol klare kompreni la metodojn de la lingvistiko kaj kapabligi ilin korekte apliki. . . . La lingvistiko estas scienco, kun neevitebla inicado kaj akirinda metodologio, ĝuste kiaj la fiziko aŭ la antropologio.—G. Waringhien en **Sennacieca Revuo** 6/39.

“Nur Kalocsay povas kun Auld konkursi en la traduka arto. Lia (Ties?) speciala genio en tradukado konsistas grandparte el tiu speciala, ege malfacila modesteco, per kiu la tradukanto tute malaperigis sin en la animon de la tradukato.”—Marjorie Boulton en “Brit. Esp. 7/61. Ĉu per “Lia” ŝi indikas al Kalocsay aŭ Auld? Supozinde al Auld. Se jes, ŝi pliklarige uzu “Ties”.

La Angla lingvo havas tre difinitan kaj **kompleksan gramatikon** kun iom da varioj laŭ la sociaj grupoj en kiuj ĝi estas parolata.—R. Quirk, Prof. de la Angla Lingvo, Londona Univ. en “The Use of English”. (Ni substrekas.)

Mi devas pledi pri revizio fare de alilandano(j) antaŭ ol publikigi tradukojn de persono samlingva kiel la aŭtoro.—P.M. en “Nederlanda E-isto” en recenzo de Franco, Roger Bernard, el la Franca.

La brilaj poetoj rajtas esti superaj al la rigoreco de la gramatikaj reguloj; tiaj detaloj interesos nur... pedantojn.—“The British E-ist”, p. 313.

Great importance is attached to grammatical accuracy in all Sections.—Report of Royal Society of Arts for Examinations, Esperanto candidated. P. 315.

Medite komparindaj ĵsertoj.

“Ke Esperanto estas facila lingvo fariĝis aksiomo inter ni . . . . Kial, do, estas tiel malfacile trovi personon kiu kapablas bone paroli Esperanton? . . . . La hazarde trovata Esperantisto ne pli bone balbutas sian plej simplan lingvon ol la hazarde trovata studanto de la Germana aŭ Franca lingvo sian studataĵon . . . . Ni pli ofte renkontas malkapablan Esperantiston ol kapablan; eĉ veteranoj misproncas kaj ŝoke eraras. Kaj mi anhoraŭ legis la verkojn de eĉ ne unu

persono en Esperanto (eĉ ne Zamenhof!) sen trovi nedisputeblajn erarojn en la uzado de la akuzativo”.—El 4-paĝa artikolo de Donald Broadribb en La Nordamerika Esperanto-Revuo (Feb. 1964). En ĝi li pensige prezentas kaŭzojn de tiu paradoksa situacio, kiel vi vidas ĝin.

## LINGVAJ DEMANDOJ

EC- Adjektivoj formitaj el substantiva radiko plus -ec donas vortojn, kiuj havas sencon: -simila, -aspekta; -ŝajna; ekz., Si havas silkecan hararon. La fluido havas sangecan densecon. Li havas ŝtalecajn muskolojn. Li estas drateca korpulo. Oleca koto k.t.p.

Cottony cloth (cottonlike) = katuneca ŝtofo: with some cotton in it = partkatuna, duonkatuna, katunmiksa.

Katuno = cotton (processed); kotono = raw cotton.

A stone road = vojo el ŝtono (aŭ ŝtonaĵo); elŝtona vojo. A stony road = ŝtonhava, ŝtonriĉa, ŝtonplena vojo. Ekster la medicina kaj kemia fakoj oni ne multe nun uzas -oz en la literaturo. G. Moch uzis ĝin tiel frue kiel en 1909, kaj niaj modernaj poetoj trovas en ĝi metrikan rimedon.

Se oni insistas uzi ĝin, oni tion fari nur post substantivaj radikoj por signi **materian** multhavecon (sukoza, sabloza). Ĉe adjektivaj kaj verbaj ĝin anstataŭas “ega” (kuraĝega).

“Antaŭ” estas uzata pri loko kaj tempo, tial ĝia mala formo—“malantaŭ”—povas esti uzata en ambaŭ sencoj. Tamen, ĉar ekzistas la vorto ‘post’, kutimo estiĝis laŭ kiu “post” estas uzata pri tempo, kaj “malantaŭ” nur pri spaco. “Malpost” ne estas laŭkutima.—Karl Minor.

“Moŝto” estas substantivo. Kompreneble, ekzistas “moŝta”, kiel “tabla”, “poŝa”. Sekve korekta estas la frazo: “Li havas mian moŝtan favoron”, sed erara estas “moŝta grafo” por “grafa moŝto”. Ĝi estas titolo de ĝentileco kaj respekto, uzebla por ĉiuj rangoj, eĉ sarkasme, ironie, bonhumore: jam de “ŝia reĝina moŝto” ĝis “via redaktora moŝto”.

### Klarigi, Ekspliki.

"I explained to him, but he did not understand". Traduki tion per "Mi klarigis tion al li, sed li ne komprenis . . ." estas nebone. La senco postulas "Mi klopodis klarigi tion k.t.p." Tamen en kelkaj lingvoj oni ellasas la vorton por "klopodi". Ni ne imitu tiun nelogikajon; ĉar "explain" signifas "igi ion klara", "kompremita".

Akvo, lumo, sono, ĉielo, okulo; kaj figure ankaŭ stilo, spirito, esprimo, penso, povas esti klaraj, sekve oni povas uzi ilin kiel objektojn de la verbo "klarigi".

"Ekspliki" estas uzata sole nur por la senco: "Klarigi kaj komprenigi ion, montrante ĝian signifon, naturon, kaŭzojn aŭ motivojn" (P.V.).

### Apreci, Apreci?

"Apreci" luktas kontraŭ "aprezi" en la uzado. Antaŭ ol eventuale venkos tiu aŭ alia, nepras klara difino de senco. Laŭ Parnasa Gvidlibro "apreci" = **kompetente** taksu la artan valoron de io. Laŭ supozinde pli alta aŭtoritato, la E-Fr. Vortaro de Waringhien, ĝi signifas simple: ŝati.

Flankdire, Fr. apprecier = taksu, ŝati. La Angla appreciate = (1) pli-valorigi. (2) valorigi, alte taksu. (3) ŝati. (4) percepti; kaj en la frazo, He cannot appreciate art, ĝi signifas: Li ne havas kapablon ŝati (aŭ, ne ŝatkapablas) la arton.

Cu vere, ke la vorto estas necesa, ekster rima poezio? Ni pensas, ke ĝi ne estas generale necesa, kaj ke la poetoj saĝe farus, se, uzante la vorton, ili tion farus nepre nur en la senco donita de la Parnasa Gvidlibro. Laŭ nuna sporada uzo, "apreci" ("aprezi") estas danĝera vorto, konjektante heziti antaŭ la ĝusta dirvolo de la aŭtoro, kiu malsaĝe uzis vorton sen klare difinita senco.

### Telegram Form?

Fulcher & Long donas avens, deodar, cromlech, catechu, haemetite, battue kaj aliajn malofte uzatajn vortojn, kaj similan kritikon oni povas fari pri la Plena Vortaro, tamen oni vane serĉas en ili vorton por la ĉiutaga "form" en senco de rutine enskribota papero.

Formul(ar)o, blanketo, blankedo ne taugas. Ni jam havas "mendilo",

"aligilo", "abonilo", kiuj estas enskribotaj paperpecoj, tial ĉu ne bone, uzi "telegram-enskribilo", aŭ simple "telegramilo"?

### Voli, Deziri

Voli havas 4 difinojn: (1) pli-malpli energie uzi la spiritajn fortojn per kiuj efektiviĝas la agoj. (2) Koncentrigi atenton al la ideo de ia ago, por ke ĝi efektiviĝu. (3) voli iri: "ŝi volis en kaleŝon". (4) voli havi: voli akcepti. "kato volas fiŝon, sed timas la akvon".

(4) similas al Deziri (difino I en la P.V.): konscie emi al io, aspiri posedon aŭ ĝuon de io.

Ni povas voli ion, sed ne deziri ĝin. Ekzemple, por eviti malagrablaĵojn mi **volas** pagi troalte postulitan monsumon, sed ne **deziras** ĝin pagi; mi volas preni aĝustan medikamenton, sed ne deziras ĝin preni. Pri-pensu ankaŭ pri ĉi-frazo: "Cu vi volus min helpi?" Tie mi ne rajtas pensi, ke vi **dezirus** tion, sed pro ĝentileco eble volus . . . Rimarku ankaŭ la kondiĉan modon. Subkomprenate estas elipso: Se mi rajtus pensi, ke vi konsideros mian peton.

### In Any Case?

Por redoni "in any case", ne taŭgas kaj "en ia okazo" kaj "ĉiuokaze". Zamenhof kaj aliaj bonaj uzantoj skribas "estu kiel ajn" aŭ (laŭ cirkonstancoj) "cetera". — Mason Stuttard en "Esperanto" 1/54.

Oni povus diri "okazu kio ajn", sed jam de tre longe ((Millidge, F/Long ekzemple) "ĉiuokaze" es-primas la saman ideon kiel la Angla "in any case". — Iu en "Esperanto" 3/54. "Ĉiuokaze" ekzistas en aro da alilingvaj ekvivalentoj — ekzemple, en tout cas; in any case; jedenfalls; in ogni caso . . . H.J. en "Esperanto" 5/54.

Zamenhof ja skribis: "Kiel ajn la afero estos, en ĉiu okazo ĝi devos . . ." (2 Fab. de 'Andersen, p. 117. En 4 Fabeloj ĝi kelkokaze uzis "ĉiuokaze". — Red.

### LABORO

Cu estas io pli malgaja ol laboro nefinita?

Jes, amikoj; kredis min — labor' ne komencita.